

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO-
INSTITUTO

N-ro 73 Oktobro 2007

Esperanto estu la unue lernenda, fremda
lingvo kaj kapabloevoluiga lernobjekto en la
bazgradaj lernejoj.

Albana proverbo: Ridas bone kiu ridas la
lasta

a_myrazi@yahoo.com,
adoci@gmx.de,
agimperaj@yahoo.it,
anila.sokoli@raiffeisen.al,
apistoli@aol.com,
arbibasho@yahoo.it,
beqirajs@hotmail.com,
bselimi@gmail.com,
cara.e@markdist.com,
cufi.izmir@yahoo.com,
donika.kapollari@rt-grp.com,
donika.kapollari@yahoo.com
dritanxhindole@hotmail.com,
durimgurra122@hotmail.com,
egli_b@wp.pl,
eltonzaimi78@yahoo.com,
enkelaxhamaj@yahoo.com,
ereid@wp.pl,

Estraro: Doc. Vasil Pistoli, Bardhyl Selimi,
Rita Permeti

Retadreso de niaj membroj kaj
simpatiantoj:

empema@hotmail.com,
ervincanga@yahoo.com,
fiorialbtours@yahoo.com,
fl_fejzi@hotmail.com,
gentianymeri@yahoo.com,
hllanaj@yahoo.com,
hysaerald@yahoo.it,
klotirama@hotmail.com,
klotirama@yahoo.com,
lorushi_1986@yahoo.com,
matildasokoli@yahoo.com,
mgumeni@lincoln.org.al,
mimoza.blomberg@apoteket.se,
mirela_biba@hotmail.com,
motto@bwc.org,
n_limaj@yahoo.com,
ne_sokoli@yahoo.com,
nesokoli@hotmail.com,

notemarius@yahoo.com,
notemarius@yahoo.com,
oresti_01@hotmail.com,
pistolia@yahoo.com,
sambeg2000@yahoo.com,
selimibardhyl@yahoo.com,
sh.ha@hotmail.com,
shabanhasani@gmail.com,
tcobani@yahoo.com,
uliambinozi@yahoo.co.uk,
worldofleda@yahoo.com,
zaimiarmando@yahoo.com,

Enhavo

AIS, UEA, ILEI kaj Ni

La decembra numero de Esperanto

Supera kurso en la Jagelona Universitato Krakovo

Projekto dauxras

Esperantomaniuloj-artikolo pri la Studumo en Bydgoszcz

Sesio de PEA en Bydgoszcz

Kie pagi la kotizojn por AIS

Atentigo por niaj studentoj

Gramatikajxoj el la revuo IPR

El la materialoj de nova IPR numero

El la leteroj

Informajxoj

El la bultenoj de amikaj asocioj

Beletraĵoj

Artikoloj publikigitaj en la Esperantistaj revuoj

AIS, UEA , ILEI kaj NI

La decembra numero de la revuo ESPERANTO

Estimataj membroj-abonantoj de UEA,

En la retejo UEA.ORG jam estas elshutebla la PDF-versio de la decembra numero de la revuo Esperanto.

La enhavlisto de la decembra numero:

- * Malferme: Spica vizio (Probal Dasgupta).
- * Għenerala Konferenco de Unesko (Renée Triolle).
- * Pri utileco de maljunulo (Roman Dobrzyński).
- * Herzberg – la Esperanto-urbo. Mozaiko de la evoluo (Peter Zilvar).
- * Kongresa Komuniko 1. 93-a Universala Kongreso de Esperanto.
- * Postkongresi en Afriko kun instruistoj.
- * La lingva defio: alfronti la realon (Claude Piron).
- * Furorajhoj de la Libroservo en Jokohamo.
- * Internacia Kongresa Universitato.
- * Recenzoj: Baldur Ragnarsson pri Moskvaj sonoriloj. Antologio de verkoj de moskvaj poetoj-esperantistoj. Jak Le Puil pri La Fishkaptisto. Vojaĝho tra la poezio de Fabrizio De André. Jorge Camacho pri L'extraordinaire diversité des langues et sa répercussion sur l'espéranto kaj Balenoj, delfenoj kaj aliaj mirindajhoj de l' oceano.
- * Laste aperis.
- * OSIEK-premio 2007. Oficiala informilo.
- * La morto kaj la morto de Marvin Stanley (István Ertl).
- * Tra la mondo: Al diverskultura komunumo (Kim Uson). „Diplomitaj esperantistoj“ en Brazilo. Ĉinaj komercistoj kaj entreprenistoj (Chielismo Wang Tianyi). „Semajno“ en Katalunio (Luis Serrano Pérez).
- * Forpasoj.
- * Anoncetoj.
- * Jarfina indekso.

Por elshuti la numeron bonvolu viziti retpagħon <http://reto.uea.org> (unuafojaj venintoj bezonas registrighi).

La decembra PDF-versio de la revuo Esperanto estas trovebla sub la menuero TEKŌ - kune kun pluraj antaŭaj numeroj. Junaj membroj trovos tie ankau PDF-versiojn de revuoj TEJO-tutmonde kaj Kontakto.

*** Pardonpeton, se la informo vin ne interesas. Bonvolu sciigi al reto@uea.org se vi ne plu deziras

ricevi sciigojn pri la PDF-versio.

Amike,
Andrej Grigorjevskij,
volontula prizorganto de UEA.ORG

Nova numero de Esperanto

En la retejo UEA.ORG jam estas elshutebla la PDF-versio de la novembra numero de la revuo Esperanto.

La enhavlisto de la nova numero:

- * Malferme: 2008: jubileo-jaro, jaro de fano (Ranieri Clerici).
- * 1-a DuaViva Universala Kongreso, 6-7 okt 2007 (Anna Löwenstein).
- * Radioelsendoj en Esperanto: Novajhoj pri la E-programoj de publikaj radiostacioj (Gabriela Kosiarska).
- * Homaj rajtoj, Zamenhof kaj ni (Probal Dasgupta).
- * Instruado: Interlingvistika sesio kaj instruista trejnado en Poznań (Ilona Koutny).
- * Silezia Studadsesio de AIS (Jerzy A. Walaszek).
- * Funkciuloj de UEA vizitis Bjalistokon (GaKo de UEA).
- * UEA invitas prelegi en la Roterdama IKU-sesio.
- * Kalendaro 2007-2008.
- * Belartaj Konkursoj de UEA en 2008.
- * Abontarifoj 2008.
- * Anoncetoj.
- * Recenzoj:
 - Andreas Künzli pri Die neutrale Sprache. Eine politische Geschichte des Esperanto-Weltbundes.
 - Paul Gubbins pri Rubriko Esperanto de la tagjurnalo „Dong-a ilbo“.
 - Ed Borsboom pri Historio de Esperanto.
- * Laste aperis.
- * Malferma Tago.
- * Loke-Fake-Persone: Chinio (Augusto Casquero). Israelo. Jansen (Atilio Orellana Rojas).
- * Oficiala informilo.
- * Tra la mondo: La 40-a ILEI-Konferenco (Aurora Bute).
- * Nova estraro en Pollando (Andrzej Sochacki).
- * Niaj gejunuloj kongresis en Hanojo.

Por elshuti la numeron bonvolu viziti retpaghon <http://reto.uea.org> (unuafojaj venintoj bezonas registrihi).

La novembra PDF-versio de la revuo Esperanto estas trovebla sub la menuero TEKŬ - kune kun pluraj antaŭaj numeroj. Junaj membroj trovos tie ankaŭ PDF-versiojn de revuoj TEJO-tutmonde kaj Kontakto.

*** Pardonpeton, se la informo vin ne interesas. Bonvolu sciigi al reto@uea.org se vi ne plu deziras ricevi sciigojn pri la PDF-versio.

Amike,
Andrej Grigorjevskij,
volontula prizorganto de UEA.ORG

La supera kurso de esperanto en Krakovo
de: "Novaj'servo de Pola Sekcio de ILEI" <mmajerczak@gmail.com>

Dum la lastaj tagoj estis anoncita la supera kurso de Esperanto en la malnova, fama Jagelona Universitato de Krakovo, lernado al kiu eblas akcepti ankaŭ' esperantistojn el aliaj landoj. Fine de la kurso oni ricevas saman 'Certyfikat' , kiel tiuj, kiujn la universitato liveras pri aliaj lingvoj!

La ebleco estas unika, c'ar nun ne estas planoj pri estonta simila, malferma por c'iu superkurso de Esperanto en tiu universitato.

Pro intereso de gesamideanoj el malproksimaj landoj (i.a. el Brazilo) oni decidis, ke por eksterlandanoj la kurso povas esti nur perreta kaj ke ONI NE DEVOS VENI AL POLLANDO por studi.

Temas pri regula kaj serioza perreta studado kun parte voc'a perreta trejnig'ado kaj ekzameno-prezento de parteto de la akiritaj scioj en sia lando!

Oni trovos pli da informoj en la portalo:

<<http://www.esperanto-reto.org>><http://www.esperanto-reto.org> ->
Studenta Scienca E-Rondo en Jagelona
Universitato,

au' rekte en:

<http://docs.google.com/Doc?id=dhp3sf5p_163fp2j3g&pli=1><http://docs.google.com/>

Doc?id=dhp3sf5p_163fp2j3g& pli=1

- novaj anoncoj estas aldonataj de supre.

Ni estas /-os dankaj al personoj, kiuj publikigas /-os la informojn, au' transdonas /-os ilin al konatoj.

Kore salutas vin

Maria Majerczak

EI: POLA ESPERANTISTO, n-ro 29(5/2007).

Spegulo - socik-kultura revuo en Esperanto,

aperos kvaronjare komence de la jaro 2008.

La unua numero de SPEGULO aperos meze de marto.

64-paĝaj kajeroj en formato A5, nigra-blankaj,

kun kartona kovrilo, estas aboneblaj jam

(kiel jarabono por ĉiuj kvar kajeroj).

Prezo por enlandaj adresoj: 45 zł (inkluzivas VAT

kaj sendokostojn). Prezo por eksterlandanoj: 18 EŬR

(+ 6 EŬR por eventuala prioritata ekspedado).

Abonojn akceptas: Wydawnictwo HEJME

PL 41-250 Czeladź, ul. Wąska 21

mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644 BIC/SWIFT:

BREXPLWMBK

Loĝantoj de landoj de Eŭropa Unio pagas neniujn

bankajnpagojn! Abonantoj el landoj ekster EU povas aboni pagante
al la UEA-konto: <kazi-s> de Kazimierz LEJA.

Ekaboni SPEGULON por la jaro 2008 - kiu estu fruktodona
por ni ĉiuj - volontigas VIN - redakcio el Pollando, Eŭropo
kaj el Esperantujo.

(You are viewing the published version of this document.)

(You must republish this document for viewers to see the latest version. Republish document.)

Instruado de Esperanto en Jagelona Universitato

21 nov. 2007 Novaĵo

Pro interesiĝo pri la kurso de esperantistoj el malproksimaj landoj (ekz. el Brazilo), oni decidis jenon:

1. Estas ebleco ne veni al la unua kaj dua studsesioj, kaj tamen ricevi plenvvaloran atestilon.

Estas prilaborataj formoj akiri far persono ne partoprenanta la sesion la praktikajn kapablojn, kiujn oni trejnos dum la unua studsesio. La kursgvidantino akceptis labori individue perrete (voĉe) kun la kursano, se tiu deziras praktike trejniĝi pri la koncernaj programeroj.

2. Ni jam trovis solvon, por ke kursanoj ne venu ankaŭ al la ekzameno. Tiu okazos perrete.

Oni, do, povas studi kaj ricevi la "Certyfikat", tute sen veni al Pollando!

POST TIU MODIFO, NI DAŬRE AKCEPTAS INTERESATOJN.

19 nov. 2007 Jen detalaj informoj pri la kurso kaj respondoj al la demandoj de la estimataj interesatoj.

KIEL ONI LERNAS?

Ĉiuj partoprenantoj formas unu grupon. Studentoj, kiuj loĝas en Krakovo, partoprenas la ĉiusemajnajn lecionojn en la universitato (marde, je la 18.30). Tiuj, kiuj ne povas ĉeesti pro malproksimeco de la loĝloko, lernas la lecionon hejme.

Ili ricevas pere de la reto, 2 tagojn post la leciono, la materialojn: skanitajn tekstojn, ekzercojn, komentojn, ankaŭ sonmaterialon, fotojn k.a., laŭ difinitaj temoj. Ili studas la lecionon kaj post 5 tagoj sendas la taskon. Do, ĉiuj grupanoj laboras samritme. Estas uzata ret-telefono.

Krom ĉiusemajnaj skribaj taskoj: i.a. redaktaĵoj, gramatikaj ekzercoj k.s., oni lernos parkere modelajn frazojn kaj teksto-fragmentojn. Ĉio celos rapidan progresadon.

Praktikaj ekzercoj (argumentado, diskutado, interpretado de tekstoj, elparolo, voĉo k.s., estos objekto de la unua studsesio, 21-23.dec.).

Ne estos jarlaboraĵo. Ĉiuj taskoj, skribaj kaj parolaj, konsistigos programon de la fina ekzameno. Do, dum ĉiu leciono oni prepariĝos al la ekzameno.

Unufoje dum ĉiu el la du semestroj, la grupo renkontiĝos en Krakovo por 3-taga, 20-hora, ĉeesta, praktika studado.

Datoj

komenco de la kurso: 22 nov. 2007

fino de la kurso: 27 majo 2008

la unua studsesio: 21-23 decembro 2007 (vendr.-dim.) ĉeesto nedeviga

Komenco de la sesio: vendr. 11.00, fino: dim. 14.00.

la dua studsesio: ĉirkaŭ la mezo de febr. 2008 (dato precizigota) ĉeesto nedeviga

Ekzameno - antaŭ la fino de majo 2008 (dato precizigota) ĉeesto nedeviga

(la ekzameno de eksterlandaj studentoj okazos dank'al Interreto kaj loka kunlaboranto).

La studado okazos en la universitato, tuj apud la krakova Ĉefplaco.

Krome, okazos semajnfina studado 1-2 dec. 2007 (sab.- dim.): kunigitaj lecionoj de kelkaj semajnoj, entute 12 horoj. Komenco: sabaton, je la 10.00, fino: dimaĉon, je la 15.00.

La lecionaro ne estas deviga, tamen utila kaj atingebla por ne tre malproksime loĝantaj partoprenantoj. Dum la studrenkontiĝo, la 1 dec., la kursanoj partoprenos la polan tradician Sankta Andreo-vesperon en Eo - laŭ aparta anonco).

Loĝado kaj manĝado en Krakovo

Dum la restadoj en Krakovo oni povas loĝi en studenta hotelo (prezo de unu nokto en 2-lita ĉambro: ĉ.15 EUR, en unulita: 25-30 EUR), aŭ ĉe gastiganto de Pasporta Servo, laŭ la disponeblaj lokoj. La partoprenontoj ricevos pliajn informojn pri kiel antaŭmendi.

Oni manĝos bongustajn polajn manĝojn en nemultekosta urbocentra restoracio (taga kosto de 3 manĝoj: ekde 7 EUR).

PROGRAMO

Tiu praktika kurso kun bona teoria bazo estas:

- korektiga - ĝi celas korekton de eraroj en la lingva kompetento de la partoprenanto,
- plilarĝiga - ĝi celas evoluigon de la leksikaj kaj gramatikaj scioj,
- plibeliga - se vi parolas esperante, parolu bele :).

GRAMATIKO - studado de la akuzativo, artikolo, participoj, kunmetitaj tempoj, sintaksaj strukturoj kaj ĉio necesa por konstrui lingvan kompetenton;

LEKSIKO - studata laŭ la domenoj (floroj, arboj, hundo-rasoj, vestoj k.a.), laŭ vortserioj, sinonimoj k.a.

Materialo:

tekstoj de bonaj E-aŭtoroj kun ellaboritaj en la universitato ekzercoj, taskoj, ludoj (aŭtoras ilin la kursgvidantino); originalaj tekstetoj kaj kantoj; eroj de diversaj bonaj kursoj; iom de la reta riĉeco k.a.

"Certyfikat"

La "Certyfikat" ne estas diplomo. Tio estas atestilo konfirmanta lingvoscion je difinita nivelo.

Jagelona Universitato

Eble indas aldoni, ke Esperanto estas instruata en Jag. Univ. jam preskaŭ cent jarojn.

Informo de la universitato pri la kosto de la kurso

La kosto de la tuta 90-hora kurso, ĉeesta aŭ perreta, kun atestilo, estas:

por A-landanoj: 454 EUR

por B,C-landanoj: 227 EUR

por poloj: 825 zł

La kurso estas antaŭpagenda ĝis la 25-a de novembro (la sendodato).

Kaze de gravaj motivoj kelkaj personoj povas pagi en du partoj (bv. kontakti nin pri tio):

1. ĝis la 25 nov. kaj

2. dum januaro 2008.

Tiam la sumoj estas jenaj:

A-landanoj: 254 EUR + 200 EUR

B,C-landanoj: 127 EUR + 100 EUR

poloj: 425 zł + 400 zł

(ni povas nur aldoni, ke la prezo de la kurso estas favora kompare kun kutimaj prezoj de similaj lingvokursoj en Pollando: 500 EUR).

Demandoj kaj respondoj

- Ĉu estas aĝlimo por partoprenado?

- Ne.

- Kiu(j) instruas?

- Instruas Maria Majerczak, filologo (lingvistiko, literaturesplorado, metodiko de instruado de fremdaj lingvoj), universitata instruistino, profesie specialiĝanta pri formado de estontaj lingvoinstruistoj, E-instruistino kun ĉ.10-jara sperto en E-instruado en ĉi tiu universitato, instruistino en la Esperanto-fako de la universitato de Poznań, Pollando (metodiko de E-instruado).

Dum preparado kaj realigado de E-instruado ŝi foje uzas siajn kapablojn aŭ kvalifikaĵojn en la domenoj de muzik-komponado, kantado, koregrafio, dancado, reĝisorado, aktorado, ŝi profitigas ankaŭ ĵurnalismajn kaj movadajn spertojn.



Maria Majerczak kun gestudentoj de la E-fako de la universitato de Poznań, dum metodika kurso, en sept. 2007. Fotis Reza Torabi.

- Kion atestos la diplomo? Cxu lingvoregan nivelon?

- Jes. Tio estas lingva kurso.

- Aux ankaux ion pri kapablo de E-instruado?

- Laŭprincipe ne; tio ne estas metodika kurso.

Se vi deziras aliĝi al la kurso, bv. peti la konto-numeron por la pago. Nur post pago (bv. tuj informi nin pri ĝi!) oni estos aldonita al la listo de partoprenantoj.

Retadreso por la kontakto:

esperanto.instruado.jag.univ.pl@gmail.com

UNUA anonco pri la supera kurso:

Jen okazo lingve perfektigi kaj akiri atestilon de prestiĝa universitato!

En Jagelona Universitato en Krakovo, Pollando, baldaŭ komenciĝos SUPERA KURSO de Esperanto. Restas kelkaj liberaj lokoj kaj la universitato povas akcepti personojn el aliaj urboj, aŭ landoj, por – grandparte – perreta studado. Bv. legi la anoncon:

2-semestra, 90-hora

SUPERA KURSO

de Esperanto

en Jagelona Universitato

en Krakovo

Partopreno

- ĉeesta, aŭ

- koresponda (perreta),

kun 3-taga stud-restado en Krakovo dum ĉiu semestro kaj kun ekzameno.

Instruas Maria Majerczak.

Post la kurso oni ricevas la novan „CERTYFIKAT” (atestilon) pri Esperanto-lernado liveritan de tiu fama universitato, kiu estas unu el la plej malnovaj en Eŭropo.

La atestilo estas dulingva: redaktita en Esperanto kaj en la lingvo, en kiu la studanto bezonas havi ĝin.

Tio estas la unusola malferma por ĉiuj supera kurso de Eo nun okazanta en Pollando.

Eblas aliĝi ĉe: esperanto.instruado.jag.univ.pl@gmail.com

Ĝis la 20 novembro 2007. La kurso por eksteraj studentoj komenciĝos la 22 nov.

Bv. helpi disvastigi la informon en viaj diskutlistoj, retgazetoj, inter konatoj. Dankon.

La kurso havos sian TTT-ejon en la portalo <http://www.esperanto-reto.org>, en la retapaĝo de la Studenta Scienca E-Rondo de Jagelona Universitato. Tie oni povos legi la aktualaĵojn pri la kurso. Jam baldaŭ vi trovos tie liston de la aliĝintoj. Ĝis nun aliĝis i.a.: Piotr Nosek, Adam Wilkus, Małgorzata J. Komarnicka, Robert Kołodziej, Anna Gwizdoń, Kinga Dubiel.

La ĉefaj celoj de la kurso:

gramatika precizeco, riĉeco de la vortprovizo, sinesprimado en bela kaj facilflua Esperanto, uzado de diversaj stiloj, redakto-kapablo, enkonduko al ĵurnalista redaktado (la redakto-ekzercoj estos pli intensivaj por forte motivataj studentoj), arto argumenti, diskuti kaj gvidi diskutojn, arto voĉe prezenti tekston (i.a. literaturan), plifortigo de memfido dum publika parolado. La programo enhavas variajn elementojn de la esperanta kulturo.

Multaj el la novaj diversdomenaj vortoj kaj gramatikaj strukturoj estos facile lernataj per kantoj verkitaj kaj komponitaj speciale por tiu kurso, kaj eble... per dancoj.

Bv. trovi ĉi-kune

- memorfotojn pri la ceremonio en majo 2007, dum kiu la atestiloj pri Eo estis enmanigitaj al ties unuaj akirintoj.

- modelon de la dulingva „Certyfikat" de Jagelona Universitato. Fotis Kinga Dubiel.



Gratul-manpremo. Kinga Dubiel ricevis la 'Certyfikat'. Dekstre Maria Majerczak.

P5291475.jpg



Jagelona Universitato
Uniwersytet Jagielloński
Kraków, Pollando

JAGELONA LINGVA CENTRO
Jagiellońskie Centrum Językowe

CERTIGILO
PRI LINGVO-LERNADO

CERTYFIKAT
UKOŃCZENIA KURSU JĘZYKA

Ni certigas, ke
Zaŝwiadcza siĝ, ze

Pani
KINGA DUBIEL

sukcese finis la
ELEMENTAN kurson de

ESPERANTO

ukoŝnizyl/a kurs PODSTAWOWY języka
ESPERANTO

novembro 2006 – majo 2007
listopęd 2006 – maj 2007

Maria Majewska
Instruisto

M. S. Dubiel
Direktoro

La 'Certyfikat' de Jag. Universitato en Krakovo, fot. K.Dubiel, P7152712.JPG



Kelkaj el la unuaj ricevintoj de la atestilo, fine de majo 2007. P5291498.jpg

Elŝuteblan version de la fotoj oni trovas en: http://www.internacia-gazeto.com/articoli-2007/art_07_145_stanislaw_kurso.htm

Projekto dauxras

Saluton!

Skribas al vi Mariana Gencheva de Bulgario.

Vi eble jam scias, ke projekto "Alternativa komunikado inter la europaj lernejoj" (AKEL -2) laboras sukcese jam tri jarojn. Nun estas la lasta jaro de la projekto kaj ni intencas kandidatighi antaŭ la naciaj agentejoj "Sokrates" kun novaj projektoj "Komenius" kaj "Grjundvig".

Se estas geinstruistoj, lernejoj kaj organizoj, kiuj volus kunlabori kun mi, Ermanno de Italio , Jacky de Britio kaj Marta de Hispanio (kaj kompreneble kun niaj lernejoj) , ni sincere akceptus vin en nia tre amika rondo.

Bonvolu, skribu al mi.

Amike Mariana

ESPERANTOMANIULOJ

En unu el plej gravaj tagjurnaloj Gazeta Wyborcza en Bydgoszcz la 12-an de oktobro 2007 aperis granda artikolo 2 pagxoj A3 kun aldonaj tri fotoj de ensemblo 8-persona AFRIKA UMBA, dueto VALDO kaj pri kurso de Esperanto kaj litova lingvo gvidata de Regina Grzebowska kadre de Festivalo de 36 lingvoj. La artikolon Esperantomaniuloj verkis red. Emilia Iwanciw, kiu unuafoje renkontigxis kun esperantistoj. La unuan alineon de la artikolo sxi publikigis dulingve en pola kaj Esperanto lingvoj.

Ni devis mallongigi iom la artikolon, kies Esperanta versio estas aldonita sube. La redaktorino Emilia Iwanciw kaj fotoreportisto Paweł Szatkowski konsentis senhonorarie pri ev. utiligo de la teksto kaj fotoj, kiujn eblas pligrandigi el interneto troveblaj kun pola teksto sub:
<http://miasta.gazeta.pl/bydgoszcz/1,35608,4570333.html>

AFRIKO UMBA kaj VALDO laste sukcese koncertis dum Festivalo de Junulara Verkado en Cieszyn kaj ARKONES en Poznan. Ili senpage koncertos en Bydgoszcz kaj en aliaj polaj lokoj nur kun repago de vojaĝxkostoj. Pro vizoj ili ankoraŭ ne povas koncerti eksterlande, sed Vi povas veni al Bydgoszcz por spekti au koncerti kun ili.

Ni ne plene konsentas kun cxiuj opinioj de la redaktorino kaj de ISTKstudentoj, sed cxiu rajtas skribi kion deziras. Se Vin interesas internacia vivo de gestudentoj en ISTK en Bydgoszcz legu la suban artikolon kaj havu propran opinion pri la unua klerigejo en la mondo, kie oni cxiutage studas en Esperanto. Bonvenon al ISTK en Bydgoszcz!

Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo

str. M. SklodowskiejCurie 10

PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando

tel/fakso (+48) 52 346 11 51

rete: stud@esperanto-turismo.org



ESPERANTOMANIACY
ESPERANTOMANIULOJ

Cxiuj Poloj deziras drinki kun mi.



Dum la akceptoj ili gastigas nin per hektolitroj da brando.

Kiam vi drinkos kun Polo, tiam vi estas gasto.

Kaj kiam vi preferas ludi tamburon tiam vi estas malviro.

Nekutimaj estas gestudentoj de Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz: nigrohautaj logxantoj el Tanzanio, Senegalio, Kamerunio, oblikv-okulaj studentoj el Cxinio, Japanio, Koreio, Mongolio, logxantoj el Uzbekio, Kazakio kaj Albanio kune 120 fremdlandanoj el 32 landoj.

Ni planis intervjuon tagmeze, sed afrikanoj venis post duonhoro. Abdoulaye Faye el Senegalio, Dooh Mwelle el Kamerunio, Abraham Langoume el Senegalio, Okparaebo Ikenna el Nigxerio ne reagis pro malfruo. Ili elmetas el kovriloj iliajn tamburojn, gitarojn kaj komencigas amuzo. Dum minuto la klasocxambro sxangxigas al pulsoviva multkultura klubo. Senegalanoj kun energio tamburas,

kamerunano gitarumas afrikajn ritmojn, tanzaniano legxere dancas meze de la klasocxambro. Li arkigxas kun tia engagxigxo, kvazau li cxeestus arangxon de la monato en la plej moda klubo.

Trankvile gitarumas Valery Hramov el Kazakio, japanino nekuragxe aplaudas, koreanino Cindy ridetas nekuragxe, mongolino iomete saltetas. Parto de studentoj estas membroj de la ensemblo AFRIKA UMBA kio en kamerunia lingvo duala signifas Sonoriloj de Afriko, dua estas la kamerunia-kazaka dueto VALDO. Cxiuj estas studentoj de Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo cxe str. M. Sklodowskiej-Curie en Bydgoszcz.



Ili studas cxe ni de tri gxis kvin jaroj. La plej multaj lecionoj okazas en Esperanto. Fine, krom pola diplomo, ili ricevas titolon de bakalauro (simile kiel licenciato) au magistro antaŭ ekzamena komisiono de Internacia Akademio de la Sciencoj. Iliaj diplomoj validas en cent landoj de la mondo.

En lastaj jaroj tre kreskis nombro de eksterlandanoj interesigxantaj pri studoj en ISTK en Bydgoszcz. Dum 90-aj jaroj estis po kelkaj, nun jare 300 eksterlandanoj volas studi en ISTK, sed nur duono ricevas polajn vizojn gxustatempe. En multaj landoj kaj kulturoj revenis modo por Esperanto opinias la studentoj.

Post fino de ISTK-studoj en Bydgoszcz, revenas ili al siaj patrujoj kaj tie malfermas vojaĝagentejojn, kelkaj laboras en flughavenoj en Novzelando, Usono cxu Brazilo. Kelkaj daurigas studojn en Novjorko au Detroit.



En Pollando ili promocias sian kulturon, eksterlande rakontas pri Pollando. Afrikanoj, kiuj estas la plej multaj, lernas de ni konsekvencon, persistemon kaj akuratecon. Polojn ili instruas kiel ne esti rigidaj. Cxiuj komune opinias, ke Bydgoszcz-anoj havas malgajajn mienojn. En Afriko cxiuj estas gxojaj, kvankam estas pli malfacile vivi aldonas Andrzej Grzebowski.

Afrikanoj plej volonte geedzigxas kun blondulinoj. Lasta geedzigxo estis somere. Studentino el Tanzanio edzinigxis kun polo.

Pollando? Kie gxi estas?

Ili parolas inter si nek angle, nek france. Cxiuj libere parolas en Esperanto. Pli multaj konis Esperanton antaŭ alveno al Bydgoszcz, sed aliaj senprobleme ekparolis Esperanton dum tri monatoj en Pollando.

La pli multaj studas en Bydgoszcz, jam de tri jaroj. Valery el Kazakio (malalta, griza, mezagxa, en bluzo) finis muzikstudojn kaj germanan filologion en sia lando. Li laboris kiel instruisto, sed li ekreis konatigxi kun la mondo. Esperanton li eklernis en 70-aj jaroj. Por li Esperanto estas pli multe ol lingvo. Gxi estas ideo, kiu ligas homojn en la tuta mondo.

Por esperantistoj ne estas dividoj, diferencoj, ligitadoj, kiu lingvo estas pli internacia. Esperanto ne havas landon. Kiel sola lingvo gxi estigxis por ligi kaj ne dividi li diras.

Por studado al Pollando li venigis ankaŭ sian filon. Kiam ambau finis la studojn, ili deziras vojaĝi, koncerti kaj promocii en la mondo ideon de Esperanto. Similajn planojn havas Cindy el Koreio. Sxi logxis 20 jarojn en Usono, tie eklernis Esperanton. Al Pollando venis por ricevi diplomon de Esperanto-instruisto, kiam sxi finis studadon, sxi revenos Koreion kaj instruos infanojn en lernejoj - kompreneble Esperanton.

Japanino Junko Oshima antaŭ veni al Bydgoszcz laboris kiel flegistino en Tokio. Pri pola lernejo ISTK sxi interesigxis dum Azia kongreso de esperantistoj en Nepalo. Jam sxi pensiigxis. En Japanio sxi ne povus pagi tiajn studojn, tial mi elektis Bydgoszcz. Cxi tie mi povas vivi ricxe. Ecx kelkfoje semajne mi vizitas filharmonion aŭ operejon. Mi estas sincere mirigita kaj admira per alta muzika nivelo de tiu urbo. En Tokio kulturo estas tre multekosta. Tie mi povus finance permesi al mi pagi biletojn por eble nur unu koncerto dum la jaro sxi diras. Junko pri ekzisto de Pollando eksciis de esperantistoj antaŭ nau jaroj. Antaŭe entute mi ne sciis, kio estas Pollando. La plej multe da japanoj konas kaj vizitas nur tiujn landojn, al kiuj eblas flugi senprobleme. Kaj al Pollando de Tokio estas ecx neniu rekta aviadilo. Pri Pollando en niaj informprogramoj oni ne parolas. Vin devus tusxi kataklismo kun rango de atombombo, por ke oni ion diru pri Pollando en novajxoj.

Nin tiuj demandoj mirigas kaj kolerigas - klarigas Abraham el Senegalio. En Afriko neniu demandas, kial iu venis. Poloj demandas, cxar unue ili estas scivolemaj. Due, cxar havas kompleksojn. Precipe Bydgoszcz-anoj. Ne lokigxas en iliaj kapoj, ke iu volas vivi en urbo, en kiu lau iliaj opinioj nenio okazas. Estas ankaŭ tiuj, kiuj demandas, cxar volas sin plivalorigi. Ili atendas nur tian respondon, ke vi havas ekz. belan arkitekturon.

Kaj ni kontraŭdiras cxiam same - ke vi havas belajn virinojn sxercas Okparaebo el Nigxerio, ridante senceremonie.

Kial ili lernas Esperanton? Gxi estas lingvo super cxij disdividoj, super kulturo, nacienco, religio. Esperanto kreigxis en Bjalistoko por ligi konfliktitajn kulturojn, kaj ligas la kulturojn gxis hodiaŭ. Estas facile gxin lerni por cxij nacioj. Esperantistojn de la tuta mondo ligas cxeno de amikeco. Se vi volas ien veturi, en cxiu lando vi trovos esperantiston, kiu vin gastigos ili diras. Por Afrikanoj estas malfacile sidi samloke. Ecx dum la interparolo senkonscie ili tamburas sur tablo. Dum diskotekoj en kluboj Savoy Deja Vu Trip kaj Kredens ili furoras. Precipe en virina kompanio cxij knabinoj volas kun ni danci, cxar ni havas senton de ritmo kiel neniu polo ili laudas sin. Dum arangxoj ili preferas tamburi ol drinki cxe baro. Sed ne eblas diras Abraham. Cxar poloj cxiam kun mi volas drinki. Dum arangxoj fremdaj homoj proponas al mi hektolitrojn de brando. Se kun polo vi drinkos brandon vi estas gravulo- gasto. Sed se vi volas tamburi trinkante teon - vi estas malviro.

Luj sercxas en Pollando edzinojn, Abdulaye el Senegalio fratinojn, kiu lin komprenos, Moses Simon Gabagambi el Tanzanio havas polan amikinojn en Bjalistoko, lulilo de Esperanto. Sxi estas blondulino kun bukloj kaj studas belartojn. Sxi invitas lin hejmen por cxij festoj kaj feriadoj. Antaŭ ol Simon venis al

Bydgoszcz, li studis en sia lando. Sed studado estis por li tro multekosta. En Pollando por unu studjaro pagas nur malpli ol 1000 zł (cx. 250 Euro). En Tanzanio li devus elspezi almenau kvarfoje pli multe.

La tempo pasas malrapide

Lau perspektivo de europano Simon estas lozulo. En lia mondo nenio estas certa kaj cxio povas cxiumomente sxangxigi nur tial, ke iu sxangxis opinion. En lia lando ofte mankas akvo, pano, elektro, interneto, autobuso, se demandi kial - audigxas tial simple, cxar ne estas. Kiam oni demandas kiam estos, oni ricevas frustran por europano respondon: oni ne scias. Por li kaj liaj afrikaj kolegoj el Senegalio, cxu Nigxerio ne gravas kalendaro kaj horlogxo.

Poloj planas sian tagon lau minutoj. Ili ne promenas, sed kuradas. Mi ne scias, kion ili postkuras li ekpensas - cxe ni la tempo fluas malrapide. Vi vekigxas, promenas, ripozas, dancas. Labori tro longe ne eblas, cxar estas tro varme aldonas Abraham.

Simon planas esti laborema. Kiam finos studojn en Pollando intencas reveni al Tanzanio kaj fondi turisman oficejon. Ni havas cxe ni belan Nacian Parkon Serengeti, kiu certe estas turisma atrakcio por europanoj li opinias. Li volas invitadi precipe fanojn de Esperanto. Li estas certa, ke scioj, kiujn li akiras en ISTK en Bydgoszcz kaj kultur-kontaktoj, kiujn li spertas cxiutage helpas al li estontece en kontaktoj kun turistoj. Mi ekkonis tie-cxi mentalecon de kelkaj nacioj, dankal kio mi scios kiel akcepti turistojn, per kio ilin nutri kaj kiamaniere kun ili konduti, por ke ne ofendi ilin kaj ne fari faux pas.

Simon ne volas resti en Pollando por cxiam, cxar por li estas cxi-tie tro malvarme kaj multekoste.

Cxe ni kilogramo da bovajxo kostas 4 zł (cx. 1 Euro) cxe vi 25 zł (pli ol 6 Euroj), krome mi ofte kuradas al kuracistoj, cxar pro malvarmo mi malvarmumigxas. Pro malaltaj temperaturoj ne mirigas min, ke poloj tiom multe drinkas. Mirigas lin la partneraj rilatoj, kiujn observas en Pollando. Cxe ni ne eblus, ke edzo kuiru kaj sxangxu vidojn por infanoj. Cxe ni virino estas por kuirado, lavado, gladado. Mi ne scipovus kiel polo.

En Biskupin kiel hejme

Esperantistoj dum feriadoj veturas tra Pollando kaj prelegas pri siaj landoj. Ili instruas ankaŭ svahilli lingvon. La plej placxis por ili restado dum arkeologia festivalo en Biskupin. Ili laboris tie kiel volontuloj. Ili helpis argilglui kaj elfajradi ujoj el argilo, ili gvidis muzikajn lecionojn por infanoj. Ni sxokigxis, ke praa pola kulturo havas tiom multe komunan kun nia nuna realajxo. Malnova Biskupin estas kiel Afriko hodiaŭ. Ni sentis sin kiel hejme mangxante tie en argilaj ujoj la sxafan bakajxon faritan cxe fajro.

Tiu sperto de kuirado daŭre cxe ni funkcias klarigas Abraham.

Eksterlandanoj havas, problemojn kun logxado en Bydgoszcz. Pli multaj studentaj domoj ne volas akcepti eksterlandanojn, cxar havas kroman nepagitan malfacilan laboron. Pluraj devis sxangxi studentajn



domojn. En studentaj domoj estas problemoj kun eksterlandanoj pro aliaj kutimoj aldonas Andrzej Grzebowski. Ekzemple gecxinoj pendigas en fenestroj

subpantalonojn, subcxemizojn lav- kaj lit- tukojn. Tio en Cxinio estas normala. Al afrikanoj oni ne permesas kuiri, cxar odoroj estas aliaj ol en studenta mangxejo. Cxinaj studentinoj bele ornamis siajn cxambroj per koloraj paperfloretoj. Bele aspektis, sed poste renovigo de cxambroj kostis kelkcent Euroj. Gxenerale studentaj domoj ne estas bone preparitaj por akcepto de eksterlandanoj, cxar estas preparitaj por poloj.

La gestudentoj havas problemon interkomprenigxi en studentaj domoj kun edukistoj, kiuj parolas nek Esperanton, nek anglan. Tamen en la plej bona studenta domo de la Teknikumo por Konstruistoj logxas nun la plej multaj gestudentoj de ISTK tre malmultekoste (ili pagas nun 30 Euroj monate t.e. iom pli ol 1 Euro po nokte).



Multaj esperantistoj-studentoj de ISTK lernas la polan lingvon. Otabek Rahmatov el Uzbekio parolas jam flue la polan. Li lernis nur dum nau monatoj. Dooh el Kamerunio diras ke de tempo al tempo mi rigardas viajn televidprogramojn. Ni scias ankaŭ, ke vi havas elektojn. Sed politiko min ne interesas. Ni komprenas nur, kiu estas anasoj, cxar en cxiu televida kanalo ili montras siajn vizagxojn. Kaj vian Prezidenton de la urbo Bydgoszcz Konstanty Dombrowicz ni konas de la urbaj arangxoj. Ni sxatas lin, cxar li tute bone konas Esperanton.

www.esperanto-turismo

Kie pagi la kotizojn por AIS?

Kara Kolego.

Ni bone ricevis vian informon kaj datenon pri studentoj. tamen ili devas (aux vi devuis mem) pagi por la studentaj legitimiloj al kol Skonieczko Jan- kiu laux promeso enmetas la monon pere de UEA konto al AIS. Alimaniere tio estas tre kosta kaj komplika, precipe ke en PL 50 centoj- en neniuj kantoro oni sxangxu (perdas) kaj doni la validecon en zl- estas komplika. Pagado en zl- povas esti perdebla por ambaux flankoj. En oktobro okazos AIS Studadseio den Bydgoszcz deniove- do cxuiuj viaj albanaj studentoj novaj kaj tiuj kiuj strebas al magistrecio kaj estas en PL devas esti kaj partopreni.

amike Alicja kaj Dieter b

Pligxustigo

Atilio Orellana Rojas

Estimataj kolegoj:

Sxajne estis eraro en la adreso sendita al vi antaw kelkaj tagoj. Jen mi sendas al vi la gxustan

http://www.ilei.info/pdf/lpr073_jijijRX_wrKKOJIOH_awqwtrhdklfuloOjmZhk.pdf

Kun pardonpeto kaj bondeziroj pri bona legado,

Atilio Orellana Rojas

ILEI-Sekretario

Atentigo

Kara kolego, vi promesis ke viaj studentoj partoprenos lekciojn.

Bv sendi al ili kaj ankaux al Herion, Kasim , Ulian direktivon ke ili devas precipe partopreni lekciojn, kaj studadsesion.

Tio ke ili ie laboras estas ilia afero (nigra laboro) kaj ili mem respondecas. Se ili ne venas al lekciojn, mi ne donos al ili studentajn legitimilojn.

Antaux kelkaj monatoj estis en PL kaj poste ecx en Munkeno en konsulejo-granda kverelo cxar cxinaj studentoj, kiuj venis studi al Bydgoszcz kaj de ni ricevis studentajn legitimilojn - provis nelegale transiri limon.

Ili cxiuj jam ne plu estas en Bydgoszcz- estis deportitaj.

elkore salutas vin Alicja Lewanderska

29 Pola AIS Sesio en Bydgoszcz 26.10 30.10.2007

Oktobre 2007 post la 28 Pola AIS Sesio komencigxis por gestudentoj el Afriko. Ameriko, Azio kaj Europo en Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo AIS Kleregejo Bydgoszcz (AKB) cxiutaga 10 leciona studado de lingvoj, turismo kaj kulturo. Dum kvar semajnoj temon Turismo en la mondo (kvin kontinentoj) gvidis ASci Andrzej Grzebowski kaj temon Esperanto kaj Muziko gitara dueto VALDO Valery

Khramov (Kazakio) kaj Dooh Mwelle (Kamerunio). Krome cxiutage okazis 6 lecionoj de lingvaj kursoj kaj pri Esperanto kulturo.

La 26 an de oktobro gestudentoj de ISTK veturis al. Poznan por viziti TOUR SALON 2007 kaj kolekti materialojn por iliaj diplomlaboroj. Post vizitado de Poznan vespere s - ino Ilona Koutny renkontis la ISTK gestudentojn en Universitato de Adam Mickiewicz kaj prezentis Lingvistikajn Studojn. Cxiuj deziras ilin partopreni, se la datoj de sesioj estus aliaj el tiuj de ISTK/AIS kaj se ili havus suficxan monon.

La 27 an de oktobro OProf. Remigiusz Mielcarek gvidis interesan AIS kurson pri trampado en Azio kaj la 28 an AProf. Aleksandra Kowalczyk gvidis tradician Seminarion bakalauran magistran de AIS.

Dum 27 - 30.10.2007 EProf. Alicja Lewanderska gvidis tri AIS kursojn pri germanalingvaj landoj, pri germana kulturo kaj pri naturkuracado helpe de ASci Mirosława Zielinska kaj ASci Jacek Zielinski.

La Sesioj kompletigis kursoj de mag. Julita Kurek pri Esperanto kaj kulturo kaj de mag. Alojzy Szulc Pola lingvo por eksterlandanoj.

Al. 10 novaj AIS gestudentoj oni enmanigxis legitimilojn (nun en Bydgoszcz studas en AIS pli ol 50 ISTK gestudentoj). Ankaŭ prezentigxis dueto VALDO kaj ensemblo AFRIKA UMBA

INTERNACIA STUDUMO PRI TURISMO KAJ KULTURO

Klerigejo de AIS en Bydgoszcz

str. M.Skłodowskiej-Curie 10, 85-094 Bydgoszcz, Pollando,

tel./fax: (+48-52

e-mail: stud@esperanto-turismo.org, www.esperanto-turismo.org

Top of Form

Gramatikajxoj el la nova numero de IPR

Prononco kaj signifo de la silabo aŭ,

misuzo de antaŭvokala ŭ anstataŭ w,

dezirindeco enkonduki w en la alfabeton de Zamenhof

Ni intencas studi la diftongojn formatajn per ŭ kaj per vokalo (a, e, o) kaj klarigi ilian prononcon laŭ la konataj tekstoj. Klasike ekzistas du diftongoj, nome aŭ kaj eŭ. La evoluo aperigis trian, oŭ !

Ni komencos ekde la apero de ŭ en Pra-Esperanto (PE) kaj konstatos la vokalecan devenon de tiuj diftongoj;

Ni studos la Fundamentan Gramatikon (FG) laŭ ties kvin lingvo-partoj : a) la Franca : F.; b) la Angla : A.; c) la Germana : G.; d) la Rusa : R.; e) la Pola : Pl. ;

Ni intermetos parton pri la u-hiato : tiel per opozicio ni pli bone komprenos la diftongojn ;

Ni informiĝos pri la evoluo en la uzado de ŭ ;

Sublime de internacieco ni demandos nin pri la rilatoj inter ŭ kaj w. Ĉu entute w povus esti enkondukita en nian alfabeton ?

Ni, kiam necese, donos prononc-helpon laŭ la Mondaj Grafioj (MG). Por tio ni uzos majusklojn inter rektaj krampoj (Albault, 2007-03) : tien vizitu kaj vidu difinon de MG.

✕ 1 ✕ Apero de aŭ en Pra-Esperanto

En Pra-Esperanto ni ĉeestas la kreadon de nia lingvo tra la diversaj hezitaj kaj punktaj solvoj de la Iniciatoro (Waringhien, 1959).

Ni tiel, ekz-e, vidas la aperon de novaj literoj : dekstrakornaj vokaloj kaj konsonantoj : á, ó, ś, ź, ktp. Poste nur la konsonantoj restos. Prenitaj el la Pola, tiuj ĉi karakteroj konservas nur ties formon, sed signife parencas al la Slavaj bikornoj : ć = ĉ = ĉ, ś = ŝ = ŝ, ź = ŝ = ĵ.

Pli grave aperas vortoj, kiuj poste modifiĝas aŭ tute ŝanĝiĝas ! Tie interesas nin iuj "femenaj" vortoj, kiaj puettaŭ, knabineto, princaŭ, princino. En la unua ni rekonas diminutivon (-ett) de la Latina puer !

En ambaŭ la sufikso -aŭ markas feminenon kaj do ekivalentas al nia -in. Tion demonstras, se necese, la peco "Balladdo" per la unua verso : "Mo bella [redžiĉaŭ] princino il sonto vidá" (Mi belan princinon en-la sonĝo vidadis); Zamenhof per la forstrekita variaĵo, kiu videble egalas al "reĝidino", montras sian heziton inter la du sufiksoj. La unua -in estas evidente eltirita el la Germana (Prinzeßin, Princino, Lehrerin, instruistino); sed pri aŭ nenio evidentas !

Poste li uzos filino kaj ĝian ekivalenton filaŭ, kaj eĉ formojn kiaj mortagaŭ = mortintino, koŝanaŭs, korteganinoj ! Sed tiu sufikso pro sia ne-normeco apartiĝas de la aliaj, postulante apartan pluralon

(princaŭs), ĝi tamen akceptas la tiaman akuzativon (princaŭl, princinon). Ankaŭ tiu ĉi -l konkurencas kun nia -n ! Sed la fina prefero al ĉi-lasta kuntrenos la forigon de la nenorma sufikso por la femineno . . .

De kie venas tiu sufikso aŭ ? Ni povas hipotezi kun granda probablo, ke Zamenhof, konstatinte, ke multaj virinaj antaŭnomoj finiĝas per -a (Maria, Jozefa, Anna, Emma . . .), bedaŭris, ke tiu finaĵo ne estas uzebla pro la adjektivoj ! Feliĉe -aŭ pligrandigis la finaĵ-liston.

Pli poste la silabo aŭ aperas en aliaj uzoj : laŭ, kaŭ, Aŭgusto = laŭ, apenaŭ, Aŭgusto. La du unuaj estas de Germanaj etimoj : laut, kaum.

Tiuj du vortoj debutis la serion de la aŭ-finaj vortoj. Pri ili aludas la Iniciatoro en letero al Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko pri la Deveno de Esperanto. En ĝi (PVZ-2, p. 927-8) li skribas pri la teoria preteco de sia lingvo en 1887, kaj kompare pri ĝia praktika nepreteco :

"Multon mi devis ĉirkaŭhaki, anstataŭigi, korekti kaj radike transformi. Vortoj kaj formoj, principoj kaj postuloj puŝis kaj malhelpis unu la alian, dume en la teorio, ĉio aparte kaj en mallongaj provoj, ili ŝajnis al mi tute bonaj. Tiaj objektoj, kiel ekz. la universala prepozicio "je", la elasta verbo "meti", la neŭtrala, sed difinita finiĝo "aŭ" ktp kredeble neniam enfalus en mian kapon teorie."

Ni konstatas, unue ke la duonvokalo ŭ formis la diftongon aŭ; poste aperis eŭ, longe pli poste ankaŭ oŭ ! Plie ke tiu diftongo kontribuas al pligrandigo de la vokalaro; tre bonvena fakto en lingvo, en kiu tiom abundas signifaj vokaloj en finaĵoj kaj aliaj gramatikiloj.

⌘ 2 ⌘ Klarigo de aŭ en la Fundamenta Gramatiko

En la Fundamenta Gramatiko Zamenhof donas pri la prononco de ŭ klarigojn adaptitajn al ĉiu lingvo. (Zamenhof, 1963)

En la Franca li difinas ĝin jene : "ou bref (dans l'allemand "laut"), t.e. : "kurta u kiel en Germana laut" [LAUT];

En la Angla : "u as in mount (used in diphthongs)", t.e. "u kiel en mount [MAUNT] (uzata en diftongoj)" ;

En la Germana : "kurzes u", t.e. "kurta u" ; kun aldona klarigo : "u - wie das kurze "u" in "glauben" (wird nur nach einem Vokal gebraucht)"; t.e. "u - kiel la kurta u en "glauben" [GLAU B.N] (uzata nur post vokalo)" ;

En la Rusa : "у (краткое)" t.e. "u (kurta)" ; kaj inter aliaj rimarkoj : "буква ъ (которая употребляется только после гласной), произносится как короткое u в немецком слове kaufen или в латинском laudo." T.e. "La litero ŭ (kiu estas uzata nur post vokalo) prononciĝas kiel kurta u en la Germana vorto kaufen [KAU F.N] aŭ en la Latina laudo [LAU DO]."

En la Pola : "u (krótkie)", t.e. "u (kurta)".

Se resumi, ĉiuj lingvoj difinas ŭ kiel kurtan vokalon. Escepto estas la Angla, kiu kompanse diras, ke ŭ estas uzata en diftongoj. Tri el ili (F. G. R.) donas ekzemplojn el la Germana lingvo : laut, glauben, kaufen. La Rusa krome aludas la Latinan per laudo. La Germana same kiel la Rusa insistas, ke ŭ estas uzata nur post vokalo.

Tio konfirmas, ke nia litero reprezentas duonvokalon [U]. Tio minimume ne konsilas la uzadon de ŭ antaŭ vokalo. Aliparte oni scias, ke Washington fariĝis en E-o : Vaŝington, kiu cetere estas la ĝusta transskribo de la Rusa Вашингтон kaj de la Pola Waszyngton [VA SHING TON].

Sekve la personoj, kiuj uzas ŭ antaŭ vokaloj ne povas aserti, ke ili obeas la Fundamenton aŭ ke ili respektas la instruojn de Zamenhof.

⌘ 3 ⌘ Komparo kun la hiato a'u

Pro difino hiato estas kombino de du vokaloj disigitaj de silabo-limo. Ĝi estas la rekta kontraŭo de diftongo. Tiu ĉi konsistas el unu silabo, en hiato la du vokaloj apartenas al du silaboj.

En diftongo (aŭ, eŭ, oŭ) la akcento eventuale trafas la vokalon (a, e, o), sed ne la duan literon. La akcento neniam trafas ŭ. Ĝi cetere ne estas vokalo ; nur la dua vokalo ekde la vortfino povas esti trafita. Male en hiato unu aŭ la alia el ambaŭ vokaloj povas porti la akcenton.

Memorinda ekzemplo : Saulo fariĝis Paŭlo. La akcento estas sur la u de Saulo, sed sur la a de Paŭlo.

Sed lernanto povus opinii, ke en Saulo iu eraris, forgesante la kronon de sur u ! Tial bona pedagogia helpo povus konsisti el la intermeto de apostrofo : Sa'ulo ; ĝi konkrete atentigus pri la hiata naturo !

Tamen tio ne estus tre necesa, ĉar ekzistas nur minoritato da vortoj entenantaj hiaton konfuzebla kun diftongo. Plej multaj hiatoj koncernas diftongojn kun i, akcenta vokalo (radio, poezio) ; tiuj ne estas koncernataj.

Estas koncernataj nur manpleno da radikoj (Albault, 1988) :

Ses hiatoj a'u : Emauso, jesaulo, Kapernaumo, Raulo, Saud-Arabio, Saulo ;

Sep hiatoj e'u : Aleutoj, geumo, Kreuza, oleumo, Reunio, Seulo, tedeumo ;

3)-Unu hiato o'u : noumeno.

Do entute 14 vortoj (en PIV) prezentas hiaton kun u. Kompreneble oni enkalkulu kun ili la hiatojn aperantajn okaze de kunmeto radika aŭ elementa : poste'ulo, ktp . . . Ili malmultas !

Komparu kun la vortoj entenantaj ŭ-diftongon (en PIV) !

diftongo aŭ : 268 kapvortoj ;

diftongo eŭ : 114 kapvortoj ;

diftongo oŭ : 9 kapvortoj.

Do pluraj centoj da vortoj kun ŭ-diftongo, sed entute nur dudeko kun u-hiatio ! Alidire 391 kapvortoj de PIV entenas la literon ŭ, sed tiu litero estas luksa, ĉar se ĝi ne ekzistus, ĉio estus tamen perfekta, kondiĉe ke oni parkeru la esceptojn ; nome la dudekon da vortoj kun hiatioj.

Oni venas al la konkludo, ke se ni konkrete markus la u-hiatiojn, ekzemple per apostrofoj, ni povus tute ne uzi la kronon sur ŭ !

Tiu ŭ do efektive estas luksa litero kaj tio pravigas Zamenhofon, kiu en la Fundamento koncedis help-alfabeton, kiu simple neglektas la kronon !

Cetere li ankaŭ donis regulon por la uzado de tiu help-alfabeto :

Regulo de Zamenhof : skribu "per la litero h anstataŭ la signeto ^, kaj anstataŭ ŭ estu uzata simpla u, kiu post vokalo ĉiam devas esti legata kiel ŭ. En la tre maloftaj okazoj, kiam h post la literoj c, g, h, j, s, aŭ ŭ post vokalo, devas esti elparolataj memstare, ili devas havi antaŭ si apostrofon aŭ streketon (-)." - (PVZ - 3, p. 2029).

Dank'al tiu regulo la Fundamenta Help-Alfabeto estas strikte ekvalenta kun la Oficiala Alfabeto, kiu ĉiam preferindas. Zamenhof ja estis la plej bona konanto de sia lingvo eĉ en tiaj detaloj.

⌘ 4 ⌘ Evoluo en la uzado de ŭ :

Finfine ne okazis granda evoluo !

Ni cetere jam konas ĝian plej gravan eron : nome, la aperon de la tria ŭ-diftongo. Nome, oŭ ! Efektive en PIV aperas poŭpo kiel ekvivalento de pobo. Aperas ankaŭ ok aliaj vortoj kun la sama diftongo ; sep el ili estas provoj esperantigi Ĉinajn nomojn kaj de unu provinco : Gujĝoŭ kaj de ses urboj : Fuĝoŭ, Ĝengĝoŭ, Hangĝoŭ, Hankoŭ, Lanĝoŭ, Suĝoŭ. La oka apero nomas popularan Ĉinan kaj Japanan manĝaĵon, specon de kazeo el fabolakto, la toŭfu. En nPIV ĉiuj reaperas escepte Hankoŭ, kies nomo lasis lokon favore al Vuhano (Wuhan) [WU KHAN].

Resume estas nur du tiaj vortoj en PIV. Pri la Ĉinaj urbonomoj ni rajtas esti skeptikaj pri ilia transresto en nia lingvo, ĉar de post adopto de pinyin, oficiala transskribo de la Ĉina al Latinaj literoj, tiu nova skribo fariĝis universala kaj jam estas uzata en Okcidentaj publikaĵoj. Aliparte instaligas tendenco ĉiam kaj ĉie respekti la aŭtentajn (naciajn) nomojn . . .

Ankaŭ en Esperanto mem tiu tendenco ekzistas : nur foliumu la listojn de la Universalaj Kongresoj de 1905 ĝis niaj tagoj. Vi konstatos fluktadon, kun evidenta prefero al la aŭtentaj nomoj en la pli freŝdataj eldonoj. La Jarlibro de 2006 ekzemplodonas : ĉiuj urbonomoj estas aŭtentaj kaj tute korektaj, eĉ kun la ĝustaj supersignoj.

Ĉu aperis pluaj vortoj kun tiu nova diftongo ?

Ni demandu la verkon "Nepivaj Vortoj" (Cherpillod, 1988). Tie efektive aperas kelkaj nomoj : broŭningo (ia pistolo), momoŭaro (ia hararanĝo), oŭto (Angle out), strajkoŭto, surpoŭpo . . . kune kun propraj nomoj : Doŭro (Ibera rivero), Ĝoŭ (ĉina dinastio), Ĝoŭ Enlaj (Ĉina ŝtatestro), Jeloŭstono (parko Yellowstone), Vengoŭo (urbo Wenzhou).

En tiu riĉa minejo ni renkontis ankaŭ hiaton : Houstono (uni-ŝtata urbo) , krom pluraj izolaj uzoj de ŭ : lago biŭa, monunitoj : ekŭelo, jŭano kaj fine 10 kapvortoj (p. 169) kun inicialo ŭ ! nPIV transprenis neniun, sed donas nur unu alian, ŭato ! Ni revidos tion en nia lasta parto !

En la "Neologisma Glosaro" (Vatré, 1989), la aŭtoro donas kelkajn vortojn "spikumitaj sur diversaj kampoj de nia literaturo kaj leksikologio". Ni tie renkontis : ahoŭ (interjekcio), broŭningo, haloŭ ! (telefona interjekcio), oŭ kej ! (prave !), oŭt (ekster) . . . Do listo multe pli eta en verko malpli granda sed tute turnita al difinado de la novismoj.

✕ 5 ✕ Iniciala ŭ aŭ nova litero w ?

Unue ni kolektu kelkajn opiniojn :

✕ 1) Sur la paĝo 174 de "Nepivaj Vortoj" (Cherpillod, 1988) ni trovas demandon neformulita, kiu tekstas jene :

w (litero nefundamenta, kiu faciligus transskribon de anglaj aŭ ĉinaj vortoj) CV

La duliteraĵo resendas al la "Enciklopedia Vortaro" de Charles Vérax. Tiu efektive estis en la periodo antaŭ 1914 unu el la subtenantoj de tiu plia litero.

α 2) Pli da informoj donas PIV (Waringhien, 1970) kaj jen la enhavo de kapartikolo sur paĝo 1162 :

*ŭ 1 La 26a litero de la E-a alfabeto. 2 Malantaŭa duonvokalo, aŭdiĝanta nur post alia vokalo (ekz.: aŭdi, leŭtenanto). Rim. Tiun literon oni uzas ankaŭ por la fonetika figurado de la konsonanto, kiu aŭdiĝas komence de certaj anglaj, japanaj k.s. vortoj (ekz. en : ŭajt-insulo, ŭakamacu, ŭagadugu, ŭu-han ktp) , k kiu estas propre voĉa duonfrikativa labialo. La normala E-a transskribo estas v (Vaŝington), sed por pli ĝusta prononcado de propraj aŭ teknikaj nomoj k evitado de kelkaj homonimoj Moch, Vérax, Tellini k.a. provis enkonduki novan literon, w (wato, westo).

Sur la sekva paĝo oni trovas ĉe la kapartikolo *v. jenan aldonon :

*~o. Nomo de tiu litero. duobla, ĝermana ~o. Nomo de neesperanta, latinalfabeto litero, kun la formo W, w, k la prononco iom simila al ŭ; ĝi estas uzata i.a. (majuskle) kiel simb. de volframo, uesto ; (minuskle) kiel mll de vatto. → ŭ Rim.

α 3) La nova Ĉefredaktoro de nPIV (Duc Goninaz, 2002) forigis la unuan citon kaj sobre anstataŭigis la duan per :

*~o. Nomo de tiuj fonemo k grafemo. duobla aŭ ĝermana ~o. Nomo de neesperanta grafemo, kun la formo W, w, (prononcata v aŭ ŭ, depende de la lingvoj), uzata i.a. : (maj.) kiel simb. de (K) Volframo, □ vato.

α 4) Sian penson Waringhien (1980) sendepende donis en siaj Eseoj "1887 kaj la sekvo . . . " sur paĝo 96 (piednoto 9) jene :

"Eble kelkaj akomodaj rimedoj, kiel la utiligado de la fundamentaj digramoj ch kaj sh, la konservado de la duoblaj konsonantoj (Kp. Ŝillero en la Fundamenta Gramatiko) kaj la provizora (?) enkonduko de la nova litero W por anstataŭigi la majusklan ŭ en vortkomenco, faciligus la esperantigon de pluraj propraj nomoj, gardante ilian internacian aspekton : ekzemple Chesterfildo aŭ Churchillo, Sheffildo aŭ Shellejo, Washingtono aŭ Wellso (eĉ se, en iaj okazoj, tio iom misformus la nacian prononcon, ekzemple en Chikago aŭ Cherburgo).

α 5) Fine pro spertado en siaj multaj leksikologiaj laboroj Cherpillod (2005) en sia klera "Etimologia Vortaro de la Propraj Nomoj" en la enkonduka paragrafo dediĉita al la prononco donas jenan noton :

"Oni notu, ke mi uzas y por la esperanta sono [j] (por eviti konfuzon kun la angla j, prononcata [ĝ]) kaj w por la angla sono [w] ĉar la esperanta ŭ estas fakte la dua parto de diftongo, kaj malbone taŭgas por noti tiun konsonantan sonon).

Estu permesite al mi afable prezenti kelkajn mildajn kritikojn kontraŭ tiuj kvin opinioj :

Al 1) se estas certe, ke la Angla kaj la Ĉina uzas la literon w, dum ili mem superas la aliajn lingvojn, la dua parole, la unua per aŭtoritato kaj diskonateco, ili tamen ja ne solas en la mondo ! El la aliaj grandaj lingvoj (kun pli ol 50 milionoj da parolantoj) multaj estas konataj kiel uzantoj de w [W] en sia skribo aŭ sia transskribo (Albault, 2006) : nome la Araba, Hinda, Indonezia, Japana, Java, Kantona, Korea, Maratha, Panĝaba, Tagaloga, Telugua, Thaja, Urdua . . . Ne parolante pri la Franca kaj aliaj, kiuj okaze uzas w kun la signifo [W].

Inter lingvoj parolataj de malpli ol 50 milionoj sed de pli ol 5 kaj uzantaj w [W] en sia skribo aŭ transskribo, ni trovas en :

Afriko : almenaŭ 11 lingvojn, Amhara, Haŭsa, Kikuju, Lingala, Oromo, Fulbea, Ŝona, Swahila, Wolof, Yoruba, Zulus . . .

Ameriko : Ajmara, Gvadelupa Kreolo, Quechua . . .

Azio : Baluĉa, Birma, Kannada, Kurda, Nepala, Orija, Persa, Poŝtua, Sindha, Sinhala, Tibeta, Zhuang . . .

Oceania : Bisaja . . .

Restas la multnombraj lingvoj malpli parolataj . . .

Do w [W] ja estas internacie tre konata litero !

Aliparte oni sciu, ke w [V] troviĝas praktike nur en Centra Eŭropo t.e. en la Pola kaj Germana (kaj aliaj kontinentaj Ĝermanaj : Nederlanda, Skandinaviaj). Plus kelkaj izolaj lingvoj : Albana, Finna, Hungara . . .

Al 2) Waringhien ĝuste prezentas la aferon : estas du sonoj proksimume similaj, unu estas duonvokalo, la dua labiala konsonanto ! Aliparte la konsonanton en Esperanto oni "normale" prezentas per v ! Sed por pli ĝusta prezento de nomoj oni provis enkonduki w !

Efektive per w oni respektus kaj la sonon kaj la aspekton de vortoj kaj ĝia enkonduko farus nian lingvon pli internacia kaj pli facila . . .

Al 3) w estas prononcata v aŭ ŭ depende de la lingvo ! Ja ! Sed unue estas prisilentita la fonetika diferenco klarigita de Waringhien ! Due ni ne estas informitaj pri la reala situacio de w en la mondo.

Oni sciu, ke w = [V] troviĝas precipe en Centra Eŭropo, sed ke principe w = [W] do iomete simila al ŭ, estas konata ĉie aliloke en la mondo. Tio signifas, ke enpreno de w faciligus la uzadon de Esperanto : oni pli facile rekonus la proprajn nomojn el la tuta mondo : sone aŭ bilde.

Ekz-ojn pri tio donas Cherpillod en "Nepivaj Vortoj" : Ruvenzero (monto) Ruwenzoro, Seravako (urbo) Serawako, Svanviko (urbo) Swanwiko, Vagaduguo (urbo) Wagaduguo, Vajt (urbo) Wajt, Vindhuko (urbo) Windhuko, Vinipego (lago) Winipego . . .

Eblus diri, ke misuzo de v por w estas pagata per malfacilo kompreni, sed tio povas okazi ankaŭ kun ŭ misuzata por w, kiel en chi ekzemplo : ŝeŭao por ŝewao, Hebrea apenaŭ elparolata vokalo. Tie ĉi oni povus konsideri la silabon ŝeŭ sekvata de du aliaj vokaloj a o : tio estus klimakso de miskompreno ! Misskribo miskondukas al misprononco !

Sed se iu prave insistos pri la lego de ŝeŭao kiel [SHE WA O] , ni devos rimarkigi al li, ke tio rekte kontraŭas la regulojn de nia prononco ! Oni skribas eŭ, sed prononcas [E WA] !

Kompreneble ekzistas ekzemplo en nia literaturo ! Ĉu aŭtoroj rajtas libere fuŝi nian lingvon ? Ĉu ni devas ilin aprobi en iliaj eraroj pro tio, ke ili riĉigis nian literaturon ? Mi aludas al libro titolita "Kumeŭaŭo" : skribe la diftongoj aperas, sed oni aŭdas neniun [KU ME WA WO]!

Al 4) La rimarkoj de Waringhien ŝajne aprobindas. Ne nur pri w; sed entute. Mi nur preferus paroli pri ŭ en silabkomenco, ol en vort-komenco. Sed la aludo al la vortkomenco malkaŝas la konstaton, ke ofte ne estas havebla la karatero Ŭ majuskla ! Pro tio li citas proprajn nomojn de urboj, ktp kun minuskla inicialo en PIV.

Al 5) Fakte la du literparoj cititaj de Cherpillod tute ne estas kompareblaj :

Y kaj j estas samprononcaj [Y], se ĝuste uzataj, ĉiu en sia tereno !

Male w kaj ŭ estas malsamaj, duonvokalo kaj konsonanto. Ili iome iele supraĵe similas . . .

Fakte ŭ, se anstataŭ w, estas nura brikolaĵo, ne inda je nia lingvo. Tiu brikolaĵo draste kaj malinde substrekas la artefaritecon de Esperanto. Plie ĝi efektive anstataŭigas tute internacian staton per nenie ekzistanta strukturo. Ĉu ni diru "adiaŭ" al la internacieco de Esperanto ?

Aliparte la prononco [Ĝ] = [DZH] por la litero j ne estas nura Anglaĵo, sed ja fakto tre internacia. Ĝenerale la litero j reprezentas kvin malsamajn sonojn, nome [J] = [DZH], [ZH], [KH], [TZH] kaj [Y] :

[J] = [DZH] ne nur en la Angla, sed ankaŭ en multaj lingvoj de Afriko, Azio kaj Oceanio, inter kiuj troviĝas latinskribe la Indonezia, la Swahila, aŭ transskribe : la Araba, Bengala, Japano, Persa . . . La Ĉina havas malsaman sed proksiman sonon [TZH] skribitan j en pinyin.

[ZH] troviĝas en kelkaj lingvoj : ĉefe en la Franca kaj Portugala.

[KH] en la Hispana.

[Y] troviĝas nur en Centra Eŭropo : ĉefe Ĝermanaj kaj Slavaj.

KONKLUDO

Tiel farante Cherpillod esence pravis. Efektive per tio vole-nevole, scie aŭ senscie, li uzis la elementojn de la Mondaj Grafioj, kiun aliloke mi (Albault, 2006) difinis jene :

Difino : « La Mondaj Grafioj estas la aro de grafioj - uzataj en diversaj lingvoj, tiel same kiel en diversaj transskribo-sistemoj - kiujn oni trovas identaj en tiuj lingvoj aŭ tiuj sistemoj, dum ili tie reprezentas la samajn sonojn. »

Ni konkludos, ke la silabo aŭ estas grava komponanto de la Esperanta fonologio ! Ĝi ekzistas en multaj lingvoj, kiuj ĉiam sendiakrite skribas ĝin au : la sola Angla skribas ĝin aŭ ow aŭ ou.

Notu, ke nia konjunkcio "aŭ" troveblas en Afrika lingvo, nome la Swahila : "au", verŝajne devenanta el la Araba "aw" Tiu ĉi lingvo ja liveris multajn etimojn al tiu nova Afrika "esperanto" ! Super ĉio ni aludu la samsignifajn Latinan "aut" kaj Indo-Eŭropan "au", kiu aliparte lasas supozi la delongan ekziston de la silabo mem (Grandsaignes, 1948).

André ALBAULT (2006-11-07)

* * *

NOTOJ

Femineno (el Franca féminin). Gramatika genro, kiu en dugenra klasifiko oponiĝas al maskuleno, kaj kiu en trigenra klasifiko oponiĝas al maskuleno kaj al neŭtro. La femineno ofte, sed ne konstante,

reprezentas la terminon "femalo" aŭ "femino" en la natura genro, kiu apogiĝas sur la seks-opozicio inter "masklo" aŭ viro kaj "femalo" aŭ "femino" (Dubois, 1973). Lingvoj sengenraj estas, ekz-e, Esperanto kaj la Angla; dugenra estas la Franca; trigenra estas la Germana . . .

Karatero (el Itala carattere). Lingva aŭ komputila signo. nPIV indikas, ke "karaktro" estas evitinda, verŝajne (?) pro la amaso da konsonantoj (ktr).

Lingvonomoj. Persista estas nia opinio, ke lingvonomoj apartenas al la klaso de propraj nomoj. Tio evidentas por kelkaj el ili : Latino, Esperanto, Jidiŝo, Sanskrito. La aliaj provizore estas formataj per la artikolo "la" kaj la nacieca adjektivo. Tiun ĉi ni do majuskligas : la Franca, la Angla . . .

BIBLIOGRAFIO

ALBAULT, André, 1985. La kvar alfabetoj, la nia kaj la Presarto. En : Li kaj Ni, Festlibro de Akademio de Esperanto omaĝe al profesoro Gaston Waringhien. Antverpeno - La Laguna : TK-Stafeto, 1985. 520 paĝoj.

ALBAULT, André, 1988. Studo de la nomoj entenantaj unu el la silaboj aŭ, eŭ, oŭ. En paĝoj 49 / 73 de : Akademiaj Sudoj 1988 - 1990. Bailieboro : Esperanto-Press, 1988. 560 paĝoj.

ALBAULT, André, 2006. Les noms propres dans le monde ! Comment les lire à l'aide de "L'Orthographe Internationale" ? (La propraj nomoj en la mondo ! Kiel legi ilin helpe de "La Internacia Ortografio"). 2006-10. TTT de Kavlan. 17 paĝoj.

CHERPILLOD, André : 1988. Nepivaj Vortoj. Eldono de la aŭtoro, 1988. 179 paĝoj.

CHERPILLOD, André : 2003. Konciza Etimologia Vortaro. Roterdamo: U.E.A., 2003. XVI + 503 paĝoj.

CHERPILLOD, André : 2005. Etimologia Vortaro de la Propraj nomoj. Roterdamo : U.E.A., 2005. X + 227 paĝoj.

DUBOIS, Jean, . . . ,1973. Dictionnaire de linguistique. Paris : Larousse, 1973. XL + 516 paĝoj.

DUC GONINAZ, Michel (Ĝen.Gvidanto), 2002. La nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Paris : S.A.T., 2002. 1264 paĝoj. (Referenco : nPIV).

GRANDSAIGNES D'HAUTERIVE, R. : 1948. Dictionnaire des racines des langues Européennes. Paris : Larousse, 1948. XIII + 363 paĝoj.

VATRÉ, Henri, 1989. Neologisma Glosaro. Saarbrücken : ILTIS, 1989. 87 paĝoj.

WARINGHIEN, Gaston, 1959. Lingvo kaj Vivo. La Laguna : Régulo, 1959. 450 paĝoj.

WARINGHIEN, Gaston, (Dir.) 1970. Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Paris : S.A.T., 1970. XXXVIII + 1299 paĝoj. (Referenco : PIV).

WARINGHIEN, Gaston, 1980. 1887 kaj la sekvo . . . Eseoĵ IV. Antverpeno - La Laguna : tk - Stafeto, 1980. 293 paĝoj.

ZAMENHOF, L. L., 1963. Fundamento de Esperanto. Naŭa eldono kun enkondukoj, notoj kaj lingvaj rimarkoj de D-ro Albault. Marmande : Esperantaj Francaj Eldonoj, 1963. 355 paĝoj.

ZAMENHOF, L. L., 1990. Ĝis la Homaranismo. Iom reviziita plena verkaro de L. L. Zamenhof, Originalaro 2 (1896 - 1906). (p. 900 - 1847) Eldonejo Ludovikito, 1990. 1847 + 12 + XXXIV + 42 paĝoj. (Referenco : PVZ-2)

ZAMENHOF, L. L., 1991. Destino de Ludovika Dinastio. Iom reviziita plena verkaro de L. L. Zamenhof, Originalaro 3 (1907 - 1917). (p. 1853/2750). Eldonejo Ludovikito, 1991. 2750 + LII + 39 paĝoj. (Referenco : PVZ-3).

* * *

Kelkaj manieroj (ankoraux) plisubtiligi E-on

E-on ni rigardas sufiche subtila por povi trankvile proponi ghin por la rolo de internacia helplingo. Parolante pri ghia plisubtiligo, mi volas ne tiom forigi mian dubon pri ghia subtileco, ol nur atentigi pri kelkaj pluaj manieroj, kiujn aplikante ni povus igi E-on ankore pli esprimpova. La subtileco de lingvoj mezureblas ne sole law la egzisto/neegzisto, resp. kvanto de vortoj, esprimoj (ech, law tio, chu ilin, se ili jam egzistas, ni entute uzadas aw ne) por la plej diversaj nocioj, sed ankaw law tio, chu lingvaj rimedoj (egzemple strukturoj) ebligantaj la reliefigon de aktualaj gramatikaj trajtoj de verboj, frazelementoj en ghi egzistas aw ne (chu ni ilin entute uzadas aw ne). Se konsideri nian E-on law chi tiu vidpunkto, ni devas konstati, ke ghi estus ankore plievoluigenda. En la ceteraj mi deziras prezenti kelkajn manierojn, rimedojn chi-rilate.

1. La uzo/neuzo de "chi"

En mia gepatra lingvo (la madjara - "hungara"), la ekvivalentoj de chiuj niaj "ti-"-tabelvortoj havas kaj uzighas 2 formoj: unu egalvaloras al niaj tabelvortoj kun, la alia al tiuj sen "chi". Tio chi signifas, ke en la madjara egzistas la ekvivalentoj ne sole de nia (pli-malpli ofte uzata) "tiu chi -

tiu" ("ez - az"), sed anke de "tiam chi - tiam" ("ekkor - akkor"), "tiel chi - tiel" (" - ?uot;) k.t.p., kies formoj kun "chi" en E rigardeblas esence mallegitimaj. Kutimighinte al la konsekvenca aplikado de la 2-forma sistemo en mia gepatra lingvo, mi (kaj probable anke miaj samlingvanoj) chiam sentas agaĉon de lingvosento, renkontante la formojn SEN "chi" en E-aj tekstoj tie, kie mi (pro la lingva interfero) prefere uzus la formon KUN "chi".

Se tio ĉi estus la afero nur de interfero, mi ne menciŭs ĝin, sed la parolo estas ankaw pri tio, ke legante/awdante frazojn/prop-ojn komencighantajn per "tio", "tiu" k.s. mi chiam sentas ankaw perplexighon, nesciante ĉu ili aludas al io/iu antawe menciITa aw menciOTa, kaj ĉi tiam mi atendas la respondan "vortparulon" ("kio", "kiu" k.t.p.), sed ili pleje mankas.

Estas konata ke la difino pri la uzo de "chi" en la Fundamenta Egzerĉaro (?19) atribuas la funkcion de proximigo ĉe monstroj al la vorteto, subkomprenigante montron ne tiom abstraktan ol fizikan (per fingroj k.t.p.). Kvankam ne eksplicite traktinta la abstraktan sencon de la vorto en la Fundamento, Zamenhof kaj pluraj aŭtoroj uzis ankaw ĉi tiusence la vorton tie, do tiel, ke la "ti-" vortoj kun "chi" aludas al io/iu ĵhus menciITa, dum sen ĝi - al io/iu menciOTa. La demonstrativo plej ofte uzata kun "chi" tie estas "tio". Jen kelkaj egzemploj.

"... mi ja nenion vidas! TIO CHI estas ja terura!" (La novaj vestoj de la regho),

"La fino de la mondo estis decidita por ..., pri TIO CHI restis eĉ signo ..." (La fino de la mondo)

Jen un frazo kun uzmaniero de modela valoro por ambaw uzformoj:

"Sed TIO CHI montras nur, ke la naturo zorgis pri TIO, ke ..." (Kio estas vegetarismo?)

Foje-foje tie renkonteblas ankaw "tiu", eĉ "tie" (kun la senco pli abstrakta ol fizika) kun la vorteto:

"En TIU CHI okazo ne la ekbato estus ..." (La fino de la mondo),

"TIE CHI denove komencas montrighi ..." (Esploroj de la maro).

Estas mencienda, ke "tiu" estas vaste uzata ankaw por montri la shanghon de priparolato (egz.: "Jakob alproksimighis al Isaak, kaj tiu lin palpis."). Kvankam la uzo de "tiu" anstataŭ "li/shi" k.s. estas suficĉe redundeca por ĉi tiu funkcio, la uzo de "chi" ankaw ĉi-kaze estus pli esprimpova. En Fundamentaj tekstoj renkonteblas egzemploj ankaw pri ĉi tio. Jen kelkaj el ili:

"Unu cigano venis al pastro peti lin, ke TIU CHI benu lian edzighon."

(Konfeso de cigano),

"Juna homo ... venis ...por serchi helpon che unu sia parenco. TIU CHI lasta donis al li ..." (Malfelicha komercisto).

Estas bedawrinda, ke en modernaj tekstoj la uzo de "chi" tre shrumpighis. Chi tio klarigeblas supozeble per la influo de niaj okcidentaj ges-anoj, en kies E-aj tekstoj ghegenerale trovighas apenaw chi tiu vorteto (eble char la ofta uzo de ekvivalentoj de niaj "chi-vortoj" ne karakterizas ankaw iliajn gepatrajn lingvojn).

Chu estus ne pli valora reveni al la Fundamentaj modeloj?

Johano Petik

Pri la vortakcento en Esperanto

Kiel tio estas konata, la vortakcenton en E regulas regulo tre simpla, nome tiu, laux kiu gxi troveblas cxiam sur la antauxlasta silabo de vortoj. Tiu cxi regulo igas E-on tre alloga, precipe konsidere ke la vortakcento en pluraj lingvoj prezentas unu el la plej grandaj malfacilajxoj de lingvolernado (konsideru ke en la angla gxi estas iom malfacile ellernebla, parte pro tio ke gxi plenumas ecx la rolon de fonemoj: egz. la vorto "increase", prononcite |'inkri:s| rolas substantive (=pliigxo/pliigo), dum prononcite |in'kri:s| - verbe (=pliigxi/pliigi), ecx se cxi tio okazas laux regulo ne komplikita).

Se en la sekvaj linioj mi esprimas miajn kontestojn pri la nuna sistemo de la E-a vortakcento, tion mi faras nur cxar

1. pro sia troa krudeco gxi pruntas la akran guston de artefariteco al E,
2. gxi tro senindulge perfortas la gxeneralan "naturan" prononcmanieron de multaj (precipe internaciaj) vortoj
3. gxi rezultigas monotonecon en la akcentado de cxi tiuj vortoj.

Tio estas des pli valora trakti la aferon, cxar la solvo de la koncentrataj problemoj, escepte de kelkaj kazoj, ne bezonas la malobservon de la Fundamenta akcenta regulo.

La parolo konkrete estas pri la vortoj finigxantaj per "-io" (/"-ia", "-ie") au "-eo", "-iumo", "-umo", eventuale per "-uso" au "-iso". La plej multaj el ili apartenas al la grupo de vortoj kun "-io" (/"-ia", "-ie"), ili nombras

pli ol 250, ni unue do sublupeigu ilin.

Ilia plimulto estas internacia ("delegacio", "Slovakio", k.t.p.), kio ebligas la komparon de ilia akcentado kun tiu en etnolingvaj ekvivalentoj. La komparo, cetere, estas iom malfacila, cxar en pluraj (pleje lauxmodaj) etnaj lingvoj la ekvivalentoj de cxi tiuj vortoj finigxas per "-ion" (en aliaj per "-ie"/"-ien") au per "-ione" (vd. I "delegazione"), pri kiuj validas alia regulo de prononco (kaj akcentado) ol pri tiuj kun "-io"/"-ia". Pri akcentmaniero identa kun la nia (|me'di:o|, |slova'ki:o|, |na'ci:o|) mi scias sole en la araba (egz. Ar "Arabia": |ara'bi:a|). Se do klopodi al maksimuma lojaleco al la akcentmaniero de la fontaj Europaj lingvoj (al "natureco"), modele por ni servas tiuj solvoj, laux kiuj la vortfinajxo de cxi tiuj vortoj estas simila al tiu de la niaj. Cxi tiujn solvojn liveras parte slavaj lingvoj, parte la angla, hungara, kie la vortakcento au falas sur la silabon antaux la vortfina vokalparo (vd. R |sla'vakija|, A |slou'vaekie|) au cxi tiu silabo ricevas sekundaran vortakcenton kune kun la longigxo de la vokalo en gxi (vd. Sl |"dele'ga:cia|, Hu |"dele'ga:ci:o|). Cxi cxi sugestas ke la vortakcento ankaux en nia lingvo falu sur la silabon antaux la vortfina vokalparo ("diftongo"), do tion, ke ili estu akcentitaj jene: |dele'ga:ci:o|, |slo'va:ki:o| k.t.p. Cxi tiel ni ankaux povus eviti la monotonigxon de la prononco (vd. "difterio": |dif'tE:ri:o|, "berilio": |be'ri:li:o|, "folio": |'fO:li:o|, "petunio": |pe'tU:nio| k.t.p.), krom la lezon de la Fundamenta regulo pri vortakcento.

Oni povus rajte demandi cxu cxi tiu akcentmaniero estus ne aplikebla al ceteraj vortoj kun vokalpara vortfinajxo (vd. "paneo", "kongruo" k.t.p.). Miaopinie tiu cxi sxangxo estus tro peza, des pli cxar gxi lezus la menciitan principon de lojaleco al la fontaj lingvoj, kiu estas ofte la franca (vd. F "arm" ￼: |ar'me:|, F "id" ￼: |i'de:| k.t.p.).

Tio, kio ankoraux fakte atendas akcentmodifon, estas kelkaj latindevenaj vortoj, kiuj konservas la latinan (nomvortan) vortfinajxon "-um" en sia vortradiko ("germaniumo", "mediumo" k.t.p.). La sxangxon iliakaze motivas precipe la konsidero, ke cxar la E-ajn vortojn kun la derivilo "-um-" ni prononcas akcentante cxi tiun derivilon (ekz. "okulumi": |oku'lu:mi|), la audio de tiaj vortoj kiel "mediumo" (|medi'u:mo|), "volumo" (|vo'lu:mo|) igas nin perpleksa, cxu la parolanto ilin uzas ne kiel novajn, arbitrajn derivajxojn respektive el "medio" ("mediumo"<"mediumi"<"medio") kaj el "volo" ("volumo"<"volumi"<"volo"). La perpleksigo estus evitebla per la prononcmaniero |'me:diumo| resp. |'volumo| (do tiu pli malpli responda al ilia gxenerala akcentmaniero). Ceteraj vortoj simile atendantaj prononcsxangxon estas: "cekumo", "faktotumo", "forumo", "galiumo", "harmoniumo", "heli-umo", "iliumo", "maksimumo".

Mi lanxas ankaux cxu tio estus ne konsilinda apliki cxi tiun principon al ceteraj vortoj kun alia latina nomvorta vortfinajxo, nome kun "-us-". Jen kelkaj el la cx. 10 cxi tiaj niaj vortoj: "angxeluso", "ciruso" "fokuso", "fonduso", "kornuso". La akcentsxangxon ankaux cxi tie motivas unuavice la pretendo igi la E-an prononcmanneron ju pli "natura", sed ankaux ke inistante pri la tradicia akcentmaniero ni ankaux cxi tie riskas perpleksigon (konsideru ekz. cxu "rebuso", "rubuso" estas ne prefere novaj tipoj de "busoj"). Kaj fine, premisante la akcepton de cxi tiuj prononcsxangxoj, ni povus pensi ankaux pri cxu ne etendi la validsferon de la akcentmodifa principo ankaux al kelkaj vortoj kun la greka vortfinajxo "-is". Da cxi tiaj vortoj estas tre malmulte, mi pensas pri "Adoniso" (|a'do:niso|), "narciso" (|'narciso|) kaj eble pri kelkaj ceteraj.

Johano Petik

El la leteroj

Letero de Alicja

Mi dankas al vi pro via granda raporto kaj via laboro. Ankaux gratulas pro bona konduto kaj deligenta laboro de viaj studentoj en Cieszyn, mi esperas ke en Oktobre ili ankaux estos por cxiuj modeloj,

Mi esperas ke viaj studentoj novaj kaj bakalauroj partoprenas en lekcioj Ili necese devas partopreni en oktobro dum periodo 26- 31 de Oktobro. Ne estas ajna klarigo, ke ili ne havas tempon cxar laboras.

Ili venis cxefe al Pollando por studi, kaj post studado povas fari kion ili volas- sed ne tro laute amuzi cxu drinki , cxar jam estas riprocxo. Ankaux konsilu al ili ke dum lekcioj ili devas havi globkrajonojn kaj kajerojn por noti la kursprelegojn.

Krome al oficialaj listoj, ili ne rajtas anstataŭ siajn nomojn meti la fia indikojn ktp.

amike Alicja Lewanderska

Letero de Julia Sigmund, Hungario

Mi tre dankas la oktobran Bultenon kaj gratulas al via heroa laboro!

Julia

Letero de Robert Francio

Kial do ne ricevi? Mi sxatas vian bultenon, mia sola ligilo kun Albanio. Amike Robert Pontnau

Letero de Geraldo Brazilo

Saluton

Kompreneble, mi volas gxin dauxre ricevi, sed bonvolu informi min pri via kodo en UEA, cxar mi preferas aboni gxin. gxi estas ricxenhava kaj do agrabla por legi.

Kore, Geraldo Mattos

Letero de Geza

Kara amiko,


dankon pro via interveno, kies rezulto farighis bona solvo de kvizoludo de JA (119). Bv. transdoni mian gratulon al Eleda Hallvaxhiu, kiu sendis tute bonan solvon. Nun mi ne volas mencii la erarojn, mi mencias nur du, char eble venos respondo ankaŭ de alia via lernanto. Do: kiam post la demando trovighas krisigno inter krampoj: (!) tiam pensu pri sherca ruza demando. Sciu, ke ne februaro estas la plej


mallonga monato, sed ... Alia erareto: proverboj kutime agrable rimas, sekve, kvankam la esencon de la proverbo Eleda trafis, sed ghi sonas jene: Komenco bona, laboro duona.

Tre plachas al mi via matematika logiko. La tasko baldau aperos en Juna Amiko. Dankon! Cetere, ne forgesu pri tio, ke mi chiam volonte aperigas viajn kontribuajhojn!



Kun amikaj bondeziroj:

Geza Kurucz

 Dimitrije Janicic Kara Bardhyl, Dankon por nova numero de via Bulteno. Mi gxojige tra legis unua...

 Manfred Westermayer Kara Bardhyl, elkoran dankon entute, kaj aparte por via parolturnaro al-eo. B...

 Edmund Grimley-Evans Mi ne plu volas ricevi gxin. Dankon.

  Bardhyl Selimi Ankoraux pardonon amiko, nun mi tuj forvisxos vian nomon el la sendolisto.

 Andreas Kuenzli

Saluton Bardhyl

dankon pro la nova eldono de via informletero.

Mi metos vian Albanan Esperanto-Instituton sur la listo de tiuj, al kiuj mi proponas donacan ekzempleron de Svisa Enciklopedio Planlingva. www.planlingvoj.ch

Bv. konfirmi al mi al kiu adreso sendi la libron: chu al via Albana Esperanto-Instituto (chu ghi havas organizitan kaj uzatan bibliotekon) au al iu scienca esplorbiblioteko en via lando, ekzeme universitata biblioteko au nacia Biblioteko?

Mi atendas vian respondon.

Saluton Bardhyl

dankon pro la nova eldono de via informletero.

Mi metos vian Albanan Esperanto-Instituton sur la listo de tiuj, al kiuj mi proponas donacan ekzempleron de Svisa Enciklopedio Planlingva.

www.planlingvoj.ch

Bv. konfirmi al mi al kiu adreso sendi la libron: chu al via Albana Esperanto-Instituto (chu ghi havas organizitan kaj uzatan bibliotekon) au al iu scienca esplorbiblioteko en via lando, ekzeme universitata biblioteko au nacia Biblioteko?

Mi atendas vian respondon.

Kun koraj salutoj

Andreas Kuenzli

Letero de Irena

Estimata samideano,

Mi skribas nome de Irena Łowińska, mia bona amikino. Mi loĝas en la urbo Olsztyn , 220 kilometrojn norde de Varsovio. Irena antaŭ kelkajn jarojn ankaŭ loĝis en Olsztyn kaj tiam ni amikĝxis, mi ofte helpis al ŝi.

Mi telefonis al Irena kaj traŝegis vian leteron senditan al mia interreta adreso. Irena tre ekĝoĝis. Ŝi bone rememoras vian agrablan viziton ĉe ŝi. Bedauxrinde ŝi estas laste tre okupita kaj ne povas helpi al vi kaj skribi ion pri prezentita de ŝi strukturo de esperantistaro kaj pri ŝiaj opinioj rilate al antaŭĝugxoĝ pri la blinduloĝ.

Irena proponis, ke vi mem preparu artikolon surbaze de transdonitaj de ŝi informoj kaj opinioĝ dum via restado ĉe ŝi en Varsovio.

Irena nun okupas pri preparado de esperanta kantareto por infanoĝ kaj krom tio ŝi gvidas kunvenoĝ en la esperanta klubo en Varsovio (marde kaj merkrede) kaj lige kun tio ŝi preparas temoĝ por kunvenoĝ.

Estas por ŝi malfacile korespondi kaj ŝi ĝam preskaŭ ne korespondas.

Tamen se vi volas transdoni aŭ ricevi de ŝi iun informon vi povas skribi al mi kaj tiam mi kontaktiĝos per telefone kun ŝi.

Kun esperanta saluto

Elizabeta Frenszkowska

letero el Zagrebo

Estimata kunpreleginto el Triesto,

Certe mi deziras ricevadi vian tre valoran retbultenon.

Speciale min tushis, ke vi reproduktis mian tekston el la 3-a n-ro de Zagreba esperantisto- ĝi-jara.

Certe mi (ni) tre volonte akceptos iun vian tekston el kaj pri Albanio kaj Albanoĝ en nia gazeto!

Jen kelkaj titoloĝ de tekstoĝ en kroata lingvo - pri Albanio/Kosovo kaj Albanoĝ:

Shufflay, Milan: Srbi i Arbanasi (e-lingve: Serboĝ kaj Albanoĝ), Zagreb, 1991. (pli frue Beograd 1925)

Sheparovich, Zvonimir kaj Eshref Ademaj: Kosovo ŝrtve (Kosovo - viktimo), Zagreb 1991.

Neziri, Zeqirrija: Hrvati o Albancima (Kroatoĝ pri Albanoĝ), Zagreb, 1993.

Eble estus bone skribi almenaĝ pri historiaĝ granduloĝ kiel ĝjergj Kastrioti, pri lia rolo!

Elkora saluto

Radenko Miloshevich

Kara

Mi sxangxis vian abonon al la listo al "Neniu mesagxo".

Vi plu estas ano de la listo, sed ne plu ricevos unuopajn mesagxojn,

vi povos legi ilin nur se vi iros al :

<http://groups.google.fr/group/lingvolancxilo>

Vi povas ankaux elekti alian modon, kiun mi elektis por mi mem, por la

2

venontaj semajnoj : ricevi nur unu mesagxon tage, kun resumojn de la

unuopaj mesagxoj. Cxu tiu ebleco pli interesus vin ?

Kore

Aleks

PS : Ludoviko, ankaux mi forestos ekde jxauxde 25an de oktobro gxis la

11a de novembro. Dume mi ne plej versxajne ne plu povos (mal-)aprobi

la alvenontajn mesagxojn. Mi lasos al vi la plezuron tion fari :)

> Ni komprenas, ke Vi ne povas tralegi 'ciutage plur-dek mesa'gojn!

> (Tio anka'u nin foje-foje 'genas, precipe tiam, kiam oni skribas

> privatajn, a'u tro longajn rimarkojn...)

(...)

> 'Gis re-skribo kaj plej amike kaj dankeme adia'uas Viaj

> Ludoviko kaj Julinjo

Karega nia Amiko Bardhyl!

Ni komprenas, ke Vi ne povas tralegi 'ciutage plur-dek mesa'gojn!

(Tio anka'u nin foje-foje 'genas, precipe tiam, kiam oni skribas privatajn, a'u tro longajn rimarkojn...)

Tamen ni petas Vin, restu sur nia aldonita Adresaro, kiun ni 'satus ampleksigi, por ke la Membroj de la Internacia Laborgrupo "Lingvolan'cilo" povu facile kontakti'gi unu kun la alia.

Ju pli multaj homoj estos sur nia listo, des pli forte povas a'udi'gi nia vo'co...

Bonvolu kontroli, 'cu Viaj datenoj estas en ordo?

Kaj ni petas Vin, ke bonvolu atenti'gi anka'u Viajn geamikojn en- kaj eksterlandajn, ke anka'u ili ali'gu al nia Laborgrupo.

Permesu, ke ni anka'u en la estonto kontakti'gu kun Vi, se ni havos ian, pli gravan direndon a'u peton.

'Gis re-skribo kaj plej amike kaj dankeme adia'uas Viaj

Ludoviko kaj Julinjo

PS.: Bonvolu konservi la Adresaron, - ni sendos de tempo al tempo refre'sigitajn datenojn...

-----Eredeti

letero de Jacques

Kara amiko,

Dankon pro via denova klopodo. Bedaurinde ni denove ne sukcesis malfermi vian mesaghon. Bonvolu ripeti per programo Adobe Reader, au Outlook Express kiel antaue. Dankon

Por s-ino Reihan mi havas du bonajn sciigojn a) la komunumo Heemskerk donos subvencion de E. 2200.- por la projekto; b) la adiaua celeburo de Annemieke Melkman rezultigis la grandegan monsumon de E. 2.068.--. Gratulon al Reihan! Nia volo estas helpi al la instituto. Ke ankaŭ la ministerio ne tro longe atendu, ĉar la estraro de nia komunumo postulas ekrealigon de la projekto inter periodo trimonata. Morgaŭ mi havos renkontighon kun Sovaghaj Anseroj. Plej kore vin kaj la viajn salutas, ankaŭ en la nomo de Vera, Jacques.-

----- Original Message -----

Karaj geamikoj,

plej bona tasko por montri la taŭdgecon de Esperanto estas - laŭ opinio de Michel kaj mi - la traduko de la Gheneva Programo (Cxarto) de la Euxropa Verda Partio. Gxi ankaŭ estos la bazo por la sekva balotokampanjo al la EU-Parlamento.

Mi tranĉis la tuton en 16 partojn, tiel ke post un/du horoj la traduko estas preta.

Restas 14 partoj (divers-grandaj)

Bonvolu menciigi, se vi povos traduki nur malgrandan parton.

Mi atendas viajn jesajn respondojn...

Se iu el vi konas taŭrgan tradukilon, mi volonte provos.

Mi povas sendi la tekston en la angla originalo aŭ en alia eŭropa lingvo (cx. 20 diversaj).

Anticipe Dankon !

Amike salutas / Mit freundlichen Grüßen

Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE) - sekretario

Manfred Westermayer, Kandelstr. 62, D-79194 Gundelfingen

nova: www.verduloj.org

ret-adreso: ave@verduloj.org

Letero de Stanislao Smigielski

Estimata, koran dankon por Via reta letero kaj por la informo, ke Vi donos nian informon en Via Bulteno.

Eble Vi, konata al ni kiel la aŭtoro de multaj artikoloj en MONATO, sendus ankaŭ al nia Spegulo tekston pri la nuntempa vivo en Albanio?

Kun koraj salutoj, Stanislao Smigielski, sekretario de la Redakcio de SPEGULO (PL).

Informaĵoj

INTERNACIA FESTIVALO DE 36 LINGVOJ

Dum 22-30 de septembro 2007 en Bydgoszcz okazis la 32 Internacia Forumo pri Turismo, Edukado kaj Kulturo kune kun 28 Pola AIS-Sesio kaj 32 AIS-Sesio de AIS Klerigejo en Bydgoszcz (AKB).

En la aranĝoj partoprenis prelegantoj, studentoj kaj gastoj el 21 landoj de Afriko, Ameriko, Azio kaj Eŭropo.

Kadre de Internacia AIS-Sesio kursojn-seminariojn je turismaj, kulturaj kaj lingvaj temoj gvidis:

Prof. dr hab. Aleksandra Kowalczyk, Prof. dr hab. Adam Sudol el Pollando, Prof. Bojxidar Leonov el Bulgario kaj ASci Regina Grzebowska kaj ASci Andrzej Grzebowski el Bydgoszcz. Temon Kulturoj de Ameriko, Azio kaj Eŭropo gvidis red. Roman Dobrzynski ilustrante per propraj filmojn multajn arkitektajn kaj kulturajn objektojn de la mondo.

Okaze de Europa Tago de Lingvoj (26.09) okazis tre interesa seminario en Muzeo de Diplomatio, kiun gvidis Prof. dr hab. Adam Sudol direktoro de la Muzeo kaj Prof. dr hab. Andrzej Dyszak direktoro de la Centro pri Instruado de Pola Lingvo por Eksterlandanoj en la Universitato de Kazimiro la Granda (UKW) en Bydgoszcz.

Fakte la Forumo dum la semajno transformigxis al Festivalo de 36 Lingvoj (komence oni anoncis 25 lingvojn), dum kiu prelegantoj kaj studentoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz prezentis 13 lingvojn de Europo kaj Ameriko: red. Roman Dobrzynski esperanto, hispana, portugala, Prof. Bojxidar Leonov bulgara, ASci Regina Grzebowska esperanto, litova kaj pola, Anna Butkiewicz rusa, Oleksandra Kovyazina ukraina, Bardhyl Selimi albana, Chang Cindy el Usono angla, Abraham Langoume franca, Valery Khramov- germana, Agnieszka Nieczaj itala. Sekve 15 denaskajn lingvojn de Afriko prezentis studentoj de tiu kontinento: Abraham Langoume- diola, soce, Ibra Faye wolof, Henry Paul Djikoune - kreol, serez, Abdoulaye Faye - tukuleur kaj pular, Adolphe Dooh Mwelle - duala, pongo, bassa, Joseph Bicinini Apasa bembe i lingala kaj Moses Simon Gabagambi suahili, kirundi kaj kinye ruanda.

Azion reprezentis studentoj el Cxinio per cxina lingvo kaj el Uzbekio studentoj parolantaj uzbekan, persan, tagxikan kaj rusan, ankaŭ Kirill Vainer kazahxan, An Jong Min korean, Elbegzaya Batchimeg mongolan kaj Junko Oshima japanan kune 8 lingvoj, sume 36 lingvoj, kio helpis konscii la multlingvecon kaj la problemojn de la interkomprenigxo inter la popoloj de la mondo.

Okaze de Monda Tago de Turismo(27.09) studentoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz kune kun la gastoj vizitis Skvaron de Ludoviko Zamenhof kaj promenis laŭ Bulvardo Esperanto por vizitado de malnova urboparto. En la Urbodomo cxiujn gastame akceptis la Prezidento de la Urbo Bydgoszcz mag. Konstanty Dombrowicz, kaj poste, post la vizitado de Bydgoszcz-Venecio kaj de la Ekonomia Altlernejo kiun bele montris Jerzy Matuszak, studentoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo pasigis Internacian Vesperon en la Ekonomia Altlernejo kune kun gxiaj gestudentoj, kie ankaŭ prezentigxis ensembloj afrika AFRIKA UMBA kaj kazahxo-kameruna VALDO, ankaŭ mag. Lech Zagłoba deputito de la urbo Bydgoszcz kun repertuaro de turismaj kantoj en Esperanto kaj pola lingvoj.

La Tagojn de la Lingvoj en Bydgoszcz fermis d-ro Cezary Koscielak Prezidanto de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz per prelego pri komputila lingvo, mag. Stanislaw Mandrak prezentante la instruadon de Esperanto laŭ metodo de red. Stano Marcxek el Slovakio kaj ingx. Aleksander Zdechlik parolante pri sano de turistoj helpe de ALVEO. La lastan vesperon okazis renkontigxo kun Andrzej Grzebowski vojaĝxanto, kiu vizitis 170 landojn de la mondo kaj jam 8 foje sukcesis vojaĝxi cxirkaŭmonde

Kiel resumo de la arangxo estis bakalaura-magistra Seminario de AIS gvidata de Prof. dr hab. Aleksandra Kowalczyk - (profesoro de UKW, WSG kaj AIS), kaj Gxenerala Kunveno de la membroj de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz, dum kiu oni decidis cxuijare okaze de Europa Tago de Lingvoj (26.09) kaj de Monda Tago de Turismo(27.09) kontinui la internaciajn festivalojn de diversaj lingvoj, kio donas bonegan popularigon de scioj pri lingvoj kaj kulturoj en la mondo. Valoras substreki, ke en Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz cxefa prelega kaj interkomprenigxa lingvo estas internacia lingvo Esperanto.



Internacia_Festivalo_de_36_Lingvoj.doc | File type: application/msword Download File - Need Help?

INTERNACIA FESTIVALO DE 36 LINGVOJ

Dum 22 – 30 de septembro 2007 en Bydgoszcz okazis la 32 Internacia Forumo pri Turismo, Edukado kaj Kulturo kune kun 28 Pola AIS-Sesio kaj 32 AIS-Sesio – de AIS Klerigejo en Bydgoszcz (AKB).

En la arangxoj partoprenis prelegantoj, studentoj kaj gastoj el 21 landoj de Afriko, Ameriko, Azio kaj Europo.

Kadre de Internacia AIS-Sesio kursojn-seminariojn je turismaj, kulturaj kaj lingvaj temoj gvidis:

Prof. dr hab. Aleksandra Kowalczyk, Prof. dr hab. Adam Sudol el Pollando, Prof. Bojxidar Leonov el Bulgario kaj ASci Regina Grzebowska kaj ASci Andrzej Grzebowski el Bydgoszcz. Temon „Kulturoj de Ameriko, Azio kaj Europo” gvidis red. Roman Dobrzynski ilustrante per propraj filmojn multajn architektajn kaj kulturajn objektojn de la mondo.

Okaze de Europa Tago de Lingvoj (26.09) okazis tre interesa seminario en Muzeo de Diplomatio, kiun gvidis Prof. dr hab. Adam Sudol – direktoro de la Muzeo kaj Prof. dr hab. Andrzej Dyszak – direktoro de la Centro pri Instruado de Pola Lingvo por Eksterlandanoj en la Universitato de Kazimiro la Granda (UKW) en Bydgoszcz.

Fakte la Forumo dum la semajno transformigxis al Festivalo de 36 Lingvoj (komence oni anoncis 25 lingvojn), dum kiu prelegantoj kaj studentoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz prezentis 13 lingvojn de Europo kaj Ameriko: red. Roman Dobrzynski esperanto, hispana, portugala, Prof. Bojxidar Leonov – bulgara, ASci Regina Grzebowska – esperanto, litova kaj pola, Anna Butkiewicz – rusa, Oleksandra Kovyazina – ukraina, Bardhyl Selimi – albana, Chang Cindy el Usono – angla, Abraham Langoume – franca, Valery Khramov- germana, Agnieszka Nieczaj – itala. Sekve 15 denaskajn lingvojn de Afriko prezentis studentoj de tiu kontinento: Abraham Langoume- diola, soce, Ibra Faye – wolof, Henry Paul Djikoune - kreol, serez, Abdoulaye Faye - tukuleur kaj pular, Adolphe Dooh Mwelle - duala, pongo, bassa, Joseph Bicinini Apasa – bembe i lingala kaj Moses Simon Gabagambi – suahili, kirundi kaj kinye ruanda.

Azion reprezentis studentoj el Cxinio per cxina lingvo kaj el Uzbekio – studentoj parolantaj uzbekan, persan, tagxikan kaj rusan, ankaŭ Kirill Vainer – kazahxan, An Jong Min – korean, Elbegzaya Batchimeg – mongolan kaj Junko Oshima – japanan – kune 8 lingvoj, sume 36 lingvoj, kio helpis koncii la multlingvecon kaj la problemojn de la interkomprenigxo inter la popoloj de la mondo.

Okaze de Monda Tago de Turismo(27.09) studentoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz kune kun la gastoj vizitis Skvaron de Ludoviko Zamenhof kaj promenis laŭ Bulvaro „Esperanto” por vizitado de malnova urboparto. En la Urbodomo cxiujn gastame akceptis la Prezidento de la Urbo Bydgoszcz mag. Konstanty Dombrowicz, kaj poste, post la vizitado de Bydgoszcz-Venecio kaj

de la Ekonomia Altlernejo – kiun bele montris Jerzy Matuszak, studentoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo pasigis Internacian Vesperon en la Ekonomia Altlernejo kune kun gxiaj gestudentoj, kie ankaŭ prezentigxis ensembloj – afrika „AFRIKA UMBA” kaj kazahxo-kameruna „VALDO”, ankaŭ mag. Lech Zagłoba – deputito de la urbo Bydgoszcz kun repertuaro de turismaj kantoj en Esperanto kaj pola lingvoj.

La Tagojn de la Lingvoj en Bydgoszcz fermis d-ro Cezary Koscielak – Prezidanto de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz per prelego pri komputila lingvo, mag. Stanislaw Mandrak prezentante la instruadon de Esperanto laŭ metodo de red. Stano Marcxek el Slovakio kaj ingx. Aleksander Zdechlik parolante pri sano de turistoj helpe de ALVEO. La lastan vesperon okazis renkontigxo kun Andrzej Grzebowski – vojaĝanto, kiu vizitis 170 landojn de la mondo kaj jam 8 foje sukcesis vojaĝi cxirkaŭmonde

Kiel resumo de la arangxo estis bakalaura-magistra Seminario de AIS gvidata de Prof. dr hab. Aleksandra Kowalczyk - (profesoro de UKW, WSG kaj AIS), kaj Gxenerala Kunveno de la membroj de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz, dum kiu oni decidis cxuijare okaze de Europa Tago de Lingvoj (26.09) kaj de Monda Tago de Turismo(27.09) kontinui la internaciajn festivalojn de diversaj lingvoj, kio donas bonegan popularigon de scioj pri lingvoj kaj kulturoj en la mondo. Valoras substreki, ke en Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz cxefa prelega kaj interkomprenigxa lingvo estas internacia lingvo Esperanto.

Artikoloj

TABELO DE ARTIKOLOJ

Tiuj artikoloj estas kompostitaj sur la bazo de teksto el 14-punktaj literoj kaj el literaro nomata « Times New Roman », kiu estas sufiche eleganta, sed tamen ne ebligas doni al nia lingvo sian dimanĉan veston ! Mi per tio volas nomi la oficialan veston proponitan en la Fundamento far Zamenhof. En la estonteco eble elegantaj literaroj pli bonvenos nian lingvon, kaj tion faros ne postulante plian kaj do troan manipuladon ! Esperanto tiam povos paradi en sia dimanĉa kostumo kune kun siaj chapeloj kaj kronoj.

Jis tiam, krom se ĵi konsentos aperi en pli malbelaj kaj pli neoportunaj literoj, kiel en nia artikolo n° 3 (literaro « Tahoma »), ĵi tion faros per senornamaj laborvestoj, sen chapeloj nek kronoj : du disponeblas ! Ili pro sia deveno tute respektas la fonologion de Esperanto ! Ech cent-procente, se oni respektas la Regulon de Zamenhof (vd. art. n° 4, kiun ni resumu per du ekz-oy : Sa'ulo, pac-horo).

La unua laborvesto, konata kiel FHA au h-alfabeto de Zamenhof neniam renkontis ŝaton che la Esperanta publiko. La dua, konata kiel NHA, estas nova. Ĵi pro sia naturo partoprenas en la Monday Grafioj, kaj do jam estas senscie konata de tre multaj homoj dissemitej tra la lingvomondo : efektive

ili konas la grafiojn uzatajn en la skribo au en la transskribo de tre diversaj lingvoj tra la mondo !
Necesas nur, ke oni konfirmu al tiuj homoj, ke tiuj grafioj efektive prezentas tiujn sonojn : ili tuj konsente aprobas ! Tiu NHA fakte estas por Esperanto laborvesto, kiu ebligas al nia lingvo iom post iom konkeri landon post lando sur la tuta planedo !

Nenion ni diru pri tiuj aliaj surogatay vestoj, kiuj konas nek lejojn, nek rejojn. Ili estis elfaritaj de amatoroj (eventuale eĉ universitatay profesoroj !), kiuj uzas x au q sub preteksto, ke tiuj literoj akiru (devige arbitran) signifon en plene nova alfabeto lau la kaprico de sia inventinto !

A.A.

*

⌘ 1 / Alfabetoj / TRI ALFA.doc / La tri alfabetoj de Esperanto, lau la Fundamentaj reguloj / 775 Ko -- 8 p. / 2006-09-07 / AA

⌘ 2 / Alfabetoj / DIDAKT.KUB.doc / La Didaktika Kubo / 21,0 Ko -- 1 p. / 2006 09-30 / AA/

⌘ 3 / Alfabetoj / Au-sil.doc / Prononco kaj signifo de la silabo aŭ, misuzo de antaŭvokala ŭ anstataŭ w, dezirindeco enkonduki w en la alfabeton de Zamenhof / 72 Ko -- 10 p. / 2006-11-07 / AA / + biblio-grafio.

⌘ 4 / Alfabetoj/ FHA / ZAREGZOA.doc / La Zamenhofa surogata alfabeto kay la Regulo de Zamenhof / 40 Ko -- 4 p. / 2006-12-10 / AA / + bibliografio.

⌘ 5 / Alfabetoj / Antecedentoj / MEANTOA.doc / Mezepokaj ante-cedentoj de NHA / 75,5 Ko -- 13 p. / 2006 12-22 / AA/ + bibliografio.

⌘ 6 / Alfabetoj / NHA / Kio NHA N.doc / Prezento de NHA, filino de h- alfabeto kay de Monday Grafioj / 48 Ko -- 7 p. / 2007-03-17/ AA / + bibliografio.

⌘ 7 / AdE / SurogAlfa.doc / Pri surogata alfabeto. (Letero al la Akademianoj) / 22 Ko -- 2 p. / 2007-03-02 / AA.

⌘ 8./ AdE / Agado / Tekstoy / PACSol1.doc / Chu paciga solvo eblas ? Letero al Geraldo MATTOS kay Renato CORSETTI / 53 Ko -- 5 p. / 2007-05-02 / AA

⌘ 9 / Alfabetoy/ Kio-uc / Kio-UC + Z1.doc / Unicode kay la alfabeto de Zamenhof / 53 Ko -- 10 p. / 2007-05-05 / AA/ + bibliografio.

⌘ 10 / Alfabetoy/ NHA/ UZ NHA N.doc / Motivoy de mia nekutima skribado / 210 Ko -- 9 p. / 2007-05-31 / AA.

⌘ 11 / Alfabetoy / Tayp / tri-tayp.doc / Miay tri taypiloy / 35 Ko -- 5 p. / 2007-07-14 / AA.

⌘ 12 / Pn MG / PN MIG E.doc / La propray nomoy en la mondo, kiel ilin legi helpe de la Monday Grafioy ? / 1.814 Ko -- 21 p. / 2007-09-22 / AA / + bibliografio.

⌘ 13./ Alfabetoy / NHA / KOL ARKH EO.doc / Kolumnoy en la arkitekturo de E-o / 38 Ko -- 6 p. / 2007-09-29 / AA / + aliaj art.

El la buletnoj de amikaj asocioj

Sei-spiritisma esperanto-informilo, boletimsei@lfc.org.br nr 136 junio 2007

La lingvo de Euxropa Unio

Delonge la lingva diverseco estas problemo por euxropaj landoj cxar Euxropo havas dekojn da naturaj lingvoj. Enketo realigita de auxstria revuo " Der Standard" kaj publikigita en julio, demandis al legantoj kiu idiomo tauxgus a; cxiutaga uzo en Euxropa Unio. Surprizigis la eldonantojn la rezultato, montrante Esperanton kiel preferatan de 54.8 % vocxdonantoj, sekvatan de la germana kun 15.8 %, idiomo hodiaux parolata de proksimume 100 milionoj da euxropanoj. La angla lingvo estis la tria, kun 14.5 % de la vocxdonantoj.

Spiritismaj libroj senpage

Spiritisma Eldona Asocio F.V. Lorenz lanxis kamapnjon por intensigi la diskonigon de Spiritismo inter la esperantistoj. Gxis konsistas en la senpaga disdonado al cxiuj mondopartoj de la spiritusmaj libroj kiujn gxi eldonas.

Ne estos sendokostoj cxar ilin pagos ankaux la eldonejo.

Petojn oni sendu per la e-posxto editora_lorenz@uolcom.br , aux per letero al gxia sidejo: Rua dos Invalidos, 34 sala 903 Centro 20234-044 Rio de Janeiro RJ Brasil

El la Bultenoj de amikaj asocioj



Editora Lorenz <editora_lorenz@uol.com.br> to "Undisclosed-R.

[show details](#)

17:18

Karaj Gefratoj:

Estas kun granda g'ojo ke ni liveras al vi la trimonatan bultenon de Eldonejo Lorenz.

Bonvolu konfirmi la ricevon kaj ankau', se tio ne g'enos vin, sendu g'in al geamikoj.

Dankon kaj Dio benu vin!

Eldonejo Lorenz

Top of Form

Bottom of Form

Triesta Bulteno nov-dec.2007

Libroj en Italio. Ce la adreso <http://www.esperanto.it/html/>

[fei/pubblicazioni.htm](http://www.esperanto.it/html/fei/pubblicazioni.htm) troveblas listo de ciuj disponeblaj libroj

ce Itala Esperanto-Federacio. Tre simplas la sercado de

la dezirataĵo, ĉar la verkoj estas dividitaj laŭ temoj, kaj kostoj kaj acet-maniero estas tre klare indikitaj. Por poste mendi,

suficas mesagi al: <libroservo@esperanto.it>

Premio Zamenhof – en Ancona La 7an de decembro, je la 21a horo, ĉe Teatro Sperimentale, okazos transdono de la

premio Zamenhof, fare de Itala Federacio, al personoj kontribuintaj antaŭenpasi tiuj idealojn proprajn de la esperantomovado.

Gin sekvos lirikkoncerto. La ĉjaraj premiitoj estas: Gianfranco D'anna, vicdirektoro de GR1, por dokumenta

filmserio “Forgesita Planedo”; Manuela Dviri, loganta en Israelo, ĵurnalistino kaj iniciatinto de la kunlabora agado

inter israela kaj palestina kuracistaro ĉe la Jerusalema Malsanulejo; Stefania Casini, eksa kino-aktorino, nuntempe

televidea regisoro, por kelkaj dokumentaj filmoj el tre grava socia kaj interkultura engagigo, inter kiuj “Latinameriko”

kaj “Surstrataĵoj”. La Premion Stoppoloni ricevos la Asocio “Revekigo”, engagita en socia kampo pri integrigado

de eksterkomunumanoj.

Nova Fei-Estraro Dum la itala kongreso, okazinta septembre en Pisa, estis elektita la nova estraro, kies konsisto jenas:

Prezidanto: Renato Corsetti; Vicprezidanto: Aldo Grassini; Generala Sekretario: Laura Brazzabeni; Kasisto: Riccardo

Pinori. Aliaj membroj estas: Ranieri Clerici, Mario Menghini kaj Nicola Ruggiero.

Al ĉiuj Triesta E-Asocio deziras sukcesan kaj fruktodonan laboron en ilia por- kaj pri-esperanta agado!

Kuiremo

Manumado de ovo!

INGREDIENCOJ

PREPARADO

1 – En duoble funda kaserolo por mergovarmigo, kuiru la mielon, maksimume ĝis 80°C, daŭre ĝin miksanter.

2 – Kiam ĝi iĝos malhel-blonda, aldonu, iom post iom, tre delikate, la pufigitajn ovoblankojn.

3 – En alia ujo solvu la sukeron en akvo, ĝin kuirante je varmo de ĉirkaŭ 145-146°C.

4 – Antaŭ ties karameligo, aldonu kelkajn gutojn de vanila esenco kaj deprenu la ujon de la fajro.

5 – Al tiu ĉi komponaĵo aldonu la antaŭe preparitan mielon kaj la amandojn.

6 – Miksu kaj versu la tuton en rektangulan ujon, antaŭe tegitan per oblato-folioj. Kovru ĝin per alia oblato-folio kaj ĝin premu per glata ilo.

7 – Dum kelkaj horoj ĝi devas malmarmigi. Kiam ĝi malvarmetas, trancu per apenau malsekigita trancilo kaj enpaku per stanfolioj aŭ diafana folio por nutraĵoj.

300 g

300 g

100 g

600 g

mielo

sukero

akvo

ovoblankoj (nege pufigitaj)

amandoj (iomete rostitaj)

vanila esenco

Distrajxoj

Humorajxoj

- Bonvole, kafon!

- Kun lakto, sen lakto, varma cu malvarma?

- Nu, dankon, kafon tute nigran kiel karbo kaj varman kiel mia koro!

Rapida, kelkvort-intersango inter klientino kaj kafeja kelnero. Same rapide, jen antau mi bonodora, fumanta, vekopova matena trinkajo!

Volonte, preskau ciutage, mi vizitas ci kafejon, ankau pro ties carma kutimo, ciam meti en la subtasa telereto bombonon,

au kafograjnnon tegitan per tavolo daokolado, au kuketon... Ci foje novajo: envolvita en plasta, traridebla

papero, brunkolora biskvito, produktita en Belgio! Delikata cinam-parfumo tiklas miajn flarsensilojn: mmmh,

kia frandajo!

Scivoleme, dum gustumado, eklego de la instrukcioj, nu, pardonu, eklego de la tre detalaj informoj, sur 9x5-centimetra

pakajeto, pri tiu specialajo: "KARAMELITA BISKVITO" (estas la klarigo!). Inter la ingrediencoj: siropo kandita,

faruno el tritiko kaj el sojo, acida karbonato de natrio, vegetalaj oleo kaj grasso, salo, cinamo. Krome, diklitere, oni

atentigas ke en ĝi estas: tritiko kaj sojo (denove!). Do, pli bone dufoje, ol nenio, ĉu ne? Eble tio estas kroma atentigo

por tiuj malsanuloj, kiuj ne toleras glutenon. Kiel ili nomigas? Ĉu..., ĉu...? Vastega nigra truo en mia kapo: ne

sukcesas eliri el ĝi la tauga vorto, sed vi komprenis pri tio temas, ĉu ne?

Do, la unua problemo solvigis, sed kio pri tiu ĉi alia? La posta detalo: "Produktita en fabriko, kiu manumas: ovon" daŭre perpleksigas min. Mi legas kaj relegas, elpremante miajn jam elcerpitajn cerboneuronojn, kun espero je iu sensacia eksolvo de la enigmo, sed vane. Kio povus esti tia manumado?

Subite lumo ekflagris en mia cerbo! Certe: ili jonglas per la ovojn, antaŭ ol ilin rompi kaj disigi ovoblankon el la ovoflavo! Kial ne tuj pripensi tion? Nun, sentante min tute senpezigita, lante mi daurigas gustumi tiun envere bonegan kukon ... Esti kelkfoje fatalisma faciligas la vivon. Ĉu ne?

La ruza cevalkomercisto

Tio okazis ĉirkaŭ 1920 en la

hungarlingva Karpata Rutenio. Sinjoro Kohen, cevalkomercisto,

alvenis al iu cevoja gastejo por tranokti. Li

alligis sian cevalon en la stalo. Post unu horo

li iris kontroli, kiel fartas la cevalo, kaj konstatis, ke la

cevalo agonias. Li tuj rapidas al la gastejo, eniras la

drinkejon, kaj laute anoncas:

"Mi volas lotumi mian cevalon inter vi! Ĉiu, kiu acetos

lotumbileton por 1,000 florenoj, povas partopreni, kaj

eble gajni la cevalon!"

Nu, 1,000 florenoj estas apenau kvinono de la valoro de

unu cevalo. Estas do multaj, kiuj deziras riski. 30 biletoj

forvendigas, kaj oni tuj surloke arangas la lotumadon.

La gajnanto estas sinjoro Balasz. Li levas la bileton kun gojo kaj demandas sinjoron Kohen, kie estas la cevalo.

Kohen tiras lin flanken kaj diras al li: "Vidu, la cevalo jam preskau mortis. Sed mi ne volas, ke guste vi perdu monon, do mi tuj redonas al vi viajn 1,000 florenojn, kaj aldonas ankau plian milon, por ke vi estu kontenta."

"Mi tre dankas al vi pro via sincereco kaj malavareco", diris goje sinjoro Balasz. "Sed kion diros la aliaj?"

Tiam Kohen respondis senhezite: "Kion ili povus diri? Cu ili gajnis?"

Kaj tiam li foriris kun 28,000 florenoj en la poso...

Rido sanigas Tre rica usonano festis sian 95-jaran datrevenon. Li invitis al sia hejmo

siajn 3 plej proksimajn amikojn: katoliko, protestanto kaj judo. Ceestis

ankau lia advokato. Li anoncis al ili

jene: "Mi deziras heredigi al vi po 100

milionoj da dolaroj. Sed mi havas unu

kon-dicon: dum mia enterigo ciu el vi devos meti en

mian cerkon 100 mil dolarojn. Tio estos pruvo, atesto,

kiu montros ke vi fidas min." Post kelkaj monatoj li

forpasis. Ce la tombo, sub la strikta kontrolo de la

advokato, la katolika amiko encerkgis 100 mil dolarojn

kontante. Same faris la protestanto. Tiam venis la judo,

elprenis de la cerko la 200 mil dolarojn kaj encerkigis
anstataue cekon je la sumo de 300 mil dolaroj.

Judo kun bona memoro

Judo el Jerusalemo sukcesas esti ricevita audience de la
Papo kaj tiam diras al Li: "Via Sankta Mosto, mi heredis
mian restoracion de mia patro, kiu heredis gin de sia
patro, kiu heredis gin de sia patro, kiu heredis gin de sia
patro, kiu..." La Papo senpacience haltigas lin: "Sufice!
Cu vi volas atingi la tempon de Jesuo Kristo?" "Guste
tion!", diras la judo. "Temas pri la Lasta Vespermango.
Vidu, fakte... gi neniam estis pagita..."

_ Cu fantomo?

Mondkonatas la greka alfabeto!

Do, cefrolas malgranda litero
de tiu aro, en fama bildstrio,
kiun vi tutcerte memoras.

Cerbumu,

cerbumu...

7 2 ? 6 0 ? 4 ? 6 = 10

1 ? 9 ? 2 ? 6 ? 5 = 10

4 5 ? 1 0 ? 2 ? 1 = 10

Top of Form

Bottom of Form

TAGO DE LA ESPERANTO - LIBRO 2007

Chiuware la Zamenhoftago memorigas nin pri esperantaj eldonoj.

Zamenhoftago 2007 – Tago de la Esperanto-libro

Kial vi ne donacas al vi mem kaj/au al viaj geamikoj memorindan kaj valoran Esperanto-libron?

Napola Esperanto-Asocio (NEA) ofertas al Vi rabatite ghis 2008.02.28 sian eldonajhon:

DANTESKAJ ITINEROJ
de Prof-ro Vittorio Russo

en la esperantigo de Nicolino Rossi, kun versaj tradukoj de E. Dondi kaj K. Kalocsay.

Du emocivekaj kaj atentokaptaj itineroj tra la vivo kaj la verkoj de la itala chefpoeto Dante Alighieri.

Por mendoj ricevotaj ghis februaro 2008 Vi pagos nur € 6.50 plus sendokostoj (anstata#365; € 9,20). Mendu (poshtadrese) che: Napola Esperanto-Asocio (NEA)

Via Pietro

Castellino, 115

IT-80131 NAPOLI

/ Italio

Au retposhte che: nicolino.rossi@esperantanapolo.info

PAGU rekte al NEA (supra adreso) - Au al NEA che
UEA-konto: npea-c

Agrablan Zamenhoftagon kaj ghuindan legadon!

Top of Form

Top of Form

Bottom of Form

Internacia Pedagogia Revuo 2007/4 estas en la presejo

El ghia enhavo:

- Dennis KEEFE: Lingva Festivalo "Kiel fari efikajn, interesajn kursetojn por għenerala publiko?"
- Geza KURUCZ (Hungario): Pri komunikado internacia (imagita intervjuo)
- Rob MOERBEEK (Nederlando): Antologieto de nia originala konversacia stilo falsigita
- Anna kaj Mati PENTUS (Rusio): Chiamverda lernolibro, auh ankauh komencantoj povas vojaghi en Esperanto-lando (recenzo pri Boris KOLKER. Internacia lingvo Esperanto: plena lernolibro. "Eld. Impeto. Moskvo, 2007, 264 p. ISBN 978-5-7161-0172-2)
- Katarina STEELE: Instruado de Esperanto en la lernejoj de Perto (AU) (vidu: Idyss EINIHOVICI, Trevor STEELE, Sheryl RIDOUT, Patricia O'CONNOR, Penelope VOS, Vera ZASLAWSKY, Carol BRANDS, Saani BENNETTS, Merradean PETTIT, MO)
- Betty CHATTERJEE (Danio): Reta renkontigho

El la landoj kaj sekcioj:

- Ĉinio (Augusto CASQUERO, WU GUOJIANG)
- Germanio (Zsofia KORODY)
- Hungario (Eva JAGER, PERCZEL-SZABO Katalin)
- Italio (Nicola MINNAJA)
- Koreio (LEE Jung-kee)
- Nederlando (Atilio ORELLANA ROJAS)
- Norvegio (nekrologo de Arne Olav MJOEN pri Jon ROMMESMO)
- Pollando (Ilona KOUTNY, Jolanta KIERES)
- Rusio (Aleksander OSINCEV)
- Ukrainio (Nina DANILJUK)

La 42-a konf. de ILEI, Maribor, Slovenio, 2009 (anonco)

La 41-a konferenco de ILEI, 29 julio ĝis 5 aŭgusto 2008, Portonovo, Benino (informoj, alighilo)

Redakta komitato: Jozefo Nemeth (red.), Luiza Oberrauch Madella, Rob Moerbeek

Redakcio: Nemeth Jozsef, 8531 Ihasz, Fo u. 41/5

Kunlaborantoj de la aktuala numero: Augusto Casquero, Betty Chatterjee, Aida Cizikaite, Nina Daniljuk, Eva Jager, Dennis Keefe, Jolanta Kieres, Zsafia Korody, Ilona Koutny, Katalin Kovats, Geza Kurucz, Lee Jung-kee, Arne Olav Mjoen, Atilio Orellana Rojas, Aleksander Osincev, Anna Pentus, Mati Pentus, Katalin Perczel-Szabó, Radojica Petrovic, Katarina Steele, Wu Guojiang

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 ĀćEaĀćak, Serbio.

Tel. (+381 32) 371053. Fakso: (+381 32) 342101, <radp@ptt.yu>.

Kunordigado, eksteraj rilatoj, la projekto InterKulturo.

Vicprezidanto: Zsafia Korody, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412

Herzberg/Harz, Germanio. Tel./fakso (+49) 5521-5983.

<zsofia.korody@esperanto.de>. Instrukapbligado kaj edukaj centroj.

Sekretario: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag,

Nederlando. Tel. (+31 70) 3556677, fakso: (+31 70) 358 4422,

<atilioorellanarojas@gmail.com >.

Estrarano pri financoj: Sjoerd Bosga, Traddragargatan 27D, SE-723 37

Vasteras, Svedio. Tel. (+46 21) 41 70 45, <sjoerd@esperanto.se>.

Administra sistemo.

Vicsekretario: Mihai Trifoi, Str. Principala Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud.

Covasna, Rumanio (+40) 267-365319, <trifoi@honoris.ro>. Lerneja agado.

Estrarano: Aida ĀćEiĀ¼ikaitĀ¼, Kapini? 11-15, LT-50189 Kaunas, Litovio.

Tel. (+370) 37 793408. <aidute@mail.lt>. Konferencoj. Scienca agado.

Estrarano: Yas Kawamura, 13-8 Nakayata-cho Babanomizo Kameoka-si, Kyotofu,

JP-621-0855, Japanio, <esperanto@d0y0b.com>. Azia agado.

Honoraj Membroj de ILEI

S-ro Peter Zlatnar (YU) en 1984 – [1914-1987]

S-ro Mario Dazzini (IT) en 1985 – [1910-1985]

S-ro Marcel Erbetta (CH) en 1986 – [1911-1996]

S-ino Irja Klemola (FI) en 1986 – [1898-1995]

S-ro Olle Olsson (SE) en 1986 – [1909-2003]

S-ro Jozef Toczynski (PL) en 1986 – [1906-1989]

Rektoro Helmuth Sonnabend (DE) en 1987 – [1924-1986]

S-ino Catina Dazzini (IT) en 1988 [1917-1997]

Prof-ro István Szerdahelyi (HU) en 1988 – [1924-1987]

D-ro M. H. Saheb Zamani (IR) en 1989

S-ino Dorothy Holland-Kaup (US) en 1993

S-ino Audrey Childs-Mee (NL) en 1994 – [1926-1990]

S-ro Oene Hoekstra (NL) en 1994 – [1923-1999]

S-ro Edward Symoens (BE) en 1995 – [1915-1995]

S-ino Charlotte Kohrs (US) en 1997 – [1910-2002]

S-ino Idyss Einihovici (AU) en 1997 – [1904-1998]

S-ino Mila van der Horst-Kolińska (NL) en 1996

S-ino Nora Moerbeek (NL) en 1998 – [1930-1998]

S-ino Adriana Middelkoop (NL) en 2004

S-ro Géza Kurucz (HU) en 2006

S-ino Irena Szanser (PL) en 2007

S-ino Wil van Ganswijk (NL) en 2007

laŭ informoj de Atilio Orellana Rojas

Forumo

Kiel vi scias, ekzistas pluraj metodoj de lernado (instruado) de E-o. Mi volas rakonti al vi pri tre interesa kaj perspektiva metodo de lernado de E-o. Fakte tiu metodo estas aplikebla al lernado de ajna lingvo kaj donas BONEGAJN rezultojn. Mi mem uzis ĝin, kiam mi estis komencanto kaj povas aserti, ke ĝi BONEGE funkcias. La metodo estas kiom facila, tiom malfacila. Facila ĝi estas, ĉar oni bezonas NUR ellerni alfabeton kaj ekscii regulojn de legado. Tio estas sufiĉe facile kaj rapide efektivebla. Kaj poste oni devas nur preni iun libron, verkitan en bona E-o (mi rekomendus librojn de la hungara verkisto Nemere) kaj laŭtlegi ĝin. NUR laŭtlegi. Sed! Ĝisfine kaj plurfoje!!! Tre grava kondiĉo – NE UZI VORTAROJN!!! Eĉ nula komencanto, traleginta libron 5-foje (pli bone – ĝis-10-foje!) eĉ sen vortaro komprenos multon, komprenos, pri kio temas kaj kion faras la herooj de la koncerna verkaĵo. Ju pli da libroj oni tiamaniere tralegos, des pli rapide oni progresos. Aldone estas tre dezirinde aŭskulti diversajn radio-elsendojn en E-

o (ekzemple en la paĝaro www.radioarkivo.com), kantojn, partopreni en iuj ne-krokodilaj E-aranĝoj. Post tralego de kelkaj libroj dezirindus eklegi iun lernolibron aŭ viziti elementan kurson. Sed legadon (kaj aŭskultadon) oni devas daŭrigi. Unu el la grandaj avantaĝoj de tiu metodo estas la fakto, ke la lernanto ne devas parkerigi centojn kaj milojn da vortoj. Mirinde, sed post iom da persisto en legado vortoj kaj esprimoj kvazaŭ mem facile enkapiĝas. Kaj ilia signifo fariĝas komprenebla sen uzo de vortaro! Bedaŭrinde, tiu metodo ne ebligas 100-procentan komprenon de uzata teksto, do iom pli poste vi povas por traduko de apartaj malofte uzataj vortoj konsulti vortaron. Sed NUR NE EN LA KOMENCO! Tio estas strikte malpermesita!

Sed kial mi skribis, ke tiu metodo estas malfacila? Ĉar multaj homoj erare pensas, ke ili jam ĉion scias pri metodoj de lernado de fremdaj lingvoj kaj preferas agi nur tiel, kiel oni faras tion plej-ofte en multaj lernejoj: lernolibroj, lecionoj, vortaroj kaj nepre kaj pena parkerigado de novaj vortoj (aŭ radikoj). Mi ie legis, ke 99 homoj el 100 uzantaj similan metodon, neniam sukcesas ellerni lingvon. Terura statistiko! Sed mi iom devojiĝis. La malfacileco de tiu metodo estas en tio, ke homoj ne kredas, ke tiamaniere oni povas rapide ellerni la lingvon. Multaj asertas proksimume la jenon: „Tiu metodo ne estas uzebla, ĉar mi neniam komprenos la sencon de la vortoj, eĉ se mi centfoje tralegos iun libron”. Sed provi kaj konvinkiĝi pri la malo ili ne deziras... Aliaj asertas, ke ili mem scias, kiel oni povas lerni lingvojn kaj por tio ĉiam nepre estas bezonataj lernolibroj kaj vortaroj. Kaj nur poste (eble post jaroj), kiam ili jam parkerigos milojn da vortoj, oni devos komenci legadon.

Bonan libron pri simila metodo verkis hungara tradukistino Kató Lomb, kiu diversgrade posedis 16 lingvojn. La libro nomiĝas „Kiel mi lernas lingvojn”. Estas interese, al kiom da lingvoj ĝi estis tradukita? Ĉu iu el la legantoj povas informi min pri iuj nacilingvaj tradukoj?

Ĉu iu uzas tiun metodon (aŭ similan al ĝi)?

Aleksandr Griŝĉenko, Ukrainio, <agri@lep.lg.ua>

(aperis en la dissendolisto [e-ins], 26.07.2006)

Pri komunikado internacia

imagita intervjuo

Por komenci jen la plej evidenta demando: ĉu komunikado internacia fakte estas problemoplena?

Por vastaj amasoj ĝi neniam estis tiel ĝena kiel nuntempe, ĉar la bezono de interpopola komunikado ĝis nun neniam estis tiel postula. Eble nur la privilegia, plej supera socia tavolo ne sentas (bedaŭrinde!) ĝin dolorige, ilin ĉirkaŭas ja arego da tradukistoj kaj interpretistoj.

Kiom kostas (ek)havi la nunan nekontentigan interkontakton?

Precizaj elspezoj ne estas prezentablaj, ĉar adiciigas multaj diversaj kostoj, sed se konsideri ĉiujn kostojn de fremdlingva instruado ili preskaŭ atingas la jaran buĝeton de Eŭropa Unio. Tiu terure alta monsumo estus uzebla pli fruktodone por aliaj urĝaj farendaĵoj.

Kial ne elekti iun el la naciaj lingvoj kaj proklami ĝin deviga en ĉiuj landoj paralele kun la propra nacia?

Ĝuste tion volis kaj volas ankaŭ hodiaŭ ĉiu grandpotenco, tuj aldonante, kompreneble, ke la elektita lingvo fariĝu ĝia propra. Kaj fakte, se konsideri sole lingvajn valoraĵojn por tiu supernacia funkcio taŭgus pluraj centoj da naciaj lingvoj.

Kial ne decidi per ĝenerala internacia referendumo? La nacia lingvo elektita de plej multaj homoj fariĝus la internacia komunikilo.

Ĉar la referendumo sendube rezultigus la venkon de la plej granda, influhava nacio. Ĝi ŝanĝus do nenion. Ĉiam estis tiel dum la tuta historio de la homaro.

Sed, finfine, iam necesos decidi. Ĉiu jaro de prokrasto signifas malŝpari multajn miliardojn. Kial ne veni al findecido?

Ĉar la decido restus nur sur papero, kiel estis ankaŭ sen papero dum pli-malpli longa superregado de tiu aŭ alia „granda lingvo” en nia historio ĝisnuna.

Ĝuste la historio instruas al ni, ke necesas decidi, prokrastado kondukas nenien.

Sed meti iun ajn lingvon super la aliajn estas neakceptebla, tiu decido estas ja kontraŭdemokratia. Tio donas avantaĝon nejustan al unu lingva komunumo kontraŭ ĉiuj ceteraj.

Demokratio ne signifas, ke ĉiu estas preferata.

Jes, sendube, sed en vera demokratio la plimulton ne povas trafi negativa distingo, kian ĝi havus ĉi-kaze. Jarmiloj pruvis, ke daŭre nenies lingvo povas esti levita super la ceterajn. Tiu strebado ĝis nun ĉiam montriĝis malsukcesa, kaj en nia epoko de solidiĝanta demokratio des pli ĝi montriĝas tia.

Mi ne povas konsenti, ke en tiu ĉi kampo ŝanĝo ne eblas. Ĝis nun estis tiel, sekve ankaŭ en la estonteco estos tiel same. Mi estus tre surprizita, se en nia epoko, en kiu ĉio neimageble rapide ŝanĝiĝas, la komunikado estus sola unikaĵo, kiu ne estus modifebla. Ĉu ne ekzistas eliro?

Ekzistas, kompreneble, sed ne laŭ la tradicia vojo. Ĉi tiun gravegan funkcion povas plenumi nur neŭtrala lingvo, apartenanta al neniun nacio.

Evidentiĝas, ke necesas revivigi iun lingvon antaŭlonge mortintan. La ĝisnunaj provoj, ŝajnas al mi, ne sukcesis. Aŭ ĉu la latina lingvo estas revivigebla?

Kredeble ne. Pro du kaŭzoj. La unua, kaj tiu estas la pli grava: la latina ne estas vere neŭtrala, ĝi ĉiam ankoraŭ firme ligiĝas al la eklezio romkatolika, sekve aliaj tutmondaj religioj ne akceptus ĝin pro tiuj samaj kialoj, pro kiuj nenies nacia lingvo estas akceptebla. Due: ĝia alproprigado estus tre malfacila.

Montriĝas do, ke ekzistas ununura eliro, nome: arte fari novan lingvon. Sed, ĉu eblas tiel krei lingvon?

Eblas. Ĉiu ekzistanta lingvo estas homa produkto. Ĉiu estis kreita de longa vico da sinsekvaj generacioj dum jarmiloj, pli ĝuste, ĝi estas kreata ankaŭ hodiaŭ, ĉar ĉiu parolata lingvo senĉese ŝanĝiĝas laŭ la postuloj de la vivbezonoj.

Sed la artefaritaj/planitaj lingvoj estas ligitaj al unu sola persono. Ĉu scipovas unu homo – eĉ supertalenta – krei tian lingvon?

Kaj jes, kaj ne. Jes tial, ke la trunkon de la lingvo: la gramatikan strukturon kaj la afiksaron povas krei sola persono, eĉ, multe pli simplajn kaj klarajn, t.e. pli facilajn ol tiuj, kiuj estiĝis per plejparte instinkta uzado dum longaj jarcentoj. Ni ĉiuj scias, ke ĉi-lastaj estas plenplenaj de „esceptaj” formoj, kies alproprigado bezonas longan, paciencon laboron. Aliflanke, estas sendube, ke eĉ la plej talenta homo de la mondo ne scipovas krei kompletan lingvon, taŭgan por ĉiuj terenoj de vivsituaĵoj, por tio estas bezonata profesie multflanka granda komunumo.

Tia planlingvo tutcerte ne ekzistas. Kion do fari?

Tia ne ekzistas ankoraŭ, sed tute proksima al tia jam ekzistas. Estas sciinde, ke el pli ol cent planlingvoj nur unu sola transvivis la kontroladon de la tempo.

Ĉu ĝi estas Esperanto?

Jes. Antaŭ cent dudek jaroj, en 1887 aperis la unua libro de Zamenhof, okulkuracisto, kiu vivis en Varsovio kaj bone konis plurajn lingvojn.

Sed unu homo ne povas krei lingvon. Aŭ ĉu li estas escepto?

Ne. Li ne estis tiel naiva. Li ĉiam konsideris sin nur iniciatinto, ĉar li konsciis, ke la lingvon mem povas krei nur multnacia komunumo.

Kaj ĉu formiĝas tiu ĉi komunumo? Oni apenaŭ aŭdas pri ĝi.

En pli ol 150 landoj (en ĉiuj kontinentoj) troviĝas homoj, parolantaj E-on, sed ili apenaŭ ricevis/as subtenon de la politikistoj, sed des pli persekutadon (Hitler, Stalin), preteran pitan malrespekton, kvankam mondfamaj verkistoj, poetoj, sciencistoj, lingvistoj esprimis/as sian pozitivan opinion pri la ideo. Grandparte eĉ hodiaŭ estas ankoraŭ misio akcepti laboron por Esperanto.

Kaj kunveninte, ĉu ili vere komprenas sin reciproke? Ĉar tio estas la plej grava.

Aro da faktoj pruvas, ke sur preskaŭ ĉiuj terenoj E-o kontentigas la postulojn.

Kiuj estas la terenoj, kie ĝi ne kontentigas ilin?

Tiuj fakterenoj, kie ankoraŭ mankas aktivaj uzantoj. Ankaŭ ĉi-terene ĝi certe taŭgus, sed la koncerna faka vorttrezoro estas ankoraŭ kreota, ĝuste kiel ĉe la naciaj lingvoj ĝi ekestas danke al praktika uzado.

Kiujn pozitivajn faktojn oni povas mencii?

Kongresojn (ankaŭ fakajn) kaj dekduojn da diversaj turismaj, kulturaj aranĝaĵoj, grandan nombron da E-libroj, gazetoj, propran beletristikon, milojn da retpaĝoj, laŭ sia enhavo ilia vikipedio (E-lingva leksikono) troviĝas inter la unuaj dudek lingvoj, ankaŭ da E-lingvaj radioelsendoj ekzistas ĉ. dekduo.

Kio malhelpas do la ĝeneralan akcepton de E-o, se en ĉiuj kampoj, kie funkcias la lingvo, estas sendubaj atingoj?

Esence ekzistas du gravaj kaŭzoj. Mi konsideras la pli grava tion, ke E-o prezentas revolucie novan solvon, kia ĝis nun ne ekzistis. Rompi la tradicion de miljaroj estas terure malfacile, tio postulas longan, senlacan, paciencan agadon. Pluraj ekzemploj atestas pri tio. Sed ne forgesu, ke fine ĉiam venkas la racia, justa celado. Ankaŭ la alia kialo estas evidenta. La grandpotencoj provas malsukcesigi, kiom longe tio eblas, la ŝanĝon por ili nefavoran. Tio – kvankam ne subteninda – estas komprenebla el propra vidpunkto.

Ne ekzistas do eliro. Tamen tiu ĉi konkludo estas tutcerte malĝusta, ĉar kiam la historia evoluo atingas la punkton, post kiu la antaŭa strukturo ne plu funkcias kontentige, tiam necesas trovi solvon, prokrasto ne kondukas al sukceso. Mi havas ankoraŭ gravan demandon, nome: Ĉu ĝenerala akcepto de neŭtrala lingvo ne rezultigos la pereon de etnaj lingvoj? La tuta mondo timas tion, ke la malgrandaj lingvoj mortos unu post la alia. La tendenco jam komenciĝis.

E-o certe ne minacas pli ol la naciaj lingvoj celantaj akiri superregadon, sed precize antaŭvidi jarmilojn ne eblas. Estas certe, ke en mallonga distanco (tio egalas ne malpli ol unu jarcenton) ĝi efikus pozitive, ĉar okaze de ĝia akcepto restus pli da tempo kaj atento por la etnaj lingvoj kaj kulturoj, probable plej profite por tiuj, kiuj estas en danĝero.

Kaj kiom da energio necesas por posedpreni planlingvon, nome E-on?

Nuntempe E-o estas jam vivanta pontlingvo, miloj ellernis ĝin kiel familian lingvon. Cetere, daŭra uzado igas ĉiun lingvon vivanta. Danke al neimageble logikaj gramatiko kaj vortfarado, nehavantaj escepton, kaj krome, ĉar la vorttrezoro baziĝas sur vortoj internaciigintaj, laŭ ĝisnunaj spertoj, esploroj k.a. ĝi estas alproprigebla en ok- ĝis dekoble malpli da tempo (ĉ. 200 horoj) ol ajna nacia lingvo.

Tio sendube estas grandega avantaĝo. Kion aldoni ankoraŭ?

Mi kompletigus la supre diritajn nur per tio, ke la lando(j) – mi pensas pri malgranda(j) lando(j) kun komunikada malavantaĝo – kiuj frue konsciiĝas pri la problemo, por ĝi/ili la kuraĝa decido alportos avantaĝon, eĉ profiton. Perspektiva antaŭvido ĉiam montriĝas sukcesa investado.

Géza Kurucz

Dialektiko en matematiko

Dialektiko estas komprenata kiel arto de la logika rezonado, la ĉerpado de konkludoj rezonante logike, uzante la kontraŭdirojn en la pensado, arto de logikaj diskursoj ktp. La praa Heraklito diris ke „oni ne povas enakviĝi en la sama akvo de la rivero ĉar ĝi moviĝas senĉese”. Platono aldonis ke „ĉio fluas konstante, sendepende de la imagoj kreaĵoj de niaj sensoj”. Sokrato malkovris la verojn pere de la demandoj, plenaj je kontraŭdiraĵoj, kiujn li starigis al la kunkonversaciantoj.

Hodiaŭ dialektiko komprenatas kiel la tuto de la principoj de la pensado kaj rezonado resumeblaj kiel jene:

Leĝo de kontraŭdira karaktero de ĉiu objekto aŭ fenomeno.

Leĝo de senĉesa moviĝo kaj ŝanĝiĝo de ĉio enmondo.

Leĝo de neado de la neado.

Leĝo de transpaso de kvanto al kvalito

Leĝo de progresiva evoluo je formo de spiralo.

Dialektiko estas sendube ia potenca ĝeneraligo de la ordinara formala logiko posedata de homoj kaj uzata dum ĉiutagaj rezonadoj, kie okulfrapas parte la leĝo de ekskludenda trio, kio signifas ke inter du kontraŭaj eldiroj pri la sama objekto kaj sama loko nur unu estas ja vera, dum la alia malvera. Ekz.: „Mi estas hejme” kaj „Mi ne estas hejme”. Certe nur unu el ĉi tiuj eldiroj estas vera.

Sed la formala logiko estas malforta por solvi eksterordinarajn situaciojn kie povas interveni la homo. Tial iu filozofo estas dirinta ke „la formala logiko similas al tiu ĉasta sinjorino ene de la kortomuroj de sia hejmo, kiu ĵus transpasinte tiujn murojn involviĝas en la plej strangaj kaj surprizaj aventuroj”.

Ni ilustru ĉi tion per la ekzemplo cirkulanta en la studentaj rondoj: „Dum iu pluvstorma tago juna viro veturis per sia malgranda, dusidloka aŭto. Ie for de la urbo, ĉe busstacio sur la stratorando, li rimarkis tri personojn: unu ŝajne tre malsanan maljunulinon, unu mediciniston, kiu iam estis savinta al li la vivon kaj unu belan modelulinon. Kiun el tiuj tri li invitos en sian aŭton?”


La formala logiko kondukus lian penson al la analizo de ĉiu persono aparte, laŭ kiu indus inviti kaj la maljunulinon evidente tre malsanan pro humanismaj kialoj, kaj la mediciniston pro moralaj kialoj, kaj ankaŭ la belulinon, pro spiritaj kialoj. Sed kion ja faris la viro en ĉi tiu eksterordinara situacio? Li elaŭtiĝis kaj enmanigis la ŝlosilojn al medicinisto petante lin kunvojaĝi kun la maljunulino, dum li mem restis ĉe la bustacio kun la belulino atendante la sekvan buson.

La popolo delonge estas malkovrinta la dialektikon de la vivo, kio estas esprimita jam en siaj proverboj kaj saĝaj vortoj. Ni menciuj ekz. Nastradinon kiu kiomfoje malsupreniris la ŝtuparon ploris ĉar rememoris ke li devus denove supreniri ilin..

Ĉu dialektiko speguliĝas en matematiko? Certe jes.

En la matematiko, komencante kun la elementa, oni renkontas konceptojn kaj operaciojn tute kontraŭajn, kiel pluso kaj minuso, multipliko kaj divido, surpotencigo kaj elradikiĝo, potencigo kaj logaritmiĝo, diferencigo kaj integriĝo.

Ofte oni renkontas tiel nomatajn paradoksaĵojn ankaŭ en matematiko. Ni rigardu ekzemple la apudan figuron. Oni povas atingi B de A laŭ pluraj vojoj, interalie laŭ arko de duoncirklo je diametro AB aŭ laŭ tiuj sinsekvaj arketoj same duoncirkloj sed je diametroj je duono, kvarono, okono ktp de AB. Kiu vojo pli longas? Kelkaj povas aserti ke pli mallongas la unua vojo, kio ne veras.



Se ni plenumas sinsekve du kontraŭajn operaciojn, ni akiras la unuan esprimiĝon. Ekz.:

– $\sqrt{a^2} = a$ por $a > 0$, do la elradiĝo de kvadrato donas mem a ;

– inverse $(\sqrt{a})^2 = a$, do la dua potenco de la radiko donas mem a ;

– la produkto de du negativaj nombroj donas pozitivan nombron:

$(-)*(-) = (+)$.

– la inverso de inverso donas mem la nombron:

$1/(1/a) = a$;

– logaritmo je bazo a de la potenco x donas mem x :

$\log_a a^x = x$;

– la potenco de je logaritmo surbaze a de x donas mem x :

$a^{\log_a x} = x$

– la diferencialo de integralo de $f(x)$ donas $f(x)$:

$$d \int f(x) dx = f(x);$$

– la integralo de diferenciale de $f(x)$ donas denove $f(x)$:

$$\int d(fx) = f(x).$$


La supre menciitaj ekzemploj atestas ja pri la apliko de la leĝo de neado de la neado.

La historio de evoluo de la matematika penso fakte estas ja historio de la dialektika evoluo de konceptoj, metodoj, teorioj ekde antikveco ĝis nuntempo. Se la tiel nomata elementa matematiko, de konstantaj grandoj spegulis pli malpli la moviĝon kaj la ŝanĝiĝon, la matematiko de la lastaj tri jarcentoj, la kalkulo aŭ diferenciale kaj integrala kalkuloj formiĝintaj danke al Njutono kaj Lajbnico spegulis ĝin plene kaj adekvate. La ideo de variabla dependa kaj sendependa (funkcio) eniris vaste en matematikon kaj trovis poste sennombrajn aplikojn en la aliaj natursciencoj kaj en la teĥniko. La koncepto de derivaĵo kiel rapideco de ŝanĝiĝo de la funkcio depende de argumento spegulas ja ĝuste tiun dialektikon de la aĵoj. Samtiel la konceptoj de infinitezimo, limeso ks.

Ankaŭ en matematiko la konceptoj havas sian historion de naskiĝo, evoluiĝo kaj perfektigiĝo, ĝeneraliĝo. Ni prenu ekzemple la nombron:

Je komenco ĝi esprimis la komunan kvantecan karakterizaĵon de aroj kiuj povus interkorespondiĝi inter si. Ni diru, ĉiuj aroj enhavantaj tiom da elementoj kiom da fingroj estas sur la mano karakteriziĝas de la nombro kvin; tiuj, kiuj interkorespondas kun la piedoj de la hundo karakteriziĝas de nombro kvar, ktp. Ekestiĝis tiamaniere la unua nombraro, la numeroj naturaj 1, 2, 3,


La divido de aĵoj en partoj helpis al la ideo de frakcioj. Poste oni komprenis ke devas ekzisti ankaŭ alispecaj nombroj malpli konkretaj kiel la negativaj kaj nulo inter ambaŭ aroj. La negativaj nombroj interpretiĝis kiel ŝuldoj kontraŭ riĉaĵoj, perdoj kontraŭ profitoj ktp. La nova nombraro nomiĝis racia.



La unua iracia nombro

Kiam matematikistoj renkontiĝis kun la raporto de diagonalo de kvadrato al ties eĝo ili ekkomprenis ke temis jam ne pri iu frakcio, tiuj segmentoj ne povus kunmezuriĝi, tio estas, ne estus eble prezenti la longon de diagonalo kiel finia aŭ nefinia decimala nombro de formo 3,4155555 aŭ 3,256 ks.

Tial ili eknomumis la novan nombron malracia kaj la novan aron malracia aro kiu rezultiĝis notinde pli granda ol la racia mem kaj plenigis kune kun la raciaj komplete la nombroakson. Ĝi nomiĝis reelaj aroj.



La evoluo de la koncepto de nombro

Plue, la aro de ordigitaj reelaj paroj formas la aron de kompleksaj nombroj je formo $a + bi$ kiu reprezentas pluan ĝeneraliĝon de reelaj nombroj. Tiu ĉi proceso kontinuas ankoraŭ hodiaŭ per ĉiam novaj aroj kaj montras la progresivan evoluon de unu ĉeno de spiralo al alia pli alta.

Nature oni ekspektis por la novaj nombraroj ke ili konservu la ecojn de antaŭaj, sed ekhavu ankaŭ novajn ecojn, esprimante tiel la transpason de kvantaj ŝanĝiĝoj al kvalitaj. Tiel, por la naturaj nombroj ne ĉiam havas signifon la rezulto de substraho, ĉar ekz. $7 - 10$ ne donas naturan nombron, kio ne okazas ja en la aro de entjeraj nombroj Z kaj en la plej superaj aroj.

Por la entjera nombraro ne ĉiam havas signifon la operacion de divido, ĉar ekz. $7/10$ ne estas entjero, dume tio estas normala por la aro de frakciaj nombroj aŭ racia nombraro.

La elradikiĝo ne ĉiam havas signifon en la aro de reelaj nombroj ĉar ekz. la dua radiko de minus unu ne estas reelaj, sed ĝi estas ja kompleksa nombro. Samtiel, se ni esploras la dekomencan koncepton de la aro. La finiaj aroj akceptas la leĝojn de aritmetiko, kiel ekz. la leĝon de interŝanĝo de pozicioj $A+B=B+A$ kaj $A+B>A$ aŭ $A+B<A$, dum por nefiniaj aroj oni konstatas ankaŭ kvalite novajn leĝojn. Ekz. en ili povas estis $A+B=A$. Ni prenu la aron de numeroj (naturaj nombroj) kaj aron de paraj numeroj. Ili ambaŭ entenas senfine da elementoj, tamen ili ne povas submetiĝi al la rilatoj $A>B$ aŭ $A<B$, kontraŭe por ili validas la rilato $A+B=A$ ĉar ĉiu para nombro estas samtempe ankaŭ natura nombro.

Similaj konkludoj povas akiriĝi se ni komparas la finiajn seriojn kun tiuj de nefiniaj. Por ili oni ne ĉiam povas apliki la leĝojn konstatitajn por finiaj kaj konverĝaj serioj, tio estas ekz. oni ne povas ilin derivigi aŭ intergrigi po unuopaj termoj. Aŭ ili povas rezultigi post adicio ne ĉiam difinitajn seriojn, ĉar okazas ke la sumo de du nefiniaj serioj povas rezultigi iam konverĝan iam ne konverĝan seriojn:

$$\sum_1^{\infty} 1/n - \sum_1^{\infty} 1/n = 0 \text{ aŭ divergan} \quad \sum_1^{\infty} 1/n + \sum_1^{00} 1/2n$$

Bardhyl Selimi

Ago kaj stato ĉe participo

de Geraldo Mattos

Dum sia historio, la Akademio de Esperanto (AdE) trifoje traktis pri pasivaj participoj kaj voĉdonis pri ili:

- 1.) Cirkulero 79-a de la 27-a de julio 1965, en kiu estas konfirmata la aprobo de tio, ke la Fundamento de Esperanto (FdE) havas klaran instruon pri la uzo de la participoj: 24 aproboj el 33 voĉdonantoj.
- 2.) Cirkulero 84-a de la 10-a de novembro 1966, en kiu ne estas konfirmata la aprobo de la rezolucio pri la uzo de la participoj pro unu sola mankanta voĉo, ĉar estus necesa pli ol duono de la 43 tiamaj akademianoj: 21 aproboj el 24 voĉdonoj.
- 3.) Cirkulero 91-a de la 23-a de novembro 1967, en kiu estas konfirmata la senco de kvar testofrazoj, en kiuj aperas estantaj kaj estintaj pasivaj participoj: 26 el 37 voĉdonintoj, nome pli ol duono de la akademianoj, opinias, ke la esprimo „esti -ata” neniam povas indiki finitan okazaĵon.

Ege lamentinde tamen estas, ke neniam reguloj estis donitaj de la AdE por la bona uzo de la participoj. La tria voĉdono estas plene senutila, ĉar ĝi nur interpretas kvar frazojn, kiujn ĉiuj lingvouzantoj devos mem interpreti por konstati, ĉu ili kongruas kun ĉiuj frazoj de la FdE kaj la lingvouzo de Zamenhof. Krome, el la kvar frazoj kun pasivaj participoj du prezentas ilin estantaj kaj du ilin estintaj, sed ĝis nun estas multaj eraroj ankaŭ koncerne la aktivajn participojn...

Multe pli grava estas la fakto, ke unu el la kvar testofrazoj prezentas eraran interpreton, ĉar ĝi aperas ekster sia kunteksto:

2 – „Mi promesas, ke mia ŝuldo estos pagita la 9-an de majo.”

- =
- A) la ŝuldanto senŝuldiĝos la 9-an de majo;
 - B) la ŝuldanto senŝuldiĝos plej malfrue la 8-an de majo.

La fuŝon tamen mia afabla geleganto konscios post la sekvantaj klarigoj. Se ni komparas la simplajn verboformojn kaj la kompleksajn, estigitajn per la kopulo, ni alvenas al la sekvantaj konkludoj pri iliaj sencoj kaj interrilatoj:

Aktivo	Pasivo	Ekzemploj aktivaj: agoj	Ekzemploj pasivaj: agoj
lavas	estas lavata	li lavas bebon	bebo estas lavata
lavis	estis lavata	li lavis bebon, kiam mi eniris	bebo estis lavata de li, kiam mi eniris
lavis	estis lavita	li lavis bebon kaj nun lin vestas	bebo estis lavita de li kaj nun vestata
lavos	estos lavata	li lavos bebon	bebo estos lavata de li
lavus	estus lavata	li lavus bebon	bebo estus lavata
lavu	estu lavata	li lavu bebon	bebo estu lavata de li
lavi	esti lavata	lavi bebon estas necese	esti lavata estas necese al bebo

El la supraj informoj evidentiĝas, ke la estinta verboformo estas unusenca pri tio, ke ĝi indikas pasintan fakton koncerne la momenton de la parolo, sed dusenca pri la tempo de la ago: nur la kunteksto decidas, ĉu temas pri okazanta aŭ okazinta fakto en tiu pasinteco... Bonan ekzemplon donas al ni la Ekzercaro de la FdE (17:8), en kiu la verboformo parolis egalas al la esprimo estis parolanta [malsupre, miaj grasaj literoj]:

[...] dum ŝi parolis, elfalis el ŝia buŝo multego da diamantoj.

Alia ekzemplo de la sama FdE (15:3) permesas al ni revidi, ke la rilato inter pasinta verboformo kaj participo estas duobla, ĉar al tiu sama verboformo respondas jen estinta, jen estanta participo [miaj grasaj literoj]:

Kaj ŝi tuj lavis sian kruĉon kaj ĉerpis akvon en la plej pura loko de la fonto kaj alportis al la virino, ĉiam subtenante la kruĉon, por ke la virino povu trinki pli oportune.

La transformo pruvas miajn vortojn kaj kondamnas la kurantan ideon, ke participoj egalas al adjektiva subpropozicio, origino de la abundaj eraraj elektoj de participoj, kiuj neniam estas verboformoj, sed substantivoj, adjektivoj aŭ adverboj:

Kaj tuj lavinte sian kruĉon kaj ĉerpinte akvon en la plej pura loko de la fonto, ŝi alportis al la virino kaj ĉiam subtenis la kruĉon, por ke la virino povu trinki pli oportune.

Ni do konkludas pri la dusenceco de la is-vorto: la formoj lavis kaj ĉerpis respondas al la formoj lavinte kaj ĉerpinte, ĉar ili indikas okazintajn agojn en la pasinteco, dum la formo subtenante respondas al la sama is-formo, kiu nun indikas okazantan agon en la pasinteco.

La E-aj pasivaj participoj ne estas simetriaj al la koncernaj verboformoj, ĉar ili prezentas neuzatajn kaj dusencajn esprimojn depende de la semantika tipo de la verbo.

Statoverboj estas tiuj, kies halto kaj fino produktas la saman senestecon per ordinara neplueco, kaj estas karakterizataj de la neuzo de la estinta participo kaj de la malofta uzo de la estonta. La neuzo de la estintaj participoj devenas de simpla bonedukiteco, ĉar estas pli delikate paroli pri la fino de stato ol pri la daŭro de la koncerna statomanko, nome pli bone estas nei fakton ol jesi ĝian foreston:

Statoj: -ata	Statoj: -ita	Statoj: -ota
estas amata	estas amita [ne plu estas amata]	estas amota [estas estonta amata]
estis amata	estis amita [ne plu estis amata]	estis amota [estis estonta amata]
estos amata	estos amita [ne plu estos amata]	estos amota [estos estonta amata]
estus amata	estus amita [ne plu estus amata]	estus amota [estus estonta amata]
estu amata	estu amita [ne plu estu amata]	estu amota [estu estonta amata]
esti amata	esti amita [ne plu esti amata]	esti amota [esti estonta amata]

Netransiraj statoverboj kondukas egale, sed sen pasivo: dormi kaj sidi, kies estintajn participojn neniu uzas: dorminta estas ne plu dormanta kaj sidinta estas ne plu sidanta....

Agoverboj estas tiuj, kies halto kaj fino produktas apartajn rezultojn, ĉar la halto simple interrompas la agon, dum la fino ĝin kompletigas. La dissimetrio estas ege frapa:

Ago: -ata	Agoj: -ita	Statoj: -ita	Agoj: -ota
estas lavata		estas lavita	estas lavota [estas estonta lavata]
estis lavata	estis lavita	estis lavita	estis lavota [estis estonta lavata]
estos lavata		estos lavita	estos lavota [estos estonta lavata]
estus lavata		estus lavita	estus lavota [estus estonta lavata]
estu lavata		estu lavita	estu lavota [estu estonta lavata]
esti lavata		esti lavita	esti lavota [esti estonta lavata]

Lamentinda nescio de multaj estas tio, ke indikas agon nur unu el la kombinoj de la kopulo kun estinta participo [supre: estis lavita], dum ĉiuj aliaj ses kombinoj indikas nur sole staton!...

Adverbaj esprimoj pri tempo kaj daŭro permesas facile distingi inter la du malegalaj sencoj de la tempodependa ago kaj de la daŭrodependa stato ĉe la estintaj participoj de agoverboj:

Li estis lavita antaŭ du horoj [ago en tempo: li fariĝis lavita antaŭ du horoj].

Li estis lavita de du horoj [stato en daŭro: li troviĝis lavita de du horoj].

Se la supraj konsideroj estas ĝustaj, la 2-a testofrazo de la venkinta propono de la AdE pruis nenion krom demonstri, ke neniu el la voĉdonantoj vere mastris la sencojn de la participoj:

2 - Mi promesas, ke mia ŝuldo estos pagita la 9-an de majo.

= A) la ŝuldanto senŝuldiĝos la 9-an de Majo;

B) la ŝuldanto senŝuldiĝos plej malfrue la 8-an de Majo.

La saman rezulton havus la responda aktiva formo de tiu testofrazo:

Mi promesas, ke mian ŝuldon mi estos paginta la 9-an de majo.

La vorto kvita estas sinonimo kaj de la aktiva participo paginta kaj de la pasiva pagita: paginta homo estas kvita homo kaj pagita ŝuldo estas kvita ŝuldo...

En tiuj du okazoj de aktiva kaj pasiva frazoj la pago povus esti antaŭa sen la falsado de la farita promeso, nome unu aŭ du tagojn antaŭe: en la 9-a de majo estos pagita ŝuldo kaj paginta homo. La senco A postulus alian partupon, nome la estantan, kiu prezentus agon, dum la estinta indikas nur la rezulton de ago, kiun ajn daton ĝi proponus por la stateco:

Mi promesas, ke mia ŝuldo estos pagata la 9-an de majo.

Neniu el la respondoj estas do valida: plej malfrue li povus pagi je la unua sekundo de la 9-a de majo... La sola ĝusta interpreto de tiu frazo estas la sekvanta: en la 9-a de majo estos paginta homo kaj pagita ŝuldo... Tio tamen indikas nenion pri la momento de la pago, sed nur la unuan tagon de la kviteco!

Konklude, mi ĉiam trovis strange kaj skandale, ke ŝajne neniu esperantologo aŭ gramatikisto rekonis, ke tio estas nur la parolo, kiu difinas la epokon de la verboformoj estanta [dum la parolo: dirante, ke mi lavas], estinta [antaŭ la parolo: dirante, ke mi lavis] kaj estonta [post la parolo: dirante, ke mi lavos], dum tio estas nur la propra fakto [jen ago, jen stato, jen proceso], kiu difinas la epokon de la participoj estanta [dum la fakto, nome dum la lavo: lavanta homo kaj lavata vesto], estinta [post la fakto, nome post la lavo: lavinta homo kaj lavita vesto] kaj estonta [antaŭ la fakto, nome antaŭ la lavo: lavonta homo kaj lavota vesto]. En gramatikaj terminoj, la epoko de la parolo estas tempo, kaj la epoko de la fakto estas aspekto.

Tiaj eraroj venas de centjara instruo pri la participoj, komence de L. de Beaufront (Commentaire sur la Grammaire Esperanto, p. 47. Paris: Hachette, 1904. 156 p.):

Ce livre sera imprimé à Paris. Tiu libro estos presita en Parizo.

Se la libro estos presata en Bulonjo-sur-Marco kaj la eldonejo ĝin portos al Parizo, evidente ĝi estos presita en Parizo... La franca frazo parolas pri presata libro, sed la esprimo estos presita indikas rezulton de ago, kaj tie devus do aperi la esprimo estos presata, kiu estas mem ago... Stulta nescio, ke la franca imprimé estas dusenca: jen presata, jen presita!

Por fina konsolo, fuŝelektita participo neniam estigas gramatikan eraron, sed nur semantikan paradokson, kiel la sekvanta: La partoprenintoj voĉdonis kun la Prezidanto...

Kaj lasta konsterno: la AdE mortigis la estantajn participojn aktivan kaj pasivan, kiujn nur kelkaj miraklantoj revivigas...

Georges-Henri Clopeau

Nur Esperanto povas savi la lingvan diversecon, per taŭga pedagogio

La Eŭropa Unio (EU) ekkonscias pri la utileco de la komunikado inter la eŭropanoj kaj pri la baroj kiujn la lingva diverseco signifas por la komunikado. Oni ekkonsciis, ke se oni ne ekagos, baldaŭ la lingvo kiun oni plej ofte uzas iĝos la ununura oficiala lingvo de Eŭropo. Sed la sola reago ĝenerale proponita estas: trudi lernadon de tri eŭropaj lingvoj al ĉiu eŭropano. Tiel, la plej potencaj ŝtatoj de Eŭropo esperas savi sian propran lingvon. Tiu lingva politiko ne ebligas, ke ĉiu eŭropano kapablu komuniki kun ĉiuj aliaj, krom se estas inter la tri altruditaj lingvoj unu komuna por ĉiuj, do tiu politiko ne donas egalan ŝancon por ĉiuj eŭropaj lingvoj. Ĝi nur plifortigas la evoluon al la supereco de la angla lingvo.

Sen rapida reago, baldaŭ la tutaj eŭropaj vivo kaj kulturo vortiĝos en la angla lingvo, kiu post du aŭ tri generacioj superregos ĉiujn lingvojn esprimantajn nun la kulturen riĉecon de Eŭropo

Kial?

La historio instruas nin, ke ĉiuj nunaj lingvaj areoj koincidas kun areoj kie havis potencon princo aŭ reĝo aŭ – pli moderne – iu nacia registaro. Tiel, la lingvo nomata „natura” estas nur la lingvo ekinstruita de la bebeco. Tiu lingvo tiel multe necesas por la funkciado de la socio. Dependante de la aktuala politika potenco, la gepatroj strebas instrui ĝian lingvon al la infanoj, eĉ anstataŭ la lingvo kiu devenas de la geavoj. Kaj tiel, post kelkaj generacioj, la lingvo de la politika potenco iĝas la gepatra lingvo, en la tuta areo kie tiu potenco regas.

Ne nur la bretonoj kaj la okcitanoj povas konfirmi tion, kaj kompreni la strebojn kiuj necesas por konservi vivanta la memoron de kulturo kies lingvo ne estas tiu de la politika potenco. Tian situacion oni povas observi en multaj regionoj de Eŭropo, kie la politikaj potencoj oftege movis la landlimojn. Sekve en Eŭropo estas multaj minoritataj lingvoj. Eŭropo, nomata „25-lingva”, konsideras nur la naciajn lingvojn; fakte estas pli ol 50 lingvoj en Eŭropo!

Do, ĉiam la politika potenco altrudas sian lingvon. Hodiaŭ estas devigate konsciiĝi, ke tiu politika potenco, fondita de la komerco kaj de la financo, parolas angle. Ĉiuj eŭropaj lingvoj estas nun en sama

stato kiel estis ekzemple la bretona antaŭ cent jaroj. Ĉiuj gepatroj nun volas, ke la infanoj parolu la anglan. Tute nature ili postulas ke tiu lingvo estu instruata fruege, eĉ tre frue, kaj, post kelkaj generacioj, eĉ antaŭ la gepatra.

Multaj eŭropanoj, implikitaj en ekonomiaj aferoj, opinias ke oni devas „esti realisto”, „ne revanto”, kaj oni kuraĝe eklernu la anglan lingvon; ĉar „la faktoj estas tiaj” ne ŝanĝeblaj. Sukcesos en la vivo nur tiuj, kiuj perfekte regas tiun lingvon.

Feliĉe, ne ĉiuj tiel facile akceptas la finan forpason de la aliaj lingvoj. Kaj oni sin alkroĉas al la ideo: devige instrui du aŭ tri naciajn lingvojn al ĉiuj eŭropaj infanoj. Rimarku unue, ke en la 25-lingva Eŭropo, por certigi komunikeblecon inter du ajnaj eŭropanoj, necesus, ke ĉiuj regu 13 lingvojn; tio estas multe pli ol kvar! Do por certigi komunikeblecon inter du ajnaj eŭropanoj, nepre necesas havi unu komunan lingvon. Do, la multlingvismo ne certigos egalecon inter ĉiuj, kaj ne malebligos la „naturan” devigon al ununura lingvo, al tiu de la potenco.

Aliparte, oni estu realistaj. Lerni unu fremdan lingvon postulas multe da tempo, kaj, por pli ol duono de la homaro, lerni pli ol du malebligas ĉiun aliron al scienca kulturo. (Jam, oni povas taksi la laŭstatistikan antaŭiĝon en scienca esploro de la denaskaj angloparolantoj, kiuj ne bezonas lerni fremdan lingvon). Tiel, la starigo de plurlingvismo kreas hierarkion, kiu brilos en neniuj tereno.

Nu, kion proponi?

Iuflanke, ĝeneraligado de la instruado de la angla lingvo estas nun ne evitebla, ĉar la nuna potenco estas anglalingva. Aliflanke, tiu supereco, kiu kuntrenas perdon de vivoforto por ĉiuj lingvoj kaj malfekundan uniformigon de la kulturo, estas tute ne akceptebla. La problemoj ŝajnas esti nesolveblaj.

Feliĉe, la metodo kiu estas la plej efika, plej rapida, kaj la plej ŝparema por lerni fremdajn lingvojn (kaj precipe la anglan), estas lerni antaŭe E-on.

Se oni akceptus uzi tiun metodon, plej multe da eŭropanoj alirus al la lingvo de la potenco, kaj la deziro de ĉiuj gepatroj (deziro trudita de la faktoj), estus realigita. Sed plue, ĉiuj infanoj pli bone analizus sian patrinan lingvon, kaj ili lernus pli bone kaj pli rapide la lingvojn kiujn ili elektus laŭ sia intereso.

Pli poste, kiam ĉiuj eŭropanoj scios E-on, nur tiuj kiuj interesiĝas pri la angla kulturo elektos lerni la lingvon de Shakespeare (kiun jam kelkaj angloj ne plu komprenas). Starigo de propra eŭropa potenco ebligos, kvankam ĉiuj lingvoj, eĉ minoritataj, povos vivi sen esti polucitaj, kaj radii t.e. interesi homojn parolantajn aliajn lingvojn.

Sendube, dezireblas ke eŭropaj lernantoj devige lernu almenaŭ du lingvojn krom E-o kaj la patrina. La unua estus tiu de la pli proksima najbaro (kiu, en kelkaj kazoj, ne estas en alia nacio – ekzemple la francparolantoj kiuj loĝas en la okcidenta Bretonio lernus la bretonan, kaj tiuj kiuj loĝas en la orienta lernus la galian) cele krei ĉe ĉiu landlimo specon de kunligo. La dua estus elektita tute libere de nura kultura interesiĝo aŭ sciemo; tiu eĉ eble estus regiona lingvo de tre malproksima lando. Evidente, ne

estus malpermesite lerni pli multe da lingvoj (emo kiun ofte donas la antaŭa lernado de E-o). Sed tiuj studoj ne estus truditaj al ĉiuj lernprogramoj, ĉar ekde kiam realiĝos la ebleco komuniki kun ĉiuj, estos akcepteblaj, ke kelkaj studentoj ŝatos utiligi pli da tempo por matematiko aŭ sciencoj aŭ aliaj fakoj.

La eblo por ĉiu komuniki kun ĉiuj, farante unu al la alia la saman paŝon, laŭ perfekta egaleco, estas nepre necesa kondiĉo por demokrata vivo (precipe por „partoprena” demokratio). La angla lingvo estas tro malfacile skribata (fantazia ortografio), tro riĉa je „anglismoj”, tro nepreciza por ke ĉiu povu mastri ĝin, malgraŭ la grandegaj financaj kostoj kiujn la eŭropaj ŝtatoj ŝajnas akcepti. Tiu lingvo kreas hierarkion kie angloparolantoj ricevas la plej influajn postenojn, kiujn multaj eŭropanoj ne povos atingi.

Esperanto en lernejo

La sekvaj faktoj multfoje estis pruvitaj: Ĉiu instruisto de lernejo kiu instruas sian gepatran lingvon kapablas, post kelkaj horoj de E-studado, komenci enkonduki siajn lernantojn en E-on. Fakte, sciante la neŝanĝiĝantan sonon de ĉiu litero kaj la neŝanĝiĝantan lokon de la akcento, reflekse legante tiujn literojn, aliparte sciante la 16 gramatikajn regulojn kiuj enhavas neniun escepton, li povos instrui nenion falsan. Li komencos instrui per kelkaj radikoj kaj afiksoj, kaj instruante ankaŭ li mem progresos: Li lernos novajn radikojn kaj precipe li progresos por lerte konstrui vortojn kaj frazojn. Post unu lernoĵaro, li kapablos legi kaj skribi kun helpeto de vortaro. Liaj gelernantoj same kapablos, sed malpli lerte, malpli rapide, kaj kun pli ofta uzo de la vortaro. Internacia korespondado estos organizata kaj, fine de la tria lernoĵaro, lernantoj kaj instruisto kapablos kune partopreni internacian kunvenon kun samaĝuloj.

Por esti efika, la instruado de E-o en elementa lernejo (tri jaroj inter la 8-a kaj la 12-a) estu nepre ligita al instruado de la patrina lingvo po 10 aŭ 15 minutoj tage (kaj ne per longaj kursoj disigitaj de longaj interrompoj). La gepatra lingvo, analizo kaj gramatiko, profitegos el tiu instruado, kaj ĉiu fako profitos el la precizeco kaj logikeco de E-o.

Neniu alia metodo ebligas atingi la (dume) deziratan celon por la angla lingvo, tiel certe, tiel rapide, kaj tiel ŝpareme. Rifuzi ĝin klare signifas akcepti, ke la disvastiĝo de la angla ne estas provizora, kaj deziri kompletan kaj definitivan submetiĝon sub la angloparolanta potenco.

Antologieto de nia originala konversacia stilo

Kiel trudherboj aperadas la substrataĵoj el la nacia aŭ la adorata reglingvo. Niaj lernolibroj malsufiĉe nin ekipas por povi lojali al la bona mondlingvo. Sed jen la frazoj (kompilitaj el nia komuna originala parollingvo de ĉiuj rangoj kaj klasoj), prezentitaj por sinkorektemuloj, do en la ILEI-konferenco en Ranzan 2007. Konsole sekvos solvoj (korekteblaj, mi konscias kaj atendas).

Mi aldonis: “falsigita” por ke ĉiu korektu eĉ tion!

- 1) Jen importa rimarko.
- 2) Ĉu la notico estis konita al vi? (temis pri la vorto „gemuta”)
- 3) Bv. disponu al ni veganan manĝon.
- 4) Oni ankaŭ provizu fruktojn al ni.
- 5) Li survivis samkiel sia filino, malgraŭ suferis persekutadon.
- 6) Kial vi iras al la maljusta direkto?
- 7) La ondoj malbonigis ŝin. Kiel vi estas nun?
- 8) Li ricevis leteron postulanta sian sinmortigon.
- 9) En duono da horo ni ne finiĝos, ĉar tuj komencos novaj proponoj.
- 10) Multaj de ni portas nobelulajn nomojn.
- 11) Donu al ni ĉanson paroli kun la portugaliano.
- 12) Se mi estas permesata preni someran ferion, mi povas ebligi vin profiti mian gastemecon.
- 13) Al kiu mi ĵetos la pilkon? (en embaraso, kiam subite pilko alflugis kaj pene kaptiĝis.)
- 14) Ni devas interesigi la homojn al Esperanto.
- 15) Bv ne obstrukcii la vojon al la policio.
- 16) Ni devas translokigi la televidon.
- 17) Des pli da ciferoj des pli nia akurateco malpliĝas.
- 18) Mi venis por plezuri vin, infanojn!
- 19) Se vi falsigos la kuponojn, vi venenigos la etoson.
- 20) Se lernanto batas iun de la alia sekso, ĉu ni tiun punu, donu al tiu prelegon aŭ forprenu de tiu la rajton plu partopreni la lecionojn aŭ ĉu tiu rajtas sin pravigi sen ke ties nomo estus enskribita en la nigra libro? (Ni diskutis pri la dubinda „ŝli”.)
- 21) La blankuloj venis por koloniigi niajn prateritoriojn.
- 22) Kaj nun ni devas halti la paroladon.

- 23) Ni komenciĝu kun zero.
- 24) Bonan duŝon al vi, Wim! (al mia samĉambrano)
- 25) Estis emociiga sonĝo (de l'homaro).
- 26) Mi ne aŭdis vin pri kion vi intencas fari.
- 27) Mi deziras helpi por ke vi povas paroli senerare.

Solvoproponoj. Sed mi malfermos la orelojn por viaj komentoj.

- 1) Jen grava rimarkigo!
- 2) Ĉu vi konas la nocion? (Ĉu la nocio estas konata de vi?)
- 3) Bv (Bonvolu) disponigi al ni veganan manĝon.
- 4) Oni provizu nin ankaŭ per fruktoj.
- 5) Samkiel lia fratino (!) li postvivis, kvankam ili suferis persekutadon.
- 6) Kial vi iras en la malĝusta (malbona) direkto?
- 7) La ondoj ŝin malbonfartigis. Kiel vi fartas nun? (Kia vi sentas vin nun?)
- 8) Li ricevis leteron postulantan lian memmortigon.
- 9) En duonhoro (En duono de horo) ni ne finos, ĉar tuj komenciĝos novaj proponoj.
- 10) Multaj el ni havas nobelan nomon.
- 11) Donu al ni ŝancon paroli kun la portugalo.
- 12) Se oni permesos al mi preni somerajn feriojn (se estos permesite al mi), mi povus ebligi al vi profiti de mia gastamo (ĝui mian gastamon).
- 13) Al kiu mi ĵetu la pilkon?
- 14) Ni devas interesigi E-on al la homoj/interesi la homojn pri E-o.
- 15) Bv. ne obstrukci la vojon al la polico.
- 16) Ni devas transloki la televidilon.
- 17) Ju pli da ciferoj, des malpliigās nia precizeco. (akurata signifas nur „ĝustatempa”)
- 18) Mi venis vin plezurigi, infanoj!

19) Se vi falsos la kuponojn, vi venenos la etoson.

20) Se lernanto batas iun de la alia sekso, ĉu ni tiun punu, donu al li aŭ ŝi prelegon aŭ forprenu de la kulpulo la rajton plu partopreni en la lecionoj aŭ ĉu la koncarnato rajtus sin pravigi sen ke la nomo estus enskribita en la nigra libro?

21) La blankuloj venis kolonii niajn prateritoriojn.

22) Kaj nun ni devas haltigi (ĉesigi) la paroladon.

23) Ni komencu de nulo (per nulo).

24) Bonan duŝiĝon al vi, Wim!

25) Estis emocia sonĝo. (Eĉ tiu de la homaro okazis en „densa mallumo”, do nokte: ne temas pri revol!)

26) Mi ne aŭdis de vi, kion vi intencas fari (regulo de la nereкта parolo!)

27) Mi deziras helpi, (por) ke vi povu paroli senerare!

Rob Moerbeek

Instruado de Esperanto en la lernejoj de Perto (AU)

La komenco – Idyŝ Einihovici

Ŝi estis rumandevena aŭŝtralianino, kiu ege fervore propagandis E-on. Pri ŝia ideo instrui la lingvon en elementaj lernejoj ŝi sukcesis persvadi kelkajn lernejestrojn de la tielnomataj Montessori-lernejoj, kies celoj kaj metodoj malsamas de la „ordinaraj” ŝtataj lernejoj kaj kiuj estas pli malfermitaj al bonaj, sed nekutimaj edukaj ideoj.

+ FOTOJ

Trevor Steele

En 1996, invitite de la bonhava Idis, venis al Perto Trevor Steele. Pagite de Idis li instruis E-on en 3 Montessori-lernejoj: Fremantle, Riverlands kaj Perth. Temis pri granda kvanto de lernantoj 3- ĝis 12-jaraj, kiuj ricevis dum 10 monatoj ĉiusemajne po 1 lecionon 15-30-minutajn. Trevor instruis E-on ankaŭ al ŝia kolegino Sheryl Ridout.

Sheryl Ridout

Post la foriro de Trevor en la Perth Montessori-lernejo transprenis la instruadon de E-o Sheryl Ridout. Ŝi aktivis proksimume de la komenco de la 4-a instru-jarkvarono de 1997 ĝis la fino de 1999 kaj instruis entute proksimume 50 infanojn.

Patricia O'Connor

La elementa lernejo Deanmore estas unu el la Pertaj lernejoj, en kiuj okazas speciala instruado al aparte interesataj kaj talentaj infanoj. Kadre de ĝia programo Patricia gvidis 9-semajnan kurson en junio-aŭgusto de 1999, titolita „Esperanto kaj arto”. La instruado okazis po du horoj semajne kaj partoprenis ĝin 16 lernantoj 8-12-jaraj.

En la Perth Montessori-lernejo ŝi instruis E-on dum la lerneja jaro de 2000. Ĉiusemajne 1 lecionon ricevis entute proksimume 60 infanoj.

Aparta aktivaĵo de Patricia estis la preparo kaj prezento de ses 30-minutaj E-lecionoj por komencantoj, kiuj estis prezentitaj al la ĝenerala publiko posemajne en februaro-marto de 2000 per la televida Kanalo 31 Perth kaj Kanalo 31 NSW (Nov-Sudkimrio). La filmado okazis kadre de la instruprogramo por la triagrada edukado.

Penelope Vos

En 1997 Penny estis vic-estrino de sendependa, alternativa mezlernejo Foothills, kies estraro decidis enkonduki la instruadon de E-o. Penny volontulis lerni kaj instrui E-on preskaŭ samtempe kaj la programo komenciĝis. Ĝiajn financajn kondiĉojn certigis denove Idis Einihovici.

Dum 1997-99 E-o estis deviga lernobjekto en la 8-a klaso, elektebla en la aliaj kaj lernis ĝin entute 50-80 infanoj. Interalie la lernantoj ĝuis la perkomputilan korespondadon kun la Svislanda klaso de Vera Zaslavsky.

En 2000 Penny ekinstruis E-on en 2 klasoj de la Treetops-lernejo. E-o iĝis tie parto de la normala studtemaro en 2001 kaj tiel restis ankaŭ en la sekva jaro. Tiamaniere ĉiujare lernis la lingvon proksimume 150 lernejoj.

Treetops

La aktuala direktorino de ĉi tiu Montessori-lernejo, Carol Brands, estas sendependa pensulo al kiu imponas la logiko kaj justeco de E-o. E-o estas lingvo servanta la pacon – ankaŭ tio kongruas kun la Montessori-filozofio. Ĝi estas pli facile lernebla ol la aliaj lingvoj, havas propedeŭtikajn valorojn ktp. Pri tio ĉio parolas Carol preskaŭ de 10 jaroj al la gepatroj, kiuj volas enskribigi siajn infanojn al la lernejo.

Saani Bennetts

En 2003 Penny foriris el Perto. Ŝian laboron transprenis la juna instruistino Saani, kiu restis en la lernejo ĝis 2005. Ŝi instruis E-on al diversaĝaj lernantoj po unu lecionon semajne.

En 2005 la Aŭstralia E-Asocio per speciala fonduso ebligis al 5 junaj Pertaj instruistinoj partopreni la 2-semajnan E-somerkursaron en Adelajdo. Unu el ili estis ĝuste Saani. Venis ankaŭ ŝia koleginino Merradean Pettit, kiu tiam nur komencis la lernadon de E-o. Saani decidis organizi por siaj E-lernantoj vojaĝon al eksterlando – al la fora Svislando.

Vojaĝo al Svislando

En 2005 venis al la lernejo Treetops-letero de Vera Zaslavsky el La Chaux de Fonds, Svislando. Ŝi estis estrino de la privata lernejo Le grande orse (La granda urso) kun 25-30 lernantoj, kiuj lernis, interalie, E-on. Vera invitis la aŭstraliajn infanojn al vizito en Svislando. La infanoj el la du lernejoj komencis korespondi kaj Saani kun la helpo de Merradean Pettit, nomata nur Mo, ekis la monkolektadon. La subteno venis de la Aŭstralia E-Asocio (AEA), de la E-ligo de Okcidenta Aŭstralio (ELWA) kaj de la Montessori-lernejo Treetops mem.

En oktobro de 2005 naŭ 10-13-jaraj E-lernantoj el la Perta Treetops-lernejo pasigis 2 kaj duonan semajnojn en Svislando. Gvidis ilin Saani kaj Mo. – “La infanoj bone intermiksiĝis. Ĉar la svisoj ne parolis la anglan kaj la aŭstralianoj konis nek la francan, nek la germanan, ili devis uzi E-on. Komence estis por ĉiu malfacile, sed ĝis la fino de la 2-a semajno ilia memfido multe kreskis. Niaj etuloj revenis al Aŭstralio plenaj de entuziasmo pri E-o kaj per ĝi ili infektis ankaŭ tiujn, kiuj restis hejme. Iliaj rakontoj pri la travivaĵoj ege motivigis la aliajn al la lernado.” – diris Saani.

Merradean – Mo

Post 3 jaroj de E-instruado en Treetops Saani forlasis la lernejon. Ŝian rolon transprenis Mo. Mo uzas por la instruado la ŝtatan programon „Language teachers curriculum”. Ĝi estas deviga, sed servas nur kiel framo. En la Montessori-lernejoj oni substrekas la instruadon laŭ la individuaj ritmoj de la infanoj, do ne ĉiu faras samtempe la saman taskon.

Pasintjare (2006) en Treetops lernis E-on 150 lernantoj 4-15-jaraj. Ili havis po unu 45-60-minutan lecionon semajne. De ĉi tiu jaro la lernejo alprenis la instruadon de 16-18-jaraj geknaboj. Kadre de la programo „Internacia bakalaŭreo” oni instruas al ili la hispanan. Sed Mo havas alian ideon: kial ne E-on? Por lerni nian lingvon per „Internacia bakalaŭreo” necesas, ke tutmonde lernu ĝin almenaŭ 200 lernantoj.

Mo sukcesis venigi grupon de siaj E-lernantoj al la ĉi-jara Aŭstralia Somerkursaro en Tasmanio. Inter Perto kaj Hobarto estas granda distanco kaj du semajnoj kostas ne malmulte. La helpo venis denove de AEA (ĝi pagis la loĝadon, manĝadon, kurskotizon de la infanoj), ELWA (donis po 250 AUD por la vojaĝkostoj de infanoj) kaj de Treetops mem (pagis la elspezojn de la instruistino).”

Fino?

Evidente ne, la E-instruado ja daŭras kaj Mo kun Saani jam planas novan E-vojaĝon. Ni esperu legi pri ĝi en la baldaŭa estonto kaj pri la lerneja E-instruado en Perto ankoraŭ dum multaj jaroj.

Katarina Steele

Graziano Ricagno:

Malrapide tradukanto

Prezentado de la esploro.

Kial dekkvinjaraĝa knabo, lerte kaj rapide laboranta, malespekteble iufoje atingis gravajn malsukcesojn en enklasaj taskoj, surtute dum tradukado, ĉar li foje malmulte laboris kaj foje fantazie tradukis? Instruistoj prezentis la problemon kaj petis solvon. La knabo estis tute sana kaj inteligenta, parolis logike kaj racie sed dum la renkontiĝoj (unu horo) ne kapablis traduki simplan tekston (Ekz. La unua teksto de la zagreba metodo: Karlo estas mia kara amiko). Dum grupo-renkontiĝo, kiam pli longa tempo estis disponebla (preskaŭ du horoj), li sukcesis sed bezonis multe pli da tempo ol samklasanoj. La unua hipotezo estis ke li eble konfuziĝus pro samtempa plurpensado: eltrovi sufiksojn, traduki vortojn kaj kompreni la sencon de la frazoj. Do mi klopodis helpi lin ne petante tradukon de teksto sed nur de vorto-listoj. Tial iufoje li tuj intuciis la signifon (ankaŭ se la esperanta vorto malmulte similis al iu itala), iufoje li aspektis mallerta pro mistraduko aŭ netraduko de ŝajne simplaj vortoj. Ĉu oni povis pripensi specifan traduko-malfacilaĵon? Eble; sed antaŭ hipotezi specialan ‘malsanon’ ni serĉu pli simpla kaŭzon!

Post malmulte da tempo alvenis iuj aliaj knaboj havantaj la saman problemon. Mi laborigis ilin individue kaj priatentis ilian labormanieron. Do finfine la kerno de la afero estis malkovrata! Ili bezonis longegan tradukan tempon kiam ili uzis la vortaron. Mi malkovris ke ili, serĉante vortojn en la vortaro, turnis la paĝojn de la unuaj ĝis kiam li trovis la saman komencliteron de la serĉata vorto. Por eltrovi la duan kaj trian literon, ili ree turnis la paĝojn per sama maniero. Ekzemple: se ili serĉis la vorton ‘vivo’, ili turnis la tutajn paĝojn de la vortaro ĝis kiam ili trovis la komencliteron ‘v’; tiam ili revenis al ‘va’ kaj turnis ĝis kiam li trovis la ‘vi’; tute same por la sekvantaj literoj ‘v’ kaj ‘o’. Imagu kiom da tempo por traduki kaj kiom da tento traduki fantazie sen konsulti la vortaron!

La kaŭzo estis la misuzado aŭ la malkono de la alfabeto ordo. Kiu povas suspekti tian problemon ĉe gimnaziaj lernantoj?! La alfabeton oni instruas dum la elementa lernejo! Do el tiu momento mi decidis enmeti ankaŭ alfabetan taskon por testi laborkapablon de infanoj/knaboj.

Homoj kaj materialo.

La esploro faritis ĉe 212 'pacientoj', korpe kaj mense sanaj, kies nura problemo estis mislernado. Por komparo estis testitaj 82 knaboj sen problemoj. La tutaj provoj estis 403 por kontrolo (averaĝe: 4,9 provoj po unu knabo) kaj 503 ĉe pacientoj (averaĝe: 2,4 provoj po unu). La malplia numero de provoj ĉe 'pacientoj' dependas de la afero ke ili eraris kaj ne ŝajnis psikologie korekte laborigi ilin por instigo al aliaj malsukcesoj. La aĝo estis de naŭ ĝis dekok jaroj. La provoj el la unua ĝis la lasta pli malfaciliĝas. Por faciligi la unuan kontakton kun tia laboro aŭ maltimi iujn timemajn knabojn, iuj slipoj (la unua kaj la tria) enhavas nur italiajn vortojn.

La tasko estas: ordigu la jenajn vortojn laŭ alfabeto ordo:

Unua slipo (Facila. La inicialoj estas la dudekunu literoj de la itala alfabeto: a, b, c, d, e, f, g, h, i, l, m, n, o, p, q, r, s, t, u, v, z): correre, fiore, imparare, mela, bambina, elefante, hanno, naso, pagina, riga, acqua, dopo, luce, occhio, scuola, uomo, gioco, qualcuno, tavolo, zucca, volante.

Dua slipo (malpli facila; ĝi enhavas simplajn vortojn sed ne la tutajn inicialojn. Iuj diris ke oni ne povas ordigi tiun ĉi liston pro manko de literoj de la alfabeto (c, e, g ...): dente, viola, mandarino, bis, testo, libro, fumo, rapidi, lago, punto, nove, ante

Tria slipo (nefacila; iuj malatentemaj ne vidas ke 'disritmico' ne havas la 't' kaj ordigas ĝin kiel ĝi estus distritmico): distratto, disturbo, distintivo, distrutto, distogliere, disteso, distante, distonico, disritmico, distributore

Kvara slipo (malfacila): evidente, elefanti, evitante, egoista, elegante, eventuale, evoluto, esplori, enormi, etologia, enigma, estro, estero, esprimo, epidemia, energia, eterna, eminente, elemento, emanato

Kvina slipo (malfacila; la plej ofta eraro estas la misdispono de karnavalo, taksata kiel ĝi estus 'kanavalo'):

kabo	karnavalo
kabareto	kanino
kabano	kanelo
kablo	kanalo
kabrioletto	kanto
kaduka	kantino
kadro	kantileno
kardinalo	kapo
kafo	kapitano
kajuto	kapitalo
kajero	karavano
kakao	karaktero
kalo	karborundo
kalko	karbo
karoto	kartono
kakto	kalandro
kaldrono	kalendaro
kalifo	kalkano
kamarado	kanoto
kandelo	kano

Sesa slipo (komplika): Tiu ĉi slipo havas du farendaĵojn (por kontroli ĉu la respondoj korektas ankaŭ en plilaborigaj kondiĉoj): la tasko estas disigi la grupojn havantajn la saman numeron da literoj kaj ordigi la vortojn de ĉiu grupo laŭ alfabeto ordo (ĉi tie oni konsideras nur la ordigon):

UNU SUPER KROM VETURI RESPEKTO VORTARO TRANS SKRIBI PRODUKTI KVANKAM LASTA KUTIMO
INTER HALTI GVIDI EKSTER DUBI ALMENAŬ FOJO TAMEN ENTUTE TUJ OFTE FAKO SEKVANTA APARTA

BRUO PRAVI DESTINI PUNKTO POR KUKO DUDEK KRIO DEKSTRE TASKO ESTRO ASPEKTI KELKA DUDEKTRI TRIDEKUNU TROA.

3 literoj: POR, TUJ, UNU

4 literoj: BRUO, DUBI, FAKO, FOJO, KRIO, KROM, KUKO, OFTE, TROA

5 literoj: ktp.

.....

8 literoj: DUDEKTRI, PRODUKTI, RESPEKTO, SEKVANTA.

9 literoj: TRIDEKUNU.

Rezultoj

La sekva tabelo enhavas la rezultojn de la esploro: la datumoj de la dua kaj de la tria slipoj aŭ de la kvina kaj de la sesa slipoj estas tute similaj, kaj pro simpligo kunmetitaj; 'aĝo' signifas la averaĝa aĝo de la grupo; 'ekzakte' rilatas ekzaktan faron de la tasko; 'bone' indikas malgravan eraron: ekz: forgeso de unu vorto, interŝango de du proksimaj vortoj (elegante antaŭ elefanti, mislegado de 'disritmico' kiel distritmico); 'malbone' rilatas al grava miskompreno aŭ misfarado de la tasko.

Kurioze, tri knaboj sendepende ordigis la literojn de ĉiu vorto: ekz: kabo = abko; kabareto = aabekort ktp.

Slipoj	Pacientoj	ekzakte	aĝo	bone	aĝo	erare	aĝo
1 ^a	45	63%	11,18	34%	11,63	2%	14,0
2 ^a , 3 ^a	226	42%	13,55	37%	13,35	20%	12,7
4 ^a	78	47%	13,43	30%	13,29	21%	12,6
5 ^a , 6 ^a	154	33%	14,73	50%	14,0	15%	13,3
ENTUTE	503						
	kontrolo	ekzakte		bone		erare	

1 ^a	105	57%	12,96	37%	11,94	5%	12,0
2 ^a , 3 ^a	174	55%	13,10	28%	12,72	15%	12,8
4 ^a	93	71%	13,31	27%	12,24	2%	11,0
5 ^a ,6 ^a	31	54%	13,88	29%	13,44	16%	12,8
ENTUTE	403						

Oni vidas ke la procento de ekzaktaj respondoj estas plia ĉe kontroluloj ol ĉe ‘pacientoj’ kaj la aĝo de la kontroluloj estas malplia, sed la diferencoj aspektas sufiĉe malgrandaj. Eble oni povus eltrovi statistikajn malsimilecojn inter la datumoj de la grupoj, sed ankaŭ sen statistiko eblas konkludi: misuzado de la alfabeto ordo troveblis ĉe la duono de la lernantoj (iom pli ĉe ‘pacientoj’) kaj en ĉiuj grupoj (iom pli ĉe ‘pacientoj’) estis procento de lernantoj kiuj tute ne uzis la alfabetan ordon.

Laŭ mia sugesto la kontrolo de tia ĉi kapablo utilas, kiam tradukaj problemoj aperas dum instruado de Esperanto.

Betty Chatterjee (Danio)

Reta renkontiĝo

Antaŭ naŭ monatoj pere de Skype mi konatiĝis kun esperantisto de Maroko. Li ne konas aliajn samideanojn en sia regiono, li mem lernis la lingvon pere de koresponda kurso kaj li povas praktiki la lingvon nur pere de la retaj kontaktoj. Ekde tiam ni sufiĉe ofte interkorespondas. Iom post iom pro la evoluo de nia reciproka konfideco li jam rivelas al mi mirindan bildon pri siaj lando, kulturo, ĉiutaga vivo kaj pri sia fervora amo por E-o. Li mem ne posedas komputilon; li devas piediri 8 kilometrojn al la bushaltejo por poste veturi 26 kilometrojn al la plej proksima urbo, Beni Tajjit, en kiu troviĝas retejo.

+ 2 fotoj

Mia retamiko nomiĝas Boughoud Si Abdelkrim, sed li simple subskribas siajn mesaĝojn kiel Karim. Li naskiĝis kaj loĝas en la berbera vilaĝeto Ait Sbaa Elkadima, kiu situas en la Atlas-montaro proksime al la Alĝeria limo. En la vilaĝeto loĝas ducento da homoj, 70%-oj el ili estas virinoj, maljunuloj kaj infanoj. La viroj laboras en urbegoj, nur tie ili povas trovi laboron. Karim estas instruisto en tiu ĉi vilaĝeto, kaj li sola havas la respondecon pri la tuta lernantaro, kiu nombras 10 infanojn de diversaj aĝoj kaj kapablecoj.

La ĉiutaga vivo en lia vilaĝo estas tute malsimila al mia urba vivo. Tie la homoj loĝas en domoj konstruitaj de sabloŝtono. Matene kaj vespere la junulinoj ĉerpas akvon el la vilaĝa akvo-tenejo, kaj tie la virinoj komune lavas la vestaĵojn. Ĉe mi la malbona vetero estas nur malagraba, sed ĉe ili tiu povus signifi ekonomian katastrofon; ekzemple la 11-an de marto ĉi-jare li skribis: „Merkredon violenta vento trapasis mian vilaĝon, ĝi damaĝis multajn arbojn en nia ĝardeno, ni perdis 15 grandajn olivoarbojn.” (Pro la treege malrapida kreskado de olivoarbo, dum kiom da jaroj mankos al ili la 15 arboj?)

Kiel mi antaŭe menciis Ait Sbaa Elkadima estas berbera vilaĝo, kaj Karim fieras pri sia kulturo kaj sia berbera lingvo. En unu el siaj unuaj mesaĝoj, li sendis al mi foton pri malnova domo en la vilaĝo skribante la jenon: „la foto estas pri la enirejo de nia malnova domo. En la fundo de la strato oni trovas ĉambron de miaj gepraavoj (pli ol 400 jarojn aĝan). Dum la kolonia periodo la franca armeo detruis nian vilaĝon post batalo sur la maroka-alĝeria limo, kaj restas nur nia ĉambro, la ĉambro de nia najbaro kaj la praavaj tomboj de la vilaĝanoj.”

En sia propra vivo li jam spertis la sekvojn de la fremda influo. Hejme oni parolas nur la berberan, kaj la patrino neniam mem lernis la araban. Li skribis: „Kiam mi estis infano, mi parolis nur la berberan lingvon, kaj en la bazlernejo mi devis scii paroli la popolan araban kun la instruisto, plue la oficialan araban kaj la francan. Kio okazis? Finfine multaj el miaj amikoj forlasis la lernejon, ĉar ili ne povis lerni kvar lingvojn dum du jaroj. La araba instruisto frapis min, se mi parolis la berberan...”

Li komencis la mezlernejon en Beni Tajjit – kiu estas araba urbo – kune kun 33 aliaj berberaj infanoj, li estis la nura el ili, kiu finis la lernejon. Laŭ lia opinio la kialoj de iliaj malsukcesoj estis ĉefe pro la kultura malestimo de la instruistoj, kiujn la lernantoj spertis en tiu ĉi lernejo. Tamen, spite al la malfeliĉaj spertoj, li nek malamas siajn arabajn samlandanojn, nek malestimas iliajn tradiciojn.

Nun li mem estas instruisto kaj li alte taksas siajn berberajn lingvon kaj kulturon, kiujn li dividas kun siaj lernantoj. Karim egale estimas E-on. Antaŭ du monatoj, post kiam mi sendis al li instrulibron por infanoj, li komencis instrui E-on al siaj lernantoj; E-o signifas al li la esperon por la estonteco, ne nur por li mem, sed ankaŭ por la infanoj. Li skribis: „Kial ni lernas kvar aŭ kvin lingvojn? Kial ni perdas la tempon lerni tiom da lingvoj? Feliĉe estas tiel, ke ni nun havas facilan lingvon, kiu estas E-o. Miaj lernantoj diras, ke ĝi estas pli facila ol la franca aŭ la araba. Mi pensas, ke la mondo fariĝos pli bona pere de E-o. Pere de multaj lingvoj ni perdas niajn kulturon kaj tradiciojn. Mi petas vin, ke vi kontaktu la membron de UEA en Maroko. Eble li povus apogi mian laboron”. 1

Boughoud Si Abdelkrim kaj la infanoj en tiu ĉi vilaĝo meritas nian apogon, pro tio mi verkis tiun ĉi artikolon. Li unuope bataladas por konservi sian kulturon. Mi petegas vin, ke vi ne ignoru lian kuraĝan agadon. Kiel vi apogu ilin? Vi minimume devus skribi leterojn aŭ poŝkartojn al Karim kaj al la lernantoj, sed mankas al ili ankaŭ E-lerniloj. Jen lia adreso:

Si Abdelkrim Boughoud, Ait Sbaa Elkadima, CP/61100, Beni Tajjit, Maroko,
www.boughoud.blogspot.com, <boughoud6@hotmail.com>.

1 Sensukcese mi jam klopodas tiel fari.

Ĉiamverda lernolibro, aŭ ankaŭ komencantoj povas vojaĝi en Esperanto-lando (recenzo)

Boris Kolker. Internacia lingvo Esperanto: plena lernolibro. — Eld. Impeto. Moskvo, 2007, 264 p. ISBN 978-5-7161-0172-2

+ ILUSTRO kolker1.doc

Ni ne scias, pro kiu kialo homo decidas lerni fremdan lingvon. Sed, verŝajne, la unua afero, pri kiu ĉiu studonto okupiĝas, estas serĉado de bona lernolibro. Malgraŭ tio, ke interreto disponigas multajn studmaterialojn, oni ofte preferas malnovan bonan paperan libron. Ĝis antaŭ nelonge libro, kiun povis trovi rusparolanto por lerni E-on, vere estis malnova. Pli precize, oni ja eldonis kelkajn libretojn, sed ili estis tro malgrandaj por serioze lerni la lingvon. Do, lernontoj estis devigataj ĝoji pri akiritaj brokantaĵoj.

Feliĉe, la hodiaŭaj komencantoj en Rusio ne plu havas lernolibroproblemon, ĉar la moskva eldonejo „Impeto” aperigis renovigitan lernilon „Internacia lingvo Esperanto: plena lernolibro” de Boris Kolker, membro de la Akademio de E-o. Multaj konas lian brilan verkon „Vojaĝo en E-lando”, sed rusparolantoj povis ĝui ankaŭ lian malnovan bazan lernolibron.

Tiu kurso por komencantoj havas longan historion. La aŭtoro komencis labori super ĝi en 1972. En 1973 tiu ĉi kurso estis publikigita en Ufa en regiona ĵurnalo „Leninec” (Leninano). La unua broŝura varianto aperis en Ufa en 1974 sub la titolo „Internacia lingvo E-o. Metodikaj rekomendoj kaj kontroltaskoj por la kurso”. Poste tiu lernolibro estis multfoje reaperigita en multaj urboj de Sovet-Unio kaj estis tradukita en la estonan. En 1992 la plej granda rusa scienca eldonejo „Nauka” (Scienco) eldonis la lernolibron oficiale. La eldonkvanto impresas: 10 500 ekzempleroj! Kuriozaĵo estas, ke pri la libro okupiĝis la redakcio pri la orienta literaturo. Jam la unua libroforma eldono de la nun modernigita lernolibro estis bonega. Multaj esperantistoj en Sovet-Unio konatiĝis kun E-o per ĝi kaj poste rekomendis ĝin al siaj konatoj.

La lernolibro konsistas el 20 lecionoj. Tipa leciono komenciĝas per vortlisto. Ĉiuj scias, ke la elektado de vortoj kaj la kompilado de porlecionaj vortlistoj estas tre malfacila kaj tre grava tasko, ja eĉ en la unuaj lecionoj lernanto deziras legi sencohavajn frazojn. En la komenco de tiu ĉi kurso la aŭtoro apogas sin sur vortoj, kiujn rusparolanto kapablas kompreni sen traduko (plejparte sur internacia leksiko). Sed ĉe la fino de la kurso lernantoj konas jam ĉirkaŭ 1200 radikojn. La leksikan parton sekvas la teoria, enhavanta materialon en la rusa lingvo pri gramatiko, vortfarado kaj vortuzado, kun multaj ilustraj ekzemploj. La aŭtoro elegante tuŝas eĉ malfacilajn gramatikaĵojn. Ĉiu leciono enhavas E-tekston (lecionoj 3-13 – dialogoj pri ĉiutagaj temoj; lecionoj 14-20 – tekstoj pri E-temoj), kiun la lernanto devas traduki rusen, kaj kvin aŭ ses ekzercojn. En la unua ekzerco oni tradukas la E-vortojn en la rusan por memorfiksi radikojn kaj alkutimiĝi al afiksoj. En la dua ekzerco necesas traduki ofte uzatajn E-vortkunojn rusen. Tiuj vortkunoj estas ligitaj kun la leciona teksto en E-o kaj la traduktasko en la fino de la leciono. La trian ekzercon konsistigas frazoj, tradukendaj en la rusan. Tie la aŭtoro kolektis titolojn kaj citaĵojn el konataj beletraĵoj, aforismojn, eldirojn de famaj personoj, proverbojn, agitfrazojn, gratulojn ktp, kiujn la lernanto plej

verŝajne konas ruslingve. Tiu scio helpas al li, unue, traduki kaj, due, kompreni, ke oni tradukas ne vortojn, sed sencon. En la sekva tasko oni tradukas frazojn aŭ mallongan tekston, ligitan kun la unua teksto de la leciono, en E-on. En la lasta tasko la aŭtoro proponas al la lernanto temon aŭ situacion por verki E-lingvan dialogon aŭ rakonton.

Post la ekzercoj en ĉiu leciono troviĝas kadro kun aŭtoro alparolo. Jen ĝi temas pri atingitaj rezultoj, jen enhavas konsilojn pri studado, jen kuraĝigas la leganton, jen atentigas pri malfacilaĵoj, jen konatigas kun la E-medio. Interalie, la ĉeesto de la aŭtoro sentiĝas ankaŭ en aliaj etaj detaloj: ie li priskribas siajn amatajn lokojn, ie kvazaŭ mem rakontas pri evento, ie citas trafajn eldirojn de siaj konatoj... Lecionfine estas vortludo kaj kelkaj ruslingvaj priesperantaj tekstoj. En la lastaj 5 lecionoj (kiuj fakte estas meznivela kurso) lernantoj tradukas nur Esperanten: en la unua ekzerco – afiksitaĵoj kaj kunmetitajn vortojn, en la dua - vortkunojn, en la tria – specialajn frazojn, atentante emfazitajn elementojn (ekzemple, apartan kazon de la rusa lingvo aŭ rusajn homonimojn). En la kvara ekzerco necesas traduki en E-on tutan tekston kaj en la lasta, krea, verki propran rakonton laŭ proponita temo. La libro entenas ankaŭ malgrandan E-rusan vortaron kaj respondojn al la unuaj taskoj de la lecionoj.

Bezono de modernigo kaŭzis drastaj ŝanĝoj en Rusio, koncernantaj kaj la politikan situacion, kaj la ĉiutagan vivon. La libroj, eldonitaj en Sovet-Unio, estis iom ideologiigitaj, sed nun mencioj pri partia kongreso kaj kolĥoza ŝoforo ridetigas la legantojn. Certe, matenmanĝo en studenta bufedejo kostas nun multe pli ol 50 kopekojn kaj oni nun rigardas en vendejoj ne skribmaŝinojn, sed komputilojn. Grave renovigitaj estas ankaŭ la postlecionaj informaj tekstoj. Ili iĝis pli diversaj, ankoraŭ pli interesaj, pli modernaj, pli surprizaj: oficialaj dokumentoj kaj informo pri E-geografiaĵoj, eltiraĵoj el interlingvistikaj disertacioj kaj intervjuo kun Harry Harrison, impresoj de e-isto pri ruslingva beletra libro, en kiu agas Zamenhof mem, kaj artikoleto pri la Pasporta Servo. Utila aldono estas la indekso de gramatikaĵoj, helpanta rapide trovi koncernan lecionon, kiam necesas rememori iun klarigon. Estas pliampleksigita la listo de E-mallongigoj en unu el la lecionoj. Unue, certe, oni devas koni ilin por kompreni E-tekstojn. Due, sen helpo multaj e-istoj ne povas ĝuste traduki la siglojn „UEA” kaj „UK” en la gepatran lingvon!

Post la trastudado de la baza kurso antaŭ ĉiu lernanto aperas la demando, kion fari nun. Por instigi al plia studado, la renovigita lernolibro inkludas la unuan lecionon el la perfektiga kurso de Boris Kolker „Vojaĝo en E-lando” kun ruslingva traduko. Al ni tre plaĉas la belaspekta kaj atentokapta kovrilo de la libro (de la grafikisto V. Te) kun buketo el E-literoj. Bela kaj sencoplana! La kurson oni povas uzi por memstara studado aŭ por E-kursoj, gvidataj de instruistoj. Kaj bonŝance instruistoj jam atendas gelernantojn ĉe la koresponda E-kurso por ruslingvanoj, funkcia laŭ tiu ĉi lernilo ekde 1999 (nun ĉe la servilo „Yahoo! Groups”, <http://groups.yahoo.com/group/esperanto-kurso/>).

Multaj e-istoj en Rusio konas la unuan eldonon de la lernolibro de Boris Kolker, konsiderante ĝin nesimpla, tamen tre utila kaj cerbumiganta. Ni certas, ke la nova pli granda e-ista generacio en Rusio varme akceptos la novan eldonon. La E-lingvaj tekstoj kaj ekzercoj de tiu neordinara lernolibro povas esti utilaj ankaŭ por personoj, kiuj ne scias la rusan lingvon.

Anna kaj Mati Pentus

Novtipaj E-ekzamenoj preparataj

Konforme al la novaj lingvotestaj normoj de la Konsilio de Eŭropo la ekzamena laborgrupo de UEA kaj ILEI estas ellaboranta novan ekzamensistemon, kiu ebligas al la esperantistaro trapasi internaciajn ekzamenojn je tri niveloj A, B kaj C. La novtipajn atestojn pri lingvokono pli kaj pli ofte jam postulas dungantoj kaj edukinstitutoj ne nur en Eŭropo sed ankaŭ en multaj aliaj landoj de la mondo. La ekuzo de unueca normaro ankaŭ en E-ekzamenoj ebligas taksu lingvajn lertojn laŭ samaj kriterioj en kaj ekster Esperantujo, kompare kun ajna nacia lingvo. (Pli da informoj troviĝas en la sekcio Referenckadro en www.edukado.net.)

La testado de la novtipaj ekzamenoj finiĝos en tiu ĉi jaro kaj la nova ekzamensistemo povos ekfunkcii en 2008. En la unua periodo tiaj ekzamenoj estos organizataj de du eŭropaj centroj, kiuj poste trejnus kaj rajtigos ekzamenantojn kaj organizos ekzamensesiojn ankaŭ aliloke. La malnovaj ekzamenoj de UEA/ILEI dume plu estos okazigataj laŭ la malnova strukturo, t.e. en du niveloj. Estas konsilinde trapasi ilin, kiam oni bezonas atestilon por propra celo aŭ nur ene de la movado.

Pri la Referenckadro, taksaj normoj kaj la novtipaj ekzamenoj okazis prezentoj dum La Tago de la Lernejo en la UK en Jokohamo. UEA kaj ILEI alvokas siajn landajn asociojn kaj sekciojn akiri kaj studi la broŝuron La Komuna Eŭropa Referenckadro, eldonitan de UEA ĉi-jare, kaj laŭ ĝi komenci adapti siajn enlandajn instru- kaj ekzamensistemojn. Oni povas mendi la broŝuron ĉe la Libroservo de UEA aŭ elŝuti de www.edukado.net.

por pliaj informoj kaj klarigoj oni kontaktu la vicprezidanton de ILEI, Zsófia Kóródy (Germanio/Hungario), <esperanto-zentrum@web.de>

El la landoj kaj sekcioj...

Ĉeĥio

En la kadro de Internacia Ekonomia Forumo, kiu okazis de 6-8 septembro 2007 en Krynica, estis prelegaro pri E-o rilata al la Forumo temo „Eŭropa Unio – krizo kaj ŝancoj de la lingva komunikado”.

La prelegantoj estis: dr-o Seán Ó Riain – Irlando (moderato), Prof-ro Reinhard Selten – Germanujo, d-rino Barbara Despiney – Francujo, d-rino Aida Čížikaitė – Litovujo, Prof-ro Witold Stępniewski – Pollando, Etsuo Miyoshi – Japanujo. La Nobelpremiito profesoro Reinhard Selten prelegis tri fojojn: por ĝenerala publiko, por junaj aktivuloj kaj por esperantistoj. Lia Teorio de Ludoj pri eksperimenta ekonomio rilatas al diversaj domenoj de la vivo: eksperimenta ekonomia analizo, industria organizado, socia, politika,

interhoma konduto, negocoj, al prognozo de financoj, monopoloj, centraj bankoj, al administrado, biologa evoluo kaj militistara strategio.

Dum la lingva parto oni diskutis pri taŭgeco de E-o kiel „lingva ponto” en lernado de fremdaj lingvoj kaj grandega ŝparo de tradukokostoj.

Dum la Ekonomia Forumo oni parolis ankaŭ pri la lerneja instruado de E-o en la Eŭropa Unio.

Sur la foto oni povas vidi (de maldekstre): Łukasz Żebrowski, Seán Ó Riain, Etsuo Miyoshi, Eduardo Kozyra, Václav Havel, Peter Baláž (fone), Tobiasz Kaźmierski

+ FOTO

laŭ d-rino Jolanta Kieres (PL)

Ĉinio

27 septembro okazis prelego fare de Augusto Casquero en la ĉina urbo Foshan, en la „Faklernejo pri Aŭtomobila Meĥaniko”, pri E-o en E-o, kun samtempa tradukado al la ĉina lingvo de la Ĝenerala Sekretario de la E-asocio de Kantono, s-ro Liu Weizhuan. Ĉ. 200 junaj gelernantoj partoprenis la prelegon, montrante grandan interesigon. Krom la prelego mem ili povis rigardi la videofilmon en la internacia lingvo "le en Ĉinio", de Roman Dobrzynski, kaj muzikan videon de koncerto de Jomo en Pollando. Fine de la prelego la partoprenintoj havis eblecon rigardi diversajn e-librojn kaj gazetojn. Vidante la entuziasmon de la gelernantoj oni proponis al la ĉeestantoj partopreni kurson de E-o, ideo kiu tuj estis akceptita de la respondeculoj de la lernejo kaj de la lernantaro. Entute aliĝis ĉ. 50 gelernantoj.

Augusto Casquero

+ FOTO

17 oktobro 2007 okdek-kvin studentoj el Shenyang Muzika Universitato elektis E-on kiel nedevidan studobjekton kaj lernas ĝin en du kursoj. La uzata lernolibro estas "E-Kurso de La Nova Jarcento", la du kursojn gvidas f-ino Mu Chunlei. Ŝia instru-metodo nomata reciproka movado estas tre ŝatata de la studentoj. La reciproka movado signifas, ke parto de lecionoj estas aranĝata ekster klasoĉambro, la studentoj unue faras demandojn pri la ĉirkaŭaĵo, poste la instruistino instruas ilin kiel esprimi la demandojn kaj respondojn en Esperanto.

Wu Guojiang, vicprez. de LEA

Hungario

15-16 septembro 2007 en la urbo Nyíregyháza (orienta parto de Hungario) oni organizis metodikan seminarion por instruistoj. Temas pri serio de trejnseminarioj, organizataj en diversaj hungaraj urboj. (Ĝin kunorganizis du regionaj E-fondaĵoj kaj du E-asocioj.) La seminarion partoprenis 12 E-instruistoj kaj multaj aliaj gastoj, ekz. el la urboj Budapest, Szeged, Szolnok, Tiszafüred kaj Zalaegerszeg. Krom la interŝanĝo de instruspertoj oni povis ĝui la spritajn prelegojn de Imre Szabó kaj Attila Salga.

+ FOTO

laŭ la informoj de Jáger Éva

Italio

„Eŭropo: multaj lingvoj por komuna lando” estis la frapfrazo de la 74-a Itala Kongreso de E-o (Pisa, aŭg. 31 – sept. 7). Okazis serio de seminarioj kaj kursoj, dum tri tagoj:

– Kurso por komencantoj (Kristin Tytgat),

– Kurso por progresantoj (Katalin Kováts),

– Seminario pri instruado (Paul Gubbins),

– Seminario pri literaturo (Baldur Ragnarsson, Mauro Nervi, Nicola Ruggiero kaj Nicola Minnaja). La tuton organizis kaj reĝisoris Nicola Minnaja.

+ FOTO

Koreio

En la dua semestro de koreaj universitatoj, 334 gestudentoj aliĝis al la kursoj de E-o, kiuj komenciĝis de aprilo en la universitatoj Korea fremdlingva (Seulo kaj Yongin), Dankook (Seulo kaj Chonan) kaj Wonkwang (Iksan). La aliĝintaj studentoj lernos E-on dum 16 semajnoj po du horoj semajne kaj ili gajnos du notojn oficiale. La studentoj de tempo al tempo provos paroli Esperante kun nekoreaj esperantistoj en Skajpo, reta komunikilo dum lecionoj. Via bonvola reago donos grandan motivon al la studentoj. Jen estas Skajpo-adreso de la docento LEE Jung-kee, kiu instruas en la tri universitatoj: leejungkee.

informis: LEE Jung-kee, <esperanto@saluton.net>

Nederlando

Doktoriĝis en la Universitato de Amsterdamo la iama estrarano de Esperanto Nederland kaj de Internacia E-Instituto (IEI), Wim Jansen, docento pri interlingvistiko kaj E-o en tiu sama universitato. Por atingi tiun ĉi rezulton Jansen faris esploron pri vortordaj aspektoj troveblaj en la nuntempa, ĵurnalismeca lingvaĵo kaj publikigis pri tio disertacion, kiun li sukcese defendis la 2-an de oktobro. La dokorigaj akompanantoj estis la profesoroj Hengeveld (por la ĝenerallingvistika parto) kaj Van Oostendorp (por la ĝenerallingvistika kaj por la esperantologia aspektoj). En la dokoriga komisiono sidis i.a. prof. Haase de la Universitato de Bamberg, Germanio. La 283-paĝa disertacio estas verkita en la nederlanda lingvo kaj proponas resumojn en la angla, Esperanta kaj germana lingvoj. Temas pri la dua disertacio pri E-rilata temo defendita en nederlanda universitato ene de unu jaro (post Marcus Sikosek, doktoriĝinta en novembro 2006 post esploro pri la historio de UEA), sed pri la unua disertacio post 1947(!), kiu rekte koncernas la lingvon mem. Estas antaŭvideble, ke la Universitato de Amsterdamo baldaŭ nomumos Jansen plenrajta speciala profesoro en la katedro, kiun li de 2004 okupas en la nomo de IEI. La teksto de la disertacio estas libroforme aĉetebla ĉe IEI kontraŭ EUR 25,20.

laŭ informoj de Atilio Orellana Rojas

Norvegio

Jon Rømmesmo mortis pro kancero, 84-jara, la 1an de aŭgusto, en sia hejmo apud la lago Tyrifjord, Norvegio.

+ FOTO

Li estis la verkinto de pluraj libroj por komencantoj: norvega Lernolibro, kiu formis bazon de kurso dissendita de pluraj lokaj radistacioj kaj poste aŭfita en Interreto; facila Legolibro; kaj libreto en la norvega pri la lingvo kaj ties historio. Li ankaŭ fervore aktivis kiel gvidanto pri la interreta kurso Esperanto Viva. Krome li tradukis i.a. Norvegaj popolfabeloj kaj ilustris la libreton per propraj desegnaĵoj – ĉar li estis kapabla desegnisto kaj pentristo kaj tiun fakon li ankaŭ instruis.

Kun siaj tri filoj – kaj poste kun sia nepo – li konsekvence parolis en Esperanto, kaj tiu sperto rezultigis la kajerojn Esperanto ABC, Fantaziaĵoj kaj alian E-materialon por infanoj. Malgraŭ malsano li aktivis ĝis la fino.

Arne Olav Mjølhus

Pollando

La aŭtuna sesio de la Interlingvistikaj Studoj (14-21.09.2007) en Poznań atendis la partoprenantojn kun pli riĉa programo ol kutime, ĉar en la tria jaro de la studoj okazas specialiĝo, ĉi-foje pri komunikado, lingvistiko kaj lingvopedagogio. István Ertl prelegis pri la nuntempa E-literaturo kaj analizis kelkajn verkojn. La kurso de Claude Piron pri psikologiaj aspektoj de komunikado katenis la atenton de la

aŭskultantoj. Ilona Koutny prezentis lingvistikajn aspektojn de komunikado. Enkadre de la lingvo-pedagogia specialiĝo Katalin Kováts, prizorganto de la elstara instruista retejo edukado.net enkondukis la partoprenantojn al la bazaj faktoroj de lingvoinstruado. Maria Majerczak, metodikistino de la Jagiellona Universitato en Krakovo, traktis metodikon. Al la programo kontribuis ankaŭ Zsófia Kóródy, vicprezidanto de ILEI.

La nuna sesio estis specifa, ĉar la lingvopedagogia specialiĝo realiĝis en la kunlaboro de UAM kun ILEI, kaj pro tio povis aliĝi ankaŭ kromaj partoprenantoj (7 personoj el 4 landoj). La kunordigita instruista trejnado daŭros unu jaron (kun reta konsultiĝo inter la sesioj). Tiuj ĉi kursanoj sekvis krome minikurson pri literaturo (István Ertl) kaj pri movadhistorio (Aleksander Korĵenkov) kaj povis aŭskulti donace la aliajn proponitajn kursojn de la Interlingvistikaj Studoj.

laŭ la informoj de d-rino Ilona Koutny, gvidanto de la Studoj,

Rusio

19-22 aŭgusto 2007 enkadre de Rusiaj E-Tagoj (RET) ĉe la Azova maro en la urbeto Primorsko-Aĥtarsk (RU) okazis la instru-metodika seminario „Flugiloj de malfacila vento“, kiu estas projekto de E@I kaj ILEI por komencantaj instruistoj de E-o kaj instruemaj esperantistoj. La gramatika parto de la seminario estis gvidata de Paŭlo Moĵajev (UA), kiu jam dufoje kunordigis kaj kungvidis la seminarion du IJK en Kovrov kaj Zakopane, kaj de Aleksander Osincev, kiu partoprenis la trejnseminarion “Gvidu la Flugilojn...” dum la ĉi-jara Ago-Semajno (Pollando) kaj ĉi-foje staĝis kiel gvidanto de la metodika parto. Irina Gonĉarova (Rusio), la ĉefkunordiganto de la projekto, helpis kiel observanto.

La seminarion partoprenis 11 personoj, 10 el diversaj urboj de Rusio kaj 1 el Ukrainio. La gramatika parto enhavis malfacilaĵojn de E-gramatiko kaj gramatikan ekzercadon. Dum la metodika parto oni pridiskutis diversajn metodojn de lingva instruado, planadon de leciono kaj kurso kaj specifaĵojn de E-instruado. La seminario konsistis el 4 metodikaj kaj 4 gramatikaj poduhoraj programeroj dum 4 tagoj. Dum la tria tago okazis prezentoj de diversaj E-metodoj fare de spertaj E-instruistoj: Aleksander Melnikov (RU), Mikaelo Lineckij (UA), Slavik Ivanov (RU), Paŭlo Moĵajev (UA) kaj Irina Gonĉarova (RU). Dum la 4-a tago la partoprenantoj mem prezentis siajn 15-minutajn lecionojn. Ĉiujn kondiĉojn de partopreno plenumis 5 personoj, kiuj poste ricevis atestilojn kun rekomendo kiel instruistoj de Esperanto. Ĉiuj partoprenantoj iĝis membroj de ILEI.

Aleksander Osincev, kunordiganto kaj metodika gvidanto

Ukrainio

Internacia scienca konferenco okazos inter la 10-a kaj 12-a de aprilo 2008 kun la temo Interago de etnaj kaj planitaj lingvoj en la kunteksto de la eŭropa integriĝo. Organizantoj: Ministerio pri Klerigo kaj Scienco de Ukrainio; Volinia Nacia Universitato Lesja Ukrainka Filologia Fakultato, Fakultato de Romana kaj Germana filologioj, Fakultato de Eksterlandaj Rilatoj. La ĉefaj temoj de la konferenco:

Uzado de etnaj lingvoj por internacia komunikado en Eŭropa Unio kaj la najbaraj landoj;

Interago de la ukraina lingvo kaj internaciaj lingvoj;

Planita(j) lingvo(j) kiel internacia komunikilo;

Stata(j) lingvo(j) kaj oficiala(j)lingvo(j); dulingveco, plurlingveco;

Prioritataj kaj minoritataj etnolingvoj;

Gepatra lingvo en lernado kaj edukado;

Lingvo kaj la etna kulturo, la belletro;

La lingvaĵo de amaskomunikiloj;

Literatura lingvo kaj sociaj, regionaj variantoj;

Aktualaj problemoj de la tradukado;

Atingoj de la eŭropa leksikografio;

Kompilado de lingvaj komputilaj datumbazoj.

Estas planita ronda tablo pri „Etnaj stereotipoj en internacia kaj interpopola komunikado”. Ĉiuj eŭropaj lingvoj kaj E-o estos uzataj kiel laborlingvoj. La materialoj estos publikigitaj en la scienca revuo de Volinia nacia universitato antaŭ la konferenco. La aliĝilon (familia nomo, persona nomo, posteno, scienca grado, laborloko, en kiu lingvo vi prelegos kaj en kiuj lingvoj vi parolas, adreso, kontaktaj telefonnumeroj, retpoŝto, bezono de loĝloko) kaj la tekston de la prelego bonvolu sendi ĝis la 31-a de decembro de 2007 al la adresoj:

– UA-43021 Lucjk, str. Vinniĉenka, 30a, Katedro pri la Ukraina Lingvo, eldonaj aferoj kaj redaktado, tel.+38 (03322) 4-84-12, <phylological@univer.lutsk.ua> al Daniljuk Nina (baltaj, slavaj lingvoj kaj Esperanto);

– UA-43025, Lucjk, prosp. Voli, 13, Katedro pri Aplikata Lingvistiko, tel. +38. (03322) 4-73-58, <r-g-phylology@univer.lutsk.ua> al Olikova Marija (romanaj kaj germanaj lingvoj);

– UA-43021, Lucjk, str. Vinniĉenka, 28, Katedro pri Eksterlandaj Lingvoj, tel.+38 (03322) 4-92-72, <int-rel@univer.lutsk.ua> al Petrovsjka Nadija (romanaj kaj germanaj lingvoj).

Pri la postuloj (amplekso, formato, referencmaniero, sendmaniero, akompanaj informoj kaj strukturo) de la artikoloj, aliĝkotoj kaj ceteraj detaloj demandu la sekciestron de ILEI-UA.

laŭ informoj de Nina Daniljuk

Membrostatistiko de ILEI en septembro 2007

Albanio 6, Awstrio 2, Awstralio 2, Barato 2, Belgio 13, Benino 1, Bosnio kaj Hercegovino 1, Brazilo 74, Britio 9, Burundio 6, Ĉeĥio 6, Ĉinio 2, Danio 16, Finnlando 17, Francio 37, Germanio 78, Grekio 1, Hungario 37, Irano 1, Israelo 1, Islando 2, Italio 63, Japanio 15, Katalunio 5, Kazaĥio 1, Kroatio-KEL 13, Kroatio-KEU 6, Latvio 1, Litovio 6, Luksemburgio 1, Nederlando 25, Niĝerio 1, Niĝerlando 1, Norvegio 9, Nov-Zelando 2, Pollando 20, Portugalio 1, Rumanio 19, Rusio 8, Serbio 6, Slovenio 1, Svedio 45, Svisio 18, Togolando 2, Ukrainio 18, Usono-Kanado 49, Vjetnamio 2.

Sume [652 ?] 660 (el ili 145 ricevas nian revuon rete).



Publikikajtoj en la revuo Monato

Moderna vivo

LERNEJOJ

Sistemo ne imuna

Du ĝemeloj, denaske infektitaj de la retroviruso HIV, antaŭ nelonge komencis la unuan klason ĉe elementa lernejo en la albana ĉefurbo Tirano.

Negative reagis gepatroj de la aliaj lernejoj. Ili postulis, ke la lernejestro eligu la infektitajn infanojn: se ne, ili ne plu sendos tien siajn infanojn. La gepatroj opiniis, ke la du ĝemeloj infektos ankaŭ iliajn infanojn.

La cetero de la artikolo estas konsultebla en la sekcio por abonantoj.

Bardhyl SELIMI

Politiko

AZILO

Revenigu mian familion ...

Skuiĝis Aŭstrio pro 15-jaraĝa albana knabino. Arigona Zogaj loĝas dum kvin jaroj en centra parto de Aŭstrio kun sia sepmembra familio. La patro laboris kaj la kvin gefiloj studis ĉe aŭstra lernejo. Ili esperis akiri restadpermeson en Aŭstrio.

Sed la ministrejo pri internaj aferoj, konforme al novaj reguloj por forigi eksterlandanojn enmigrintajn pro ekonomiaj kialoj, ordonis, ke estu ellandigita la familio Zogaj. Arigona, sciigite de samklasano pri la

ĉeesto de policistoj en sia hejmo, tuj kaŝis sin ĉe amikoj. Tial, dum ŝiaj familianoj estas ĉiuj deportitaj, ŝi restis en Aŭstrio, trovante rifuĝejon ĉe pastro en vilaĝo Ungenach.

La cetero de la artikolo estas konsultebla en la sekcio por abonantoj.

Bottom of Form

Anekdotoj

Dio prizorgos

Juda junulino (de ortodoksa familio) venigas unuafoje sian fianĉon Abrahamo al la gepatroj por vespermanĝo. Post la manĝo la patrino petas de la patro prezenti al la fianĉo diversajn enketajn demandojn.

La patro sidiĝas aparte kun Abrahamo kaj komencas "enketi":

Patro: "Kiu estas viaj vivoplanoj?"

Abrahamo: "Mi studas en Jeŝivo." ("Jeŝiva": multjara juda seminario por studi la religiajn skribaĵojn kaj ankaŭ por fariĝi rabeno).

Patro: "Tre bele, sed kiamaniere vi prizorgos materie mian filinon, kiu kutimas je sufiĉe alta vivnivelo?"

Abrahamo: "Mi studos kaj Dio zorgos por ŝi."

Patro: "Kaj kiamaniere vi povos aĉeti por ŝi belan geedziĝan ringon, kiun ŝi ja meritas?"

Abrahamo: "Mi koncentriĝos je la studado kaj Dio prizorgos tion."

Patro: "Kaj kiu prizorgos la estontajn infanojn?"

Abrahamo: "Ne zorgu, sinjoro. Dio prizorgos ankaŭ ilin."

Pludaŭris la interparolo, tiel ke je ĉiu demando de la patro la junulo respondis per la sama frazo: "Dio prizorgos tion".

Post kiam la fianĉo iris hejmen, la patrino demandis la edzon: "Nu, kion vi parolis kun li?" Respondis la patro: Li ne havas laboron; li ne havas planojn; sed la bona afero estas, ke li pensas ke mi estas Dio.

- Josef SHEMER, esperanto-anekdotoj

Ĉe hotelo

Turisto, promenanta apud hotelo, demandas belan knabinon:

- Ĉu vi parolas angle?

- Nur iomete.

- Ĝuste kiom?

- Ducent dolarojn.

- Alexey KOZLOV, esperanto-anekdotoj

Juda svatisto

Svatisto (= edzperanto) venas al la juda malriĉulo Josel kaj diras: "Mi volas aranĝi geedziĝon al via filo." La malriĉulo respondas: "Mi neniam enmiksiĝas en la vivo de mia filo." La svatisto respondas: "Sed la knabino estas la filino de la granda juda milionulo Rotŝild." La patro diras: "Ho, en tiu okazo..."

Poste la svatisto iras al S-ro Rotŝild: "Mi havas edzon por via filino." Rotŝild: "Sed mia filino estas tro juna por geedziĝi." Svatisto: "Sed tiu junulo jam estas vicprezidanto de la Monda Banko..." Rotŝild: "Ho, en tiu okazo..."

Fine la svatisto iras al la prezidanto de la Monda Banko: "Mi havas por vi junan kandidaton por vicprezidanto." Prezidanto: "Sed mi jam havas pli da vicprezidantoj ol bezonate." Svatisto: "Sed tiu ĉi junulo estas la bofilo de Rotŝild." Prezidanto: "Ho, en tiu okazo..."

- Josef SHEMER, esperanto-anekdotoj

Anoncoj

"Spegulo"

Spegulo estos kvaronjara revuo kun soci-kultura enhavo. Ĝin redaktos la pola kvaropo: Tomasz Chmielik (ĉefredaktoro), Lidia Ligęza, Kazimierz Leja kaj Stanisław Śmigielski (sekretario de la redakcio). Inter la kunlaborantoj estas la nomoj de Zbigniew Galor, Małgorzata Komarnicka, Ilona Koutny, Teresa Nemere kaj Ryszard Rokicki. Atendataj estas ĉiuj samideanoj, enlande kaj eksterlande, kiuj volos pliriĉigi la novan revuon per siaj kontribuajtoj.

SPEGULO estas turnita al leganto aktiva, lingve matura, kritike sekvanta okazantaĵojn en la moderna kulturo, eŭropa kaj monda. En estos en ĝi originalaj poemoj, rakontoj kaj teatraĵoj, sed ankaŭ tradukoj el la plej diversaj lingvoj.

Ni ne volas forgesi la historion de la Esperanto-movado, en kiu ni serĉos

imitindajn ekzemplerojn kaj indikojn por la estonteco. Interesas nin serioza recenzado de verkoj aperintaj en Esperanto - recenzoj devas analizi la literaturan valoron de tiuj verkoj, ilian lokon en la literatur-historia perspektivo.

Multe da atento ni volas turni al la signifoplenaj eventoj kaj aĉeraĵoj en la arta vivo. Ni volas eliri el la verda "geto" kaj interparole kontakti elstarajn personojn de la kultura vivo.

Nin ĉiujn ligas la komuna sperto de tiu memorinda jaro 1989 - annus mirabilis - kaj ĉiuj ŝanĝoj, kiuj okazis en la politika kaj socia vivo, kiam finiĝis la komunista regado kaj formiĝis novaj ŝtatoj en la Meza kaj Orienta Eŭropo - en tiu parto de la mondo, kiu estas nia loko surtere. Tial ni volus montri al Legantoj la gravecon kaj signifon de la jaro 1989 kaj la sekvon por ni, kiel parto de ESPERANTUJO.

Ni deziras, por ke Spegulo estu malferma, sen limigaj antaŭkondiĉoj aŭ tendencoj. Ĉiel ni klopodos, por ke Esperanto fariĝu perilo inter homoj kun diversaj opinioj, kun malsamaj spertoj.

Per SPEGULO ni intencas konvinki Esperantistojn, ke la Zamenhofan lingvon ili lernas kaj praktikas ne nur por kongresumi kaj plum-amikadi, sed ankaŭ por vastigi siajn pens-horizontojn.

Tomasz Chmielik

